
JARA ELDONO DE SAT

2008

# SENNACIECA REVUO

*maldekstre progresema kaj libere plimultema!*



*Sennacieca Revuo estas eldono de SAT*
*67, av. Gambetta. FR - 75020 Paris*

*Supplément au S-ulo 7/8 (1236 - 1237)*

## Kara leganto

Majo estas kutime la monato kiam P.K. decidas pri aperigo de Sennacieca Revuo.
Estas tempo por mi por malfermi ujon en kiu la tekstoj kolektiĝas. La labormaniero tute malsamas ol antaŭaj jaroj. SAT nun kalkulas je la fortoj de plena redakta-skipo. La aktivuloj en ĝi, post plena jaro de kunlaboro, trovis ilian angulon en kiu ĉiu plej spertas. Ili gustumis la tekstojn kaj pritraktis ĝin laŭ enhavo kaj laŭ kvalito.
Tiam dum tempo de cerizoj, mi povis komencigi enpaĝiĝadon.
Grandan glason da ruĝa vino el regiono de Chinon, mi prenas, KD kun muziko de Mozart estas metita en aparato kaj la festo, krei revuon, komenciĝas.
Kun mi ro mi legas kiel homoj kapablas verki tekstojn, kiom da penoj ili devis fari por prezenti al nia legantaro informon pri plej diversaj temoj.
Nova glaso da vino necesas, kaj la piano de Mozart mi forprenas kaj anstataŭas ĝin per la voĉo de la plej amata kantistino, Maria Callas. 'Mon coeur s'ouvre à ta voix' ŝi kantas.
Teksto iom pli peza bezonas iom da Wagner kaj 'Götterdämmerung' helpas min tra plej peza parto.
Unua provpresado estas sendita al la skipo. Diligente la amikoj elŝarkas malglataĵojn.
Kvazaŭ mi prilaboras plej kostan diamanton mi korektas indikitajn erarojn. Ĉu mi sukcesas? Ĉu mi ne forgesas akuzativo-N? Ĉu la diamanto fine brilas kiel plej bela stelo, aŭ ĉu eta makuleto restas kiu malplivalorigas la tuton
Re kaj re la tekstoj traflugas la reton. Kiom da peno, kiom da Sisifusa laboro devis esti krei Sennaciecan Revuon por miaj kamaradoj el tempo kiam komputilo kaj interreto estis nur revo.

Proksimiĝas la fino. Botelo de Chino preskaŭ malplenas. Janis Kelly kaj Richard Halton kantas 'Bei Männer - Welche liebe fülen'. Mozart denove do.
Lastaj komoj, lastaj demandosignoj estas metita en ĝusta loka kaj tiam Duke Ellington ludas sur piano 'Things aint what they used to be'.
La botelo malplenas, ĥorloĝo indikas horon kiam plej multe de la homoj kuŝas en lito.
Sekvas nun semajnojn de ŝtreĉo. Ĉu niaj legantoj kontentas pri nia laboro. Espero pomadas la animon.

jakvo

## Enhavo


Frontopaĝo: foto; Suzy De Wilde

paĝo 3: Trojo senvualigas la ŝtrumpon; Petro Levi

paĝo4: Spontanaj Diroj; kolektis Cezar Kaiser

paĝo5: Lastaj lotusfloroj; tradukis Donjo kaj Cezar

paĝo 10: Kiam la Vaska naciismo ne estis konsiderata progresema; Toño del Barrio

paĝo 15: Pri faŝismo; jakvo

paĝo 21: En la interno de la citadelo ĉio estas permesata; tradukis Donjo kaj Cezar

paĝo 23: Esperanto kaj scienco; Dro prof. Miodrag Stojanović

paĝo 25: Svalbard : Tutmonda Arkta SemKripto; Robin Beto

paĝo 28: B. Traven : La ĉaro; Teron kaj liberon, Donjo kaj Cezar

paĝo 31: Gento Vooruit; jakvo

paĝo 34: Konscienco; Jomoloso

paĝo 35: La pordo; Etel Zavadlav

paĝo 36: Estu lumo; Etel Zavadlav

paĝo 38: Skizo pri la parencec-rilatoj inter animaloj; Vinko Markov.

paĝo 44: Regularo por sorĉistoj - anarkiistoj; Tilio



Kunlaboras en redakta skipo de Sennacieca Revuo - Kreŝimir Barkoviĉ, Toño del Barrio, Robin Beto, Djémil Kessous, Petro Levi, Vinko Markov, Vito Markov, Gary Mickle, José Maria Salguero, jakvo Schram, Cezar Kaiser, Etel Zavadlav.

Sennacieca Revuo estas oficiala organo de SAT. Asocia sidejo de S.A.T.; 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris.
tel: +33.9.50.71.01.97, @: satesperanto@free.fr . Por Sennacieca revuo @ jakvo@mac.com
http://www.satesperanto.org.

Impremé par: Troisa, 4 rue Théodule Ribot, FR - 75017.
Directeŭr de la publication Jacques Bannier

# Trojo senvualigas la ŝtrumpon

La urbo, iama [franca] ĉefurbo de la maŝ- kaj fadenindustrioj, hodiaŭ estas ruinigita. Orepoka retrospektivo



okazas en la Modernarta muzeo, kun pli ol 250 verkoj elvokantaj tiun ŝikan subveston.

Troyes (trua, Trojo), [franca] ĉefurbo de la maŝindustrio, organizas en la Modernarta muzeo belegan ekspozicion pri la ŝtrumpo. "A fleur de peau" ("Ĉe la haŭto") estas pretendata la unua retrospektivo pri la ŝtrumpo kun pli ol 250 eroj, el kiuj la plimulto havas daton en la fino de la XIX-a aŭ en la XX-a jarcento, pentraĵoj (Degas, Toulouse-Lautrec, Van Dongen, Picasso, Sonia Delaunay...)(1), desegnoj, fotoj, afiŝoj kaj pluraj originalaj eroj datitaj ekde la 1900-aj jaroj ĝis la nuna epoko (Chantal Thomas, ŝantal tomas). Krom la pruntoj el la muzeoj de Francio (Precipe Orsay, orse, (2)), la ekspoziciataj verkoj devenas el la donacfonduso de Pierre kaj Maryse Lévy (3), paro da trojaj industriistoj kaj mecenatoj. Pierre Lévy estis prezidanto-ĝenerala direktoro de la entrepreno Devanlay, unu el la elstaraj entreprenoj de la loka teksindustrio. La nuntempa historio de la ŝtrumpo rakontata en la Modernarta muzeo ekbanas la vizitanton en la fontojn de la pentrarto de la fino de la XIX-a jarcento. Historio de la arto, socia historio. La ŝtrumpo rezervita al la viro ĝis la XVIII-a jarcento iĝas poste virina objekto kaj ĝi akompanas la malrapidan sed certan liberigon de la virino. La teksindustrio fasonas la modon.

Dank'al la novaj maŝinoj, ankaŭ dank'al la ekuzo de novaj materioj (ĵerzo, artefarita silko kaj en 1938 la nilona revolucio), Trojo, urbo de subvesta industrio, kiu koncentras sur unu sama loko la tutan produktoĉenon "de la fadeno ĝis la finprodukto", iĝas la ĉefurbo de la maŝindustrio. La plej grandaj markoj naskiĝas tie: Exciting, Dimanche kiu iĝos Dim, DD, Vitos. En la sektoro de la vesto, la ĉefurbo de la departemento Aube (ob) estas la lulilo de Lacoste kaj de la vestoj por infanoj Babygro, Petit Bateau, Absorba, ktp.

Kiam industrio eniras en muzeon, tio signifas, ke ĝi riskas malaperi. Kiel artistoj agnoskitaj "post mortem"(4). La urbo Boulogne (bulonj) faris la saman operacion valorigante sian industrian teritorion, Billancourt (bijankur), kiam Renault (reno) forlasis insulon Séguin (segen). De tiam, strange, la urbo Boulogne (bulonj) retrovis sian originan nomon, Boulogne-Billancourt (bulonj-bijankur). La celo tie estas valorigi terenojn kaj, koincide, la unua projekto de instalo sur la teroj de Renault (reno) estis tiu (abortinta) de nuntemparta muzeo. Ĉu la historio pri la troja subvestindustrio estas finita? "Tiu ekspozicio enskribiĝas en ĝenerala celado, iniciatita de la urbo jam de deko da jaroj", precizigas la respondecuoj de "Ĉe la haŭto", por valorigi la industrian, artan kaj arkitekturan heredaĵon. Certe, la teksindustrio ne komplete malaperis, kaj la malmultaj postrestantoj post la ĉina aŭ hinda ondo ludas la karton de la scienca esploro, samtempe observante la reorientiĝon de la urbo al aliaj aktivaĵoj. La novaj industrioj instaliĝas en la iamaj teksfabrikoj transformitaj en entreprenajn apartamentojn kaj hotelojn. Estis 30.000 tekssalajruloj en la 1950-aj jaroj. Da ili hodiaŭ restas apenaŭ 6.000. Lacoste (lakost), emblema marko, ankoraŭ vicproduktigas kelkajn modelojn en ĉi tiu urbo.

François Baroin (fransua baruen), urbestro de Trojo kaj ministro, ne komplezis honori per sia ĉeesto la inaŭguron de la ekspozicio ĵaŭdon la 15-an de marto, malgraŭ la ĉeesto de industriistoj kaj patronoj de la



ekspozicio. Anstataŭ li, Marc Sebeyran (mark seberan), lia unua vicurbestro, opinias, ke "ankoraŭ estas espero por la subvestindustrio, niĉoj de produktado, disvolvindaj inteligentaj teksaĵoj". Li forte substrekas la 80.000 kvadratmetrojn da uzinaj vendejoj, kiuj tion vendas, kion oni ne plu fabrikas en Trojo. "Ni laboras por la konservo de malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj kun forta aldonita valoro en ligo kun la polusoj de teksa konkurpovo de la nordo de Francio kaj de la liona regiono. La loĝantaro ankoraŭ ne funebris la teksindustrion; ĝi povas retrovi novan esperon. Oni ne laboras super fantomoj de la estinteco", diris Marc Sebeyran. Ĉu vere li kredas tion?

*Jacques Moran,*
*"Hd L'humanité Dimanche", 29 marto - 4 aprilo 2007,*

**Elfrancigis Petro Levi 23111.**

*(1) Dega, tuluzlotrek, vandongen, pikaso, sonja delone...*

*(2) urbo najbara de la pasintjara SAT-Kongresurbo.*

*(3) (pjer kaj mariz levi) Sen ia familia rilato kun la elfranciginto de tiu artikolo.*

*(4) latine en la originalo: "post sia morto".*

*Memormarkoj*

**La markoj "Petit Bateau" (1120 salajruloj) kaj "Devanlay" (870 salajruloj), bazitaj en Trojo, estas la plej gravaj dungantoj en la departemento.*

** La teksindustrio estas la ĉefa eksporta sektoro en la departemento Aube (ob) kun preskaŭ 20 % el la tuto.*

**La subvestindustrio reprezentas 14,5 % el la eksportoj, 11,5 % el la importoj. La diversaj vestoj reprezentas 7 % el la eksportoj, 6 % el la importoj.*

*(fontoj: komerca kaj industria ĉambro de la departemento Aube)*

# Spontanaj Diroj

Antaŭ Dio ĉiuj homoj estis samaj, nun estas diferencoj.

Ĉiuj agrablaj aĵoj estas aŭ malmoralaj, aŭ kontraŭleĝaj aŭ ili dikigas.

De kiam li fariĝis skleroza, li pensas, ke li estas monumento.

Estas ĉiam du opinioj: mia kaj la malĝusta.

Inoj prefere belas, viroj prefere gapas.

**Kuraĝo estas ofte la produkto de la penso, ke malkuraĝo en certa situacio ne plu utilas.**

Ju pli iu ne komprenas ion, despli li parolas pri tio.

Kiel venas, ke fine de la mono restas ankoraŭ tiom da monato?

Kie ni estas, estas antaŭe, sed se ni foje estas malantaŭe, jen malantaŭe estas antaŭe.

La borado en la nazo ankoraŭ ne estas pensado.

La kara Dio vidas ĉion – sed la najbaroj eĉ pli.

**Oni kutimiĝas pri ĉion, ankaŭ pri la akuzativon!**

Mi ne estas malkuraĝa, mi estas nur pli forta ol la kuraĝulo en mi.

Neniu malutilas, ĉar li povas servi almenaŭ kiel malbona ekzemplo.

Opozicio estas la arto tiel lerte esti kontraŭ io, ke oni pli poste povas esti por tio.

Planado estas, kiam oni anstataŭigas la hazardon per la eraro.

**Se mi ne estus tiom modesta, mi estus la plej perfekta homo surtere**

Vi rajtas fari nur tion, kio estas permesata, kaj eĉ tio ne estas permesata.

# LASTAJ LOTUSFLOROJ

**Hieraŭ kaj hodiaŭ**
**Ĉinio : Malgrandaj piedoj kiel belecidealo**

En la malgranda vilaĝo Liuyi vivas ankoraŭ nun ĉirkaŭ cent da maljunaj ĉininoj kun rompitaj, firme bandaĝitaj piedoj.

*La knabino*. Ŝi sidas sur la sino de la patro, li balancas ŝin, pinĉetas ŝin en la flankon, faras ŝercojn. La knabino ne ridas. Io estas alia hodiaŭ. Estas la drakoboata festo, la aŭguristo opiniis, ke tiu estus bona tago. La fratino kaj la avino estas tiom silentaj. La patrino estas strange ekscitita, sur la tablo kuŝas porka ungego.

*La dancistino*. Ŝi dancis por li antaŭ jarmilo. Li estis poeto, sed ĉar li estis ankaŭ imperiestro, li donacis al ŝi scenejon el oro, formitan kiel lotusfloron, kiu leviĝas brilante el la ŝlimo. Ŝi estis juna kaj dancis sur la ora lotuso „kiel kirliĝanta nubo“. Ŝia delikata piedo tute malaperis en lia mano, iutage ŝi ĉirkaŭvolvis ilin per silkaj rubandoj, jen ili fariĝis ankoraŭ pli etaj, kaj ŝia danco ekde tiam estis senpeza flugo. Ŝi ektremigis lin.

Jen, diras kelkaj, la komenco. Ĉu vere estis tiel?

Nur tio ĉi estas certa: Tiu imperiestro Li Yu perdis en la jaro 975 sian regnon, li estis la lasta de sia dinastio. Survoje en sian prizonon li ne funebris pri siaj familaj antaŭuloj, kiel tio estus deca. „Anstataŭ funebri“, plendis postnaskito „li staris kun ploroj en la okuloj antaŭ sia haremo kaj aŭskultis la adiaŭajn kantojn de liaj kortumaj belulinoj.“ Li Yu vivis por la beleco. La prezon por tio li ne pagis sola. „Kiom da ĉagreno oni povas elteni?“, li demandas en unu el siaj poemoj: „Tiom da, kiom la rivero en torentoj povas konduki al la oriento.“ 30 generacioj. Mil jarojn. Kiom da inoj?

*La knabino*. La patrino silentas, ĝemas. Ja kial ŝi devis naski kvar filinojn: ili ne povas oferi al la siaj familaj antaŭuloj, ili faras nur kostojn, kaj edziniĝas en aliajn familiojn. La knabinoj dum tuta vivo havigis al la patrino nur malicetajn mokojn. Nun ne faru plian eraron, ŝi pensas por ŝi ne volis havi ilin, kaj kaptis vangofrapon. Ekde tiu tempo ŝi ne plu iris nudapieda.

La patro kaj la onklo ekbruligis siajn pipojn, instruis al ŝi gajajn versojn. En la kantoj plej ofte temis pri maljunaj, plumppiedaj inoj kun oblikvaj



si mem. La filinjeto iam havu bonan edzon, pli bonan familion. „Xiuying, vi fariĝos baldaŭ plenkreska“, ŝi diris iutage. „Malgrandaj piedetoj, vi kresku iom pli lante !“ Je tiu tago la knabino ricevis ŝiajn unuajn ŝuojn, malvastajn kaj pintajn.“ Unue buŝoj, kiuj ne ricevis edzon. La knabino kunkantis, ĉiuj aplaŭdis. Ĉiufoje, kiam la knabino renkontis ekde tiam surstrate inon kun grandaj piedoj, ŝi fermis timigite la okulojn, pro timo pri sia revo: fariĝi la plej bela en la vilaĝo, tiu kun la malgrandaj piedoj.

Sed hodiaŭ, kiam la patrino trempas la porkan ungegon en la akvon kaj aspergas per ili la pordofostojn, kaj murmuras: „Por ke ili restu tiel malgrandaj kiel tiuj ĉi ungegoj de porkoj“. Jen en la mamoj de la knabino io kramfe kuntiriĝas. „Kial vi ploraĉas?“ sakras la patrino. „Sango kaj puso fluas nur pli malfrue.“ La granda fratino prenas ŝian manon: „Ne timu ĝin !“ ŝi flustras. „Pensu nur, kiel bela vi estos !“ „Vi ja ne volas finiĝi kiel Luoluo, flustras la avino. La knabino ektimiĝas, ne, ne Luoluo. Tiel oni nomas ĉi tie la inojn de la montotriboj, ĉe la rando de la regno. Necivilizitaj popoloj. Inoj kun grandaj piedoj.

La odoranta lotuso. Kiel silueto antaŭ lanterno. Kuŝigita en la manon de viro. Tiel kiel gracia premsigno en la ĵus falinta neĝo. Tiel opiniis la estetikulo Fang Xun antaŭ pli ol du jarcentoj, piedo bandaĝita plej bone prezentas sian tutan belecon. Fang distingis 58 formojn de la „odoranta lotuso“. „Bambuŝoso“ ekzemple estis malpli pinta ol „Ekaperanta luno“. Mola estu laŭ li la piedo, harmonie volbita, svelta, pinta – kaj kiel eble plej eta. La „Ora lotuso“ estis la malofte atingita idealo. Ĝi mezuris tri colojn kaj dek centimetrojn. Arĝentaj lotusoj estis iom pli grandaj, kaj fera lotuso ekestis, se kamparaninoj provis imiti la urbajn kaj palacajn damojn.

Populara la bandaĝado de la piedoj fariĝis en la Song-dinastio, je tempo, kiam la disfaliĝema ŝtato estis minacata de alsturmantaj mongoloj kaj konservativaj neokonfucianoj kun ĉiuj restintaj fortoj provis ĉarpenti novan ordon. Tio estis eruditoj, kiuj vidis embuski la pereon de viro en la „vangokavetoj de knabino“, kaj kiuj malpermesis al vidvinoj la denovan geedziĝon, kun la averto, ke „estas malgranda afero malsatmorti, sed granda peko, perdi sian ĉastecon.“

Odorantaj lotusoj. Plej valora trezoro de la ino kaj la plej granda sekreto samtempe. Komence ili estis la privilegio kaj la lukso de la kortegaj damoj. Sed baldaŭ la urbaninoj imitis la „palacan stilon“. Fine ankaŭ kamparaninoj firme ĉirkaŭvolvis al si la piedojn. Duono de popolo kripligis sin. Por plaĉi al la alia duono. Por povi trovi edzon. Ĉu neniam estis pensoj pri ribelo? La demando denove kaj denove estigas la saman mirigitan rigardon: estis ja la volo de la ĉielo. Ĉiuj faris ĝin.

Oni lavis la piedojn nur en malhela ĉambro. Malpermesita rigardo sur la nudajn piedojn estis preskaŭ la sama kiel la rabado de la virgeco, oni raportas pri patrino, kiu glutigis venenon al ŝia filino, ĉar oni ŝtelis ĉe vilaĝfesto ŝuon al ŝi. „Skarabeto, kiu tiklas kaj tiklas kaj tiklas – kaj kiu ne lasas ekkapti sin.“ Tiel priskribas ravita verkisto la efikon de preterpaŝetantaj ĝojo de la sencoj. Beleco kiel sekvo de perforto, kiu nutras sin de puso kaj de rompitaj ostoj.

La knabino ĉu klinite? Ŝi ne volis fariĝi tia, kia Luoluo. La 20-a jarcento ĵus komencontis konduki la mondon en la duan grandan militon. Pri tio ili sciis nenion en la vilaĝo. Ĉu la mondo? Kie ajn ĝi estis, kien ajn ĝi moviĝis, ĝi flankenmetis la vilaĝon. Kvin jarojn aĝa la knabino estis kaj kriis en tiu nokto la krion de ĵusnaskito. Jen sciis ĝin la najbaroj. Kaj neniu kamaradino plu alkuris, por inviti ŝin ludi ie. Nun ŝi ploras silente, rigardas plena de malamo sur la rubandon, dek centimetrojn larĝa, plurajn metrojn longa, kiu en sep ta-




lotuspiedetoj al viroj. Naturaj piedoj fariĝis baldaŭ la celtabulo de mokoj. Estis lanternfaristo, sur kies lanterno troviĝis karikaturo pri la grandaj piedoj de la unua Ming-imperiestrino. La viro kaj ties tuta klano, ne malpli ol 300 da homoj, estis ekzekutitaj. Unu escepto de la prezentmalpermeso ekzistis: publikaj beleckonkursoj en lokoj kiel Datong, fama por etaj piedetoj. En la tempoj de la du lastaj dinastioj Ming kaj Ĉing, la lotuspiedoj jam delonge estis la sinonimo por beleco, ja por la ino mem: simbolo de virto – sed ankaŭ de tento. En la literaturo troviĝas elektrizigaj priskriboj: Viroj, kiuj ĉe la ekvido de nudigitaj piedoj krias kiel frenezuloj, amaso, kiu eniĝas en furiozon. Jen tremanta pendolado inter prudeco kaj senbrida voloj firme tenas kaptita, kio iam estis piedo kaj nun jam nur bulo el fajro. Nur la patrino rajtas malbandaĝi la rubandon – por poste ĉirkaŭvolvi ĝin eĉ pli firme. Ĝis ĉiuj piedfingroj estas premegitaj sub la plandon. La grandaj piedfingroj restas stare, pro la serpoformo, kiun prikantis imperiestroj: „Ekaperanta luno en mia mano“. En la dua jaro la patrino kunpremegos la antaŭpiedojn kaj la kalkanojn. Kiel harmonian arkon.

Ekzistas precipa vorto en la ĉina lingvo por la sentoj de patrino al ties infano: teng. Teng signifas samtempe „senti amon por iu, dorloti“ - kaj „kaŭzi dolorojn al iu“.

*La knabino* apenaŭ povas iri plu. Kvazaŭ ĝi estus trapikita per pingloj. Dormi la knabino nur tiam rajtas, se ŝi estas saltinta. Tiom alte, kiom ĝi povas. Kaj se ŝi kun plena pezo denove surplankiĝas. „Ankoraŭfoje !" ordonas la patrino. Tio kunpremegu. „Viropiedoj !" insultas la patrino post kelkaj monatoj. „Kial tiuj ne putras ankoraŭ?" „Kio ne putras, ne fariĝas malgranda, murmuras la avino. Kaj ŝi aldonas fajnajn porcelansplitaĵojn en la rubandon. Tiam ŝlimon. Laste vermojn. Finfine: Karno inflamiĝas, putras, defalas. „Nu, do !" diras la patrino. Nun la piedoj fariĝas etaj. Tiam senperceptaj kaj mortaj. La knabino ne plu havos dolorojn. Kiel en la verso: piedeto, jen malgranda tombo. La patrino ridas: „Nun vi trovos bonan viron." Pli malfrue la knabino pensos, ke tio estis la plej bela tago en la propra vivo.

Ŝi lernas nun brodi, faras sin mem ŝuojn. Teksas, ĉar tio estas laboro por inoj. La domon ŝi ne plu forlasas. Ĉar ŝi devas kaŝiĝi: la kruduloj de la distrikta estro ĉirkaŭe ŝteliras. Ili batas knabinojn tiajn kiajn ŝi kaj punas la gepatrojn- ekzistas novaj leĝoj. Ĉar bone edukitaj knabinoj jam sen tio ne forlasas la korton, ĉar ili eĉ ne pensas pri tio. La volo de la ĉielo. La najbara filino estis promesita al la filo de la grandbienulo. Ĉiuj enviis la elektitan inon. Ĝis tiu iutage ne plu eltenis tion kaj sekrete eliĝis kaj promenis en la arbaro. Nur unufoje. La familio de la fianĉo rifuzis nur per mangestoj. „Ni ne volas havi vagulinon en la domo !"

Ĉiuj en la vilaĝo konas la legendojn, kiuj plektas sin ĉirkaŭ la morusan arbareton. Kiel ĝi iam estis paradizo, kiel tiam invadis la rabistoj, la loĝantoj fariĝis sklavoj kaj la silkraŭpoj mortis. Kiel la rabistoj malaperis senspure kaj postlasis nenion alian krom venenaj herboj kaj serpentoj. La knabino estas dekdu jarojn aĝa, kiam ŝi unuafoje forlasas la korton kaj la vilaĝon kaj vidas la sovaĝejon la unuan fojon. Kun frapanta koro. Kiom granda la mondo estas !" ŝi pensas. La morusa bosko troviĝas kilometron for de la vilaĝo.

*La vilaĝo*. Ĝi havas sian nomon laŭ la dato de la granda foirtago: „Liuyi",unua de junio. Ĝi similis al fortikaĵo, ekde kiam la soldatoj de la imperiestro setlis ĉi tie. Defendkamparanoj il estis, ses klanoj el Nanking, senditaj el foro de miloj da kilometroj en la provincon Yunnan. „Suden de la nuboj", al la sudokcidenta limo de la regno, por teni sub kontrolo barbarajn popolojn kaj banditojn. Tial oni prefere enmasonis sin, flegis la morojn de la antaŭuloj kaj vantis pri la noblaj moroj en la ĉefurbo. Tiel per unu fojo ankaŭ en Yunnan la piedoj estis ĉirkaŭvolvataj- kun fervoro, kiu ne malpliiĝis dum 600 da jaroj. Sed kiu estus pensinta, ke la malgranda kamparana vilaĝo pri persisto iam superus eĉ la tutan regnon?

Venis ja la tempo, kiam la Mandŝuimperiestro anoncis la unuajn ediktojn, por ke oni malpermesu tiun moron de la ĉinoj regataj de (antaŭ 350 da jaroj), kiam ankaŭ ĉinaj eruditoj diris kiel „mizere" ĝi estas kripligi la propran filinon (antaŭ 200 jaroj), kaj kiam la modernigantoj plendis, ke la bandaĝado de la piedoj faras malforta la landon kaj rindinda antaŭ la mondo (antaŭ cent jaroj). La nombro de la malpermesoj oftiĝis – kaj kiam la lasta imperiestro estis eksigita kaj kiam la registaro de la naciistoj sendis siajn spionojn de domo al domo, jen la malpermesoj ekefikis iom post iom. La naciistojn pelis ĉe tio malpli la homamo ol la nura egoismo:. Ili bezonis la virojn kiel soldatojn, kiel nutraĵon por la kanonoj kontraŭ japanoj kaj komunistoj- tial do la inoj devis labori en la kampoj. Tiel la firma bandaĝado de la piedoj lante ĉesis. Unue en la urboj, poste kampare. Nur ne en Liuyi.

La malgranda vilaĝo rande de granda regno – Vjetnamio ne estas tre fora kaj ankaŭ ne Tibeto - simple preterdormis la finon de jarmilo da kulturhistorio, forgesis la mondon. Tempkapsulo. Eble helpis ĉe tio, ke la tekslaboroj de la inoj de Liuyi estis tiom ŝatataj de la komercistoj kaj enspezigis atentindajn sumetojn, la viroj tial vidis ilin pli prefere restanta en la domo ol en la kampoj.Ĉiukaze la avinoj profetis: Atendu do, la imperiesto ja revenos ! Kaj ne malmulte da patrinoj bandaĝis ankoraŭ en la 40-aj jaroj la piedojn, ne divenante, ke iliaj filinoj de ĉiuj viktimoj de la mistera kutimo fariĝos la plej malgajaj. La lastaj de sia speco, tiuj, kiujn humiligis eĉ du epokoj, kvankam ili havis la destinon esti la plej belaj. Nun prezentas sin stranga vidaĵo al tiuj, kiuj venas pro iu hazardo al Liyui. Balanciĝema, paŝetema irado sur ĉiu vojo de la vilaĝeto kun kvar mil da loĝantoj. Lotuspiedoj en ĉiu korto: la 94-a Yang, kiu iam predikis al Mao, la malgaja naŭdekjara Luo, kiu dormas apud sia ĉerko, la 84-a Xiao, iam la plej bela en la vilaĝo. La juna komunuma oficisto kaj verkisto Yang Yang devenas de tiu vilaĝo: „Kiel infano mi pensis, ke inoj, se ili fariĝas maljunaj, aŭtomate ricevas malgrandajn piedojn." Li estas filo de la knabino el nia historio. Kiam li estis infano, Yang trovis tion bonega, ke lia patrino havas bandaĝitajn piedojn: ŝi neniam povis sekvi lin, kiam li faris iun stultaĵon. Liaj amikoj enviis lin. Pli poste li hontis antaŭ la samaj amikoj. Ankoraŭ pli malfrue venis la kompato, tiam la kolero. Al lia patrino Zhou Xiuying oni bandaĝis la piedojn en la jaro 1939. Hodiaŭ ŝi estas 68-jara kaj fiera ino. Ŝi detiras siajn ŝtrumpojn, rigardas piedon, kareseme: „tiel malgrandaj kaj fajnaj kiel miaj, tio estis tiam rara" ŝi diras: „Mi estis deziregata. Manan larĝon super la maleolo estas ankoraŭ videbla kaveto: la elfluejo por sanĝo kaj puso.

Antaŭ la liberiĝo. „Tio estis la plej bela tempo de mia vivo." Tion la knabino opinias nun. Antaŭ la jaro 1949, antaŭ ol Mao Zedong liberigis la landon. Kaj la piedojn. Tiel ili nomis tion efektive, la komunistoj: „Liberigitaj piedoj". Kiuj ja - tiel ironia povas esti la historio - tute ne volis esti liberigitaj. Ĉar la libero terure dolorigis. La plej bela tempo de ŝia vivo. Ŝi ne konsiderindas, ke ŝi devis kaŝi sin dum jaroj en la domo. La

knabino havas malgrandajn piedojn, ŝi estas bela. Ŝi kombas sin dum horoj, antaŭ du speguloj. Se la monaĥoj tintigas la sonorilon en la templo, ŝi ekstaras kaj lavas sin. Kombas sin ĝis sunleviĝo. Ŝia hararo estas perfekta, la haroj ankoraŭ kovras la postaĵon. Se la suno fine leviĝas, ili brilas kiel silko.

unufoje po monato, kaj multfoje priskribita kiel bestaĉa, trovis ankoraŭ siajn ŝatantojn. Certan Gu Hongmin katenis ankoraŭ komence de la 20-a jarcento nur la ĉarmo de tiuj piedoj, kiuj estis tiom malgrandaj, ke oni povis suprenŝovi ilin „je duono en la naztruojn“.

Oni priskribis la ĉinajn inojn kiel kaptitojn de la internaj ĉambroj, kiel nesciantaj kaj humile tenataj kripluloj. Ĉe tio la libroj raportas pri ne malmultaj amfrenezaj viroj, kiuj mem fariĝis la predo, kiuj vendis sian domon kaj la korton, por konkeri la plej gracilajn lotuspiedetojn. La monaĥo Di Ming de la Perlorivero deturnis sin de la monaĥeja solena promeso de ĉasteco, por verki manlibron pri la amludo kun la lotuspiedoj, ne la ununuran. Ekspertoj nombris 18 seksmanierojn. („Du drakoj ludas kun perlo“), kaj eĉ la maljunaj kamparanoj en Liuyi rakontas – post kelkaj glasoj da rizobrando de litoĝojoj kiel tui („ŝovi puŝĉaron“) shun („suĉi cicumon“) aŭ xuan („en maŝoj pendigi al litofosto“). Sed neniu protestis kontraŭ tio, ke „grandpieduloj“, kiuj turnas sin en la lito, estigas malagrablan aerbloveton.“



*La viroj*. Ili sentas admiron, timon, ofte senliman kompaton por la beleco naskita el turmentoj. Ili sentis sin ekscititaj kontraŭrigarde al la piedoj, kiuj naskiĝis per perforto. Ili estis la plej granda el ĉiuj tabuoj. „Ankoraŭ pli sekretaj ol seksorgano“, kiel iu skribas: „Se oni povas ekvidi la piedojn de la amatino, la ebriigita ĝojo ne havas limojn... estas kiel forta kurenta impulso.“ Erotikaj legendoj abunde cirkulis. Oni flustris al aliaj, ke la ŝanceliĝema irado de etpiedulinoj malvastigas la vaginon kaj havigas al ĝi delikatajn haŭtsulketojn. („Pordetojn kaj pordojn, unu post la alia“.) Eĉ la fetoro de la piedoj lavitaj ofte nur

Al mokantoj el eksterlando, kiujn tio naŭzis, la franca kuracisto, praktikanta kuracisto en Pekino, obĵetis: „Kiu deformigo estas pli ridinda? Tiu, kiu por la iranto estigas certan malhelpon, aŭ tiu, kiu al inoj ofte malebligas havi infanojn, per tio, ke ĝi translokigas la renojn, kontuzas la hepaton kaj malvastigas la koron?“ La doktoro celis la eŭropan korseton. Kelkaj ĉinoj tiom estis en la sorĉo de la lotuspiedoj, ke erudito el la Mingkorto proponis eksporti la praktikon en la nordon, por mildigi la milite proksimen sturmantajn rajdopopolojn per beleco: „Barbaroj, kiuj fordonas sin al tiaj inoj“, verkis Qu Siju, „perdos sian kruelan kaj duran naturon.“ Ne longe post tio Ĉinion subhufigis la Mandŝu, popolo, kies inoj efektive neniam bandaĝis siajn piedojn.

Post la liberiĝo. En Liuyi la tempo ne nur unufoje haltis. Tabuloj je la pordofostoj de la malnovaj pitoreskaj domoj el ligno kaj argilo ankoraŭ nun informas pri la ismo de la granda liberiganto: Mao. Li, la Mesio. Lia popolo: Blanka folio da papero, sur kiu lasas desegni sin la plej belaj signoj.“ La fama sentenco troviĝas je la pordo de la maljuna Yang Zhaoshi. „Dufoje po tago mi tiam haltis antaŭ la tabulo kaj raportis“, rakontas la 94-jara: „Matene, kiam mi iris al la laboro, kaj vespere, se mi revenis. Mi demandis al Mao, ĉu li estas kontenta kun mia laboro de la tago.“

Subite ĉiuj tiuj knabinoj kaj plenkreskulinoj havis ĉiutagan laboron tre fore de la teksilo, rajtis, ne, devis forlasi la loĝoĉambron. Ili laboris en la kampoj, fandis ŝtalon, konstruis digon por la reteno de akvo. Brigado de kripligitaj piedetoj. Ĉar la revolucio parolis tiel: Kiu ne laboras por la starigo de la socialismo, tiu ankaŭ ne ricevas ion por manĝi. „La brigadestro sendis nin intence al la plej seka tero“, rakontas la maljuna Yang. Ili laboraĉis, por superi Britlandon, kaj por atingi la produktadan forton de Usono. Je la fino de tiaj tagoj kelkaj rampis sur ĉiuj kvar piedoj hejmen. La belulinoj, la fieraj, kiuj per unu fojo estis la hontego de la nacio.

Kio nur antaŭ momento ankoraŭ validis kiel la simbolo de civilizacio kaj gracio, estis nun barbara kaj provincaĉa. Simbolo por la malforto de la malnova, malsana Ĉinio. „Oni bandaĝis niajn piedojn, ĉar la imperiestro tion volis havi tiel“, ili diras, „kaj sub Mao oni mokis kaj malestimis nin pro tio. Zhou kaj Luo kaj Yang kaj ĉiuj aliaj etpieduloj akceptis eks-

plodojn de hato kaj publikajn humiligojn tiel kiel oni akceptas printempan pluvon kaj aŭtunan venton. Plej ofte. Sed foje iris la knabino al la ĉiujara fajrofesto, jen siblis grandpiedulino venene al ŝi: „Lamaj kripluloj ! Vi ne povas zorgi eĉ por la propra manĝo.“ Nun la knabino ne plu povis reteni sin. „Se mi iras, miaj piedoj desegnas la linion de floroj“, ŝi kontraŭdiris, „sed per viaj plumppiedoj oni povas grati la rizorestaĵojn el la poto.“

La plej terura estis, ke la komunistoj volis „liberigi“ la piedojn per perforto: Ili malpermesis malgrandajn ŝuojn kaj devigis la inojn malfermi la rubandojn. Tio dolorigis terure. Ĉu ili tute ne sentis ĝojon pri la fino de la kruela kutimo? Levado de la ŝultroj, tiam la informo: „Unufoje rompitaj, ĉiam rompitaj.“ Kiam ili estis malgrandaj infanoj, oni turmentis iliajn korpojn, nun oni fitraktis ankaŭ iliajn animojn.

Kaj nun? „Vivantaj fosilioj“, diras Yang Yang. Por la kadroj ĉi tie la inoj ankoraŭ nun estas hontiga atesto por la provinceco de la loketo: Yang Yang, la verkiston, ili demandis, ĉu li „ankoraŭ estas sana en la kapo“, ĉar li verkis libron pri la lotuspiedoj, scivolemajn ĵurnalistojn ili regule elĵetas el la vilaĝo.

Ombroboksado. Ili ekzistas, inoj kiel Luo Shenshi, kiu malbenas la tagon, kiam oni metis la rubandon sur ŝiajn piedojn. La patro Luo jen kuŝis sur la mortolito, konsolis la kriantan filinon. „Ĝi dolorigas dum la tuta vivo“, diras Luo. Ŝi estas povra kiel almozpetanto, la vilaĝkadroj antaŭ nelonge – ŝi ĝuste promenis- detruis parton de la domo. La domo fariĝu pli moderna. Nun ŝi dormas duone ekstere, naŭdekjara, vualita en multajn tavolojn da ĉifonoj, inter ligno por la forno, fulgokovritaj pajlmatoj, araneaj retoj. Ŝi portas ŝuojn, kies brodaĵojn ŝi mem faris, antaŭ kvardek jaroj. Ŝi atendas la morton. Ŝi dormas apud sia ĉerko. „Antaŭ 25 jaroj mia filo ĉarpentis la ĉerkon, tiam mi elkraĉis vermojn, tiom longajn kiel rizonudelojn. De tiam mi ne plu manĝas nudelojn. Ĉiuj esperas, ke mi mortu. Sed mi simple ne mortiĝas, mi fariĝas pli kaj pli aĝa. Al miaj filoj mi esta egala. Nun la ĉerko havas la vermojn. Mi dormas rekte apude. Tio estas praktika. Kiam mia fino venas, mi simple enrampos en ĝin.“

Sed tio, kio vere surprizas, estas la nerompita fiero, kiu ankoraŭ nun plenigas multajn. Vi vidos, oni diris: La grandpieduloj en la vilaĝo estas ofte terure malordemaj kaj kotaj, ni etpieduloj male ankoraŭ nun zorgas nin pri nia aspekto. „Ĉu pli bele?“, diras Zhou Xiuying, nia knabino. „Kompreneble malgrandaj piedoj estas pli belaj.“ Denove kaj denove ni aŭdas tiun frazon - kio, mi petas vin, estu bela je anasopiedo, je lotusboato, je rizokulerego? Zhou tiam bonŝancis, ŝi trovis ankaŭ post la revolucio bonan edzon, eĉ ruĝarmeanon. „Li enamiĝis en miajn piedojn.“ Ŝia filo Yang Yang, 38-a, diras: „Ĉu vi en la okcidento ne trovas erotika pikkalkanumajn ŝuojn? Ankaŭ objektivaj sciencistoj devas koncedi, ke malgrandaj piedoj estas pli belaj. Ni ĉinoj nur eltrovis tion jam antaŭ mil jaroj.“

La edzo de la praonklino de Xiao apenaŭ plu havas dentojn, nun li hopadas gaje sur la korto, por montri kiel rapida kaj movebla lia karulino estis pli frue. 84-jare la vilaĝbelulino ankoraŭ nun plu havas glatan haŭton, blankajn kaj per oro enkadrigitajn dentojn kaj instepon kiel Mantou, ronda kunpremita bulko. Ĝis la lasta jaro ambaŭ ankoraŭ faris gimnastikon sur la vilaĝplaco, kune kun la aliaj maljunuloj: „Ĉiun matenon ni renkontiĝis: ombroboksado, diskoteko, al mi ĉio ĉi plaĉis. Ĝis iutage ankaŭ grandpieduloj aliĝis. „Ili vestis sin terure malordemaj“, rakontis Xiao: „Kaj tiam ili ĉe la dancado estis tiom mallertaj kaj plumpaj... jen mi do montris al ili kiel oni movas sin, kiel oni elegante dancas kaj iras.“ Rapide la paco sur la vilaĝplaco estis finita. Nun Xiao restas hejme kaj pripentras por poŝmono paperbiletojn kun trembrila oro: Mono por mortintoj, kiu estas bruligata antaŭ tomboj.

*La ora lotuso*. Nun la vilaĝo aspektas kvazaŭ mordis granda monstro plurfoje en ĝin. Primordataj domoj, al kiuj mankas jen angulo kaj jen antaŭvando. „renovigo de la loko“ nomas tion la vilaĝkadroj. Loĝoĉambroj staras nun nuda al ekstere. Sur la plankoj sidas viroj kun memfaritaj akvopipoj el bambuo kaj peco da pluvodefluilo. La inoj sidas plej ofte en la kortoj. Oni platigas ĝin, la malnovan fortikaĵon. La lasta ŝuisto, kiu kudris lotusŝuojn, mortis antaŭ dek jaroj. Liaj klientinoj sekvas lin. Antaŭ du jaroj vivis ankoraŭ tricent piedetuloj, nun estas jam nur cent da ili. Je kelkaj tagoj mortas du aŭ tri da, diras Yang Yang.

En unu el la novaj domoj el cemento kaj lavbetono loĝas la lignaĵisto Xu Chuanhou. Li rakontas: „ Mi vidis multajn kruelajn sortojn. Kelkaj el la piedetuloj dronigis sin, aliaj venis kun sangantaj piedoj de la laboro, kelkaj sidis kripligitaj hejme, malkapablaj iri. Mia avino, mia patrino, mia bopatrino, ili ĉiuj havis malgrandajn piedojn. Nun ili estas mortaj. Mi volis fari monumenton por ili, pli belan ol ili iam estis.“ Xu iris en la urbon kaj vidis tie montrofenestrajn pupojn.

En la vilaĝo ili nomis lin poste „perversulo“. Kial? Xu malfermas la pordon al sia dormĉambro. Apogite je la geedza lito staras du homgrandaj lignaj pupoj. Inoj kun densa hararo, blankaj vizaĝoj, grandaj mamoj kaj tre bone rekoneblaj reliefiĝantaj mampintoj. Xu skulptis, pripentris, lakis ilin, kaj metis ilin en malvastajn ŝtrumppantalonojn kaj pulovrojn. Junajn, lindajn, lascivajn estaĵojn. Kaj ambaŭ ili havas firme bandaĝitajn piedojn, ekzakte tri colojn longaj. Estas la solaj orolotusaj piedoj, kiujn la vilaĝo Unua junio iam vidis.

La knabino. Ŝi sidas malsupre en la korto, havas nun 68 jarojn kaj diras: „Ĉu tio ne estas bedaŭrinda? Kiam ni iam ne plu estos, sur la mondo estas jam nur grandaj piedoj.

**tradukis Donjo kaj Cezar**

# Kiam la Vaska naciismo ne estis konsiderata progresema



Kiam homo ekster la ibera duoninsulo legas aŭ aŭskultas pri okazintaĵoj en Eŭskio (Noto piedpaĝa: aŭ Vaskio aŭ Baskio : pri la tikla afero de la nomado de landoj kaj gentoj laŭ etnaj manieroj atentigis prave Gary Mickle en antaŭa numero de Sennaciulo), estas tre facile trovi puzligan senton de mistifikado. Ĝuste kiam mi komencis redakti tiun ĉi artikolon, en kiu mi deziris pritrakti la rolon de diversaj socialistoj en la laborista esperanta movado, frapvenis la hirtiga novaĵo ke ETA mortigis simplan laboriston, pro la granda peko esti ano de la socialistaj partio kaj sindikato, kaj esti reprezentinta la unuan en la urbestraro de sia loĝloko. Kiel ekspliki al neinformito tiun ĉi atencon ? Se jam estas malfacile pravigeble ke politika ĉefo, aŭ ke ekstremista politikisto devas esti ricevi eskortadon, kion pensi pri patro de adoleskuloj, kiu ricevas kvin pafojn kiam li eniras sian veturilon por iri labori kiel kontrolisto en budo de aŭtovojo ?

La viruso de la etnismo penetris multajn mediojn de la politika scenejo, kaj specife grandajn tavolojn de la esperanta movado, ke la asocio plenumanta tiun barbaraĵon estas plurloke prezentata kiel liberiga aŭ progresema movado.

Sed ekzistis tempo en la historio kiam al neniu progresema kaj liberema homo en Eŭskio venis en la kapon konsideri ke en la ne ĉiam glataj rilatoj inter la laborista movado kaj la vaska naciismo, la lastaj okupis la kampon de la progreso, eĉ se multaj iliaj petoj rilate al la respekto al la eŭska lingvo kaj kulturo ja estis pravigindaj. Kaj tion povas iel pruvi la rolo de ambaŭ kampoj en la ekesto de la Esperanto-movado en tiu teritorio dum la unuaj jaroj de la 20-a jarcento.

Mi prezentos en tiu ĉi artikolo resumon de la historio de la estiĝo de tiuj ĉi movadoj kaj ilia disvolviĝo en la komenco de la 20-a jarcento, kaj la rolo de Esperanto en ĝi, kun la celo ke vi konu iom la fonon de la nuna situacio. Mi jam prezentis parton de tiu historio en la Eŭropa Kongreso de Bilbao en 2004, kaj mi esperas ke ĝi estos interesa por la legantoj de Sennacieca Revuo.

### La naskiĝo de la socialismo kaj la naciismo en eŭskio

Ambaŭ movadoj, la laborista, kiu en Vaskio estis ĉefe reprezentita de la socialismo, kaj la naciista, naskiĝis dum la sama epoko, kaj sekve de kaŭzoj komunaj. Se jam antaŭe ekzistis movadoj kiuj deziris konservi la tradiciojn kaj la proprajn leĝojn de tiuj provincoj, la naciismo en la moderna senco naskiĝis fine de la 19-a jarcento.

La hispana parto de la eŭska teritorio estis ĝis la mezo de la 19a jarcento socio relative disvolvita, sed dediĉita ĉefe al la primara sektoro de la ekonomio, kun agrokulturo ne pli grava ol la averaĝa hispana, fiŝkaptado agnoskita kaj fama en la tuta mondo kaj metiarto malgranda sed tre bonkvalita. Ĝi estis tre tradiciista socio kun elstare grava influo de la katolika eklezio. Ĝi estis la ĉefa piliero de la tradiciista ribelo konata kiel “karlismo”, kio okazigis plurajn civilajn militojn, post kiuj estis plejparte nuligitaj la tradiciaj leĝoj de aŭtonomeco kiuj depost la malnovaj tempoj de la Kastilia Monarĥio regis la socion de la kvar provincoj (la t.n. foruoj, malnovaj leĝoj). Samtempe oni devas jam emfazi ke la urboj, kaj ĉefe Bilbao, jam entenis dinamikan socion, kun grava influo de la politika liberalismo.

Sed en la dua duono de la 19a jarcento diversaj sociaj cirkonstancoj kaŭzis la subitan komencon de grandskala ekspluatado de la gravaj minoj de fero en la regiono proksima al Bilbao, en la maldekstra bordo de la rivero Nerviono. Baldaŭ estis instalitaj la unuaj siderurgiaj fabrikoj, kaj ne multe poste ekfondiĝis la financaj centroj. La regiono industriiĝis kun

granda rapideco, kaj fariĝis ĉefa piliero de la hispana ekonomio.

La unuaj bezonoj de laboristoj estis kovritaj per la laborforto de la ĉirkaŭaĵo, sed tio baldaŭ ne sufiĉis, kaj komencis amasa enmigrado, unue el la nordo de Malnova Kastilio kaj baldaŭ el aliaj pli foraj regionoj (Andaluzio, Galegio). La subita enfluo de tiuj amasoj da malriĉaj, plejparte needukitaj laboristoj, viditaj kiel "fremduloj" kaŭzis streĉiĝojn en la malnova socio kaj helpis al la radikaliĝo de la ĉiam ekzistinta fono de fiera apartiĝo, kaj helpis al la naskiĝo de la moderna vaska naciismo, en la finaj jaroj de la 19a jarcento. Dume, granda parto de la grandaj kapitalistoj estis laŭdevene vaskoj, sed ili estis bone integritaj en la politika kaj socia hispana oligarkio.

La socialaj kondiĉoj de la proletaro dum la unuaj jaroj estis hororigaj. Ne temis nur pri la troa laboro aŭ la malalta kvanto de la salajro, sed ankaŭ pri la loĝado en barakoj (t.n. kazernoj), la izoliteco disde la familio, la aĉaj vivkondiĉoj. Tiu stato kondukis al la baldaŭa kreado de konscio de klasa aparteno, al la kreado de sindikatoj, kaj al la starigo de unu el la ĉefaj laboristaj movadoj el la ŝtato. Lerta aktivado de diversaj elstaraj aktivuloj (unue Facundo Perezagua, en posta epoko Indalecio Prieto estis la plej konataj figuroj) orientis ĝin al marksisma socialismo, kaj ne al anarĥiismo, kiel estis la trajto de la samtempa kataluna sindikatismo.

Baldaŭ alvenis la fondado de la Socialisma Partio, poste de la Socialista Junularo, kaj ankaŭ alvenis la unuaj balotaj sukcesoj. Bilbao, kaj ĝenerale la vaska ĉirkaŭaĵo fariĝis, kun Asturio kaj Madrido, la bazo de la socialista movado.

Ĝi ankaŭ estis la bazo de la komunista movado, post la skismo favorita de la Rusa Revolucio. Ne forgesu ke vaska, filo de ministoj, estis la plej konata komunista figuro de Eŭropo dum multaj jaroj, Dolores Ibárruri, "La Pasionaria".

## La rilatoj inter socialismo kaj naciismo en eŭskio

Estas jam la momento pritrakti la alian flankon de la afero : la naciismo.

La lokalista sento kaj la flegado de la tradicio estis de ĉiam ĝenerala trajto de granda parto de la vaska socio. Sed la alvenado de enmigrantoj kaj la kreskado de ideologioj modernaj kiaj la socialismo, provokis la kreadon de movado nova, eĉ se apogata en la malnova tradicio : la moderna vaska naciismo. Ĝi fakte naskiĝis en sia nuna formo je la fino de la 19a jarcento, per la impulso de grava personeco de ĝia fondinto Sabino Arana, kaj povas esti konsiderata laŭ kelkaj historiistoj, kiel "la maniero kiel la mezaj klasoj reagis antaŭ la socialismo". Tio montriĝas en la geografia disvastigo de la Vaska Naciista Partio, kiu estis komence fenomeno ligita al Bilbao kaj al la ĉirkaŭaĵoj kie loĝis la mezaj klasoj, kaj poste disvastiĝis al Gipusko, kaj al la cetera parto de Eŭskio, postsekvante la disvastigon de la laborista movado.

La naciista partio estis de komence tre reakcia partio, kun fortaj rasismaj trajtoj (kontraŭ enmigrintoj kaj ĝenerale hispanoj), forta insisto en la lingvo kaj la rasa apartigo kaj kun granda influo de la katolikismo kaj la Eklezia ĥierarkio. Tiuj trajtoj ne estis unuanimaj ene de la movado kiu iom post iom moderiĝis laŭlonge de la historio, ĝis proksimiĝi al la kristandemokratia movado en la 30aj jaroj.

La malamikeco inter naciismo kaj socialismo estis senkompata dum la unuaj jaroj de la 20a jarcento. La socialismo estis vidata kiel la ideologio de la invadantoj, revoluciuloj kaj kontraŭkristanoj, fare de la naciistoj, dum la socialistoj konsideris tiujn ĉi reakciuloj kaj rasistoj.

La sinteno de la socialistoj ne estis tamen unueca rilate la eŭskajn lingvon, proprajn leĝojn kaj tradiciojn. Ĝenerale internaciistaj, en la praktiko venkis centrigemaj sintenoj. Tamen, tio ne estis ĝenerala, kaj la Gipuskaj socialistoj emis pli favori aŭtonomistajn petojn.

Notu ke la socialismo radikiĝis en la laboristaj movadoj, kiuj estis grandparte enmigrintoj, sed en ĝi membris kaj agis aŭtoĥtonoj.

Inter tiuj ĉi lastaj ni povas mencii la nomon de unu ĉefa gvidanto de la movado, kiu estos la unua esperantisto menciita en tiu ĉi artikolo : Toribio Echevarría. Li estis la ĉefa gvidanto en la alia lulilo de la vaska socialista movado, la urbo Éibar. Tiu ĉi estis fama pro sia industrio de armiloj, kaj tie la socialismo enradikiĝis tiel ke ĝi fariĝis kvazaŭ simbolo de tiu movado. Speciala trajto de tiu urbo estis ke la laboristoj estis preskaŭ ĉiuj aŭtoĥtonaj, eŭskoparolantaj, kaj la socialistoj ne nur ne rejektis, sed ankaŭ flegis la baskajn lingvon kaj kulturon. Samtempe ili flegis speciale la senton de internaciismo, kaj estas de tie ke ni scias ke Toribio Echevarría parolis Esperanton, apartenis al esperantista grupo en la "Laborista Rondo" kaj korespondis kun samlingvanoj en Rusio, Aŭstrio, Hungario, Germanio, Anglio kaj Italio. Éibar estis la unua urbo en kiu oni proklamis la hispanan Respublikon en 1931 (antaŭ ol tion faris Katalunio aŭ Madrido) ; ankaŭ tie okazis la plej gravaj konfrontiĝoj en Vaskio de la revoluciprovo de oktobro 1934 (la tiel nomata astura revolucio). En ambaŭ kazoj tre ĉefrolis Toribio Echevarría. Ili estis pioniroj en alia aspekto : la kooperativisma movado ; tiu ĉi, kiu nun estas tre forta en Gipusko, kvazaŭ naskiĝis en Eibar, per la kreado de metalindustria kooperativo Alfa, kiu fariĝos la plej grava fabrikanto de stebmaŝinoj en la hispana regno ; Echevarría estis unu el la kunfondintoj kaj ĝia multjara direktoro. Post la milito li ekziliĝis kaj mortis en Karakaso. En tiu ĉi kazo, la lingva graveco de la homo rilatas al la vaska : li verkis dialektologian verkon pri la parolmaniero en sia urbo, kaj estis koresponda membro de la Akademio de la eŭska lingvo.

En la 20-aj jaroj la socialistoj reagis kontraŭ la ŝovinistaj tendencoj de la tiutempa hispana registaro kaj sin montris pli favoraj al la malcentrigo de la ŝtato kaj al la kreado de aŭtonomaj povoj, tamen ne separismaj. La komunistoj eĉ prenis kiel principon la leninisman rajton je memdispono, kaj ne hezitis foje levi la flagon de la rajto je sendependeco.

## La alveno de la dua hispana respubliko kaj la civila milito

Post diktatoreca regado dum la 20aj jaroj en Hispanio, la monarĥio tiom senprestiĝis ke baldaŭ komencis la movoj por alvenigi respublikan reĝimon en Hispanio. La pakto kie la ĉefaj partioj kaj movadoj kunvenis por alvenigi novan reĝimon okazis ĝuste en Eŭskio, en Donostio (Sankta Sebastiano), kaj la hispanan socialistan movadon reprezentis la vaska gvidanto Indalecio Prieto. La eŭskaj naciistoj ne partoprenis tiun movadon. Post municipaj balotoj kie klare vidiĝis la deziro de ŝanĝo, la Respubliko estis proklamita la 14-an de aprilo 1931. Por esti pli preciza : ĝi estis proklamita la nokton de la 13-a de aprilo, fare de la laboristaro en Éibar, kiel ni jam diris.

Kun la alveno de la respubliko, estis ĝenerale klare ke Eŭskio, kiel Katalunio havos statuton de aŭtonomeco. Tamen, la unuaj jaroj vidis miskomprenojn inter socialistoj kaj eŭskaj naciistoj, rilate la gradon de aŭtonoma povo, speciale pri la statuson de la Eklezio, kio prokrastigis la aprobon de tiun Statuton, kiu ne alvenos ĝis ĝuste la komenco de la interna milito. La socialistoj estis fakte unu el la motoroj de la Respubliko, dum la vaska naciismo pli valorigis la konservadon de la antaŭaj tradicioj kaj nur malkomforte akceptis la reĝimon.

Mi ne rakontos detale la tiamajn okazintaĵojn, kiujn vi povas legi aliloke. Kiel vi scias, la historio estis turmenta en tiuj jaroj. Ekzistis provoj pri militaj puĉoj, rezistoj de la antaŭaj privilegiuloj, senpacienco de la plej malriĉaj. En 1934 ekzistis revolucia provo, kiu daŭris kelkajn semajnojn en Asturio, kaj aparte en Katalunio kaj en kelkaj areoj kie la socialistaj sindikatoj estis tre fortaj, kiel ekzemple en la minista areo de Biskajo kaj en la urbo de Éibar kaj aliaj proksimaj.

En 1936 du grandaj blokoj alfrontis unu la alian, dum la eŭskaj naciistoj estis unu el la malmultaj fortoj kiuj aliĝis al neniu. Venkis la Popola Fronto ; ekzistis multaj eblecoj ke Prieto estus nomumita ĉefo de la registaro, sed lia propra partio tion malebligis. En julio 1936 ribelis parto de la armeo kaj komencis la civila milito.

Fakte, la puĉo estis preparita en historie baska teritorio, Navaro, kie havis sian sidejon la direktoro de la movado, kaj kie ekzistis forta tradiciista movado, la menciitaj karlistoj. Krom Navaro, la alia agrara baska teritorio Alavo estis tuj sub la kontrolo de la ribeliĝintoj. Biskajo kaj preskaŭ tuta Gipusko restis sub kontrolo de la registaro, aŭ, por esti pli preciza, de la fortoj de la Popola Fronto, ĉar tie estis la politikaj kaj sindikatoj movadoj kiuj formis la unuajn lokajn registarojn, la Komitatoj de Defendo. Oni baldaŭ aprobis la statuton de aŭtonomio de Vaskio, kaj en oktobro formiĝis eŭska registaro, sub la prezidanteco de gvidanto de la naciista partio, José Antonio de Aguirre (Agirre).

La registaron formis ĉiuj fortoj de la Popola Fronto, kun escepto de la anarĥiistoj. Inter ili estis tri socialistoj, unu komunisto kaj pluraj apartenantaj al respublikanaj partioj. La ĉefajn konsiliojn gvidis la partio de la prezidento, kiun oni deziris tiel sekurigi en la respublikana flanko.

La registaro daŭris kiel tia nur ĉ. 10 monatoj, kaj nur en malgranda parto, ĉiam ŝrumpiĝanta, de la eŭska teritorio, ĉar meze de 1937 la trupoj de Franco konkeris la lastan vaskan pecon.

## La laborista esperanto-movado en hispanio kaj en eŭskio dum la 30aj jaroj.

Estas jam momento reveni al la historio de la Esperanto-movado. Tiu ĉi lingvo alvenis al Baskolando tre frue, kaj en la komencaj jaroj de la 20a jarcento fondiĝis grupoj en Bilbao kaj en Donostio (Sankta Sebastiano), inter aliaj lokoj.

Grupoj laboristaj estis fonditaj, krom la menciata en Éibar, en Bilbao kaj en la minista urbeto La Arboleda, ene de la Laboristaj Rondoj.

Oni devas tuj diri ke en Hispanio ĝenerale, kaj en la eŭska regiono specife, ne ekzistis tiu antagonismo inter neŭtrala kaj laborista movadoj kia ekzistis en aliaj centreŭropaj landoj. La neŭtralaj gvidantoj prelegis kaj instruis en laboristaj societoj, kaj la laboristaj aktivuloj prenis parton en la ĝenerala movado.

La polemikoj kaj alfrontiĝoj okazis ĉefe rilate la organizadon de la neŭtrala movado mem, inter tiuj alstrebantaj la fortigon de centrigita asocio, kiu povus aktivi rilate al la aŭtoritatoj de la ŝtato, kaj tiuj preferantaj la aktivadon en loka aŭ faka niveloj, kun ŝtata asocio kun nur konfederacia karaktero. La polemiko daŭris dum la jaroj 20aj kaj 30aj ; la unua sinteno estis tiu de la tiutempa Hispana Esperanto-Asocio, estrita de la fama Julio Mangada, dum la duan gvidis ĉefe la katalunaj esperantistoj, kun apogo de samideanoj en aliaj urboj kaj regionoj. Kurioze, la plej konataj laboristaj esperantistoj ofte agis kiel perantoj inter ambaŭ tendencoj.

La divido ankaŭ okazis ene de la laborista movado, ĉefe pro la aparta organizado de la anarĥiistaj esperantistoj. La anarĥiistoj speciale flegis la laboron por Esperanto : en ĉiuj organizaĵoj oni faris kursojn, propagandis nian lingvon, kreis specifan kulturon. Eĉ nun, apenaŭ ekzistas libro aŭ artikolo pri la historio de anarĥiismo dum tiuj jaroj en kiu oni

ne menciu la esperantan agadon. La anarĥiistoj kutime organiziĝis aparte de la ĝenerala movado, kaj apenaŭ ekzistis kontakto inter ili kaj la ceteraj esperantistoj, krom ene de la SAT-movado.

Tiu ĉi lasta, la movado ligita al SAT, estis ĝenerale malforta en Hispanio. Ne ekzistis aparta hispana laborista Esperanto-asocio ligita al SAT, laŭ la modelo kutima en aliaj eŭropaj landoj. Tamen, ja ekzistis pluraj asocioj je loka nivelo, ĉefe en Katalunio.

Komence de la 30aj jaroj, sekve al la komunista skismo en la laborista movado, fondiĝis asocio PUIL (Proleta Unio de Iber-amerikaj Landoj), kiu aliĝis al la Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE).

En 1934 okazis en Valencio Kongreso de SAT, kiun baze organizis homo tre grava en la posta disvolviĝo de la Esperanto-movado, Luis Hernández Lahuerta. Ĝi altiris la atenton al tiu laborista movado, kaj oni povas ekzemple mencii ke Luis Hernández Lahuerta vizitis Bilbaon en 1935 por propagandi Esperanton ene de laboristaj rondoj, sekve de la kongreso. Li faris du prelegojn, kun granda sukceso : esperante en la neŭtrala grupo kaj hispane en la ejo de la socialista Sindikato de Komercaj Laboristoj, kun ĉeesto de preskaŭ 400 membroj, ĉar tie jam funkciis Laborista Grupo, ene de ĝia Kultura Fako.

Ĝeneralan historion de la laborista Esperanto-movado en la hispana ŝtato oni povas legi en la libro “Laboristaj Kronikoj”, verkita de Antonio Marco Botella, kiun mi varme rekomendas.

En Bilbao, la Socialista esperantista Grupo, kiun gvidis Juan Gracia, disvolvis oftajn kulturajn agadojn, lige kun la ĝenerala kulturaj rondoj de la socialista movado. Ekzistis ankaŭ grupoj anarĥiisma kaj komunista.

En 1936, kiel atestas nia veterana amiko, Eduardo Larrouy, ankoraŭ aktiva, tiuj sindikataj rondoj partoprenis la imponan manifestacion de la 1-a de majo en Bilbao, per granda esperantista afiŝo petanta kulturon kaj instruon por la laboristoj.

Dum la hispana milito, la esperantistoj dividiĝis en siaj preferoj, kun tre klara plimulto donanta sian apogon al la respublikana flanko. Esperanto taŭgis kiel ilon de propagando de tiu ĉi flanko. En ĝi oni eldonis afiŝojn, oni disaŭdigis radioelsendojn kaj oni publikigis ĵurnalojn, plej grave la baldaŭ tre faman “Popola Fronto” (redaktitan de Hernández Lahuerta), kaj la informilon de la anarĥiisma sindikato CNT.

## Du konsilistoj esperantistaj

La gravan lokon okupitan de la laboristaj aktivuloj en la tiama Esperanto-movado en la vaska teritorio ni povas montri per unu grava kontribuaĵo, kiun ni povas juĝi tre signifa. Ni jam diris ke la unua vaska aŭtonoma registaro en la historio okazis dum la milito, kaj ke en ĝi integriĝis ĉiuj politikaj fortoj, inklude de tri socialistoj. El tiuj, du estis aktivaj esperantistoj !

Juan Gracia estis konsilisto de Sociala Asistado. Li jam antaŭ tre aktivis ene de la socialista movado, unue kiel ĉefa gvidanto de la socialista junularo, poste kiel magistratano de la urbestraro de Bilbao, kaj jam en 1920 li estis nomumita unua vicurbestro de tiu urbo.

Mi ne scias kiam li lernis nian lingvon, sed tio devis esti sufiĉe frue, ĉar en 1924 li deĵoris kiel vicsekretario en la kunveno de la hispanaj esperantistoj, kiu ricevis la nomon de Dua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj (ĝenerale konsiderata kvara hispana Esperanto-kongreso).

Li estis vicprezidanto de la Socialista Sekcio de Bilbao dum la mezaj 30-aj jaroj, kaj ĉe la komenco de la milito, li prenis parton de la komitatoj por la defendo de la Respubliko kiuj tuj duonspontane estis formitaj en la tuta teritorio.

Juan Gracia estis nomumita konsilisto de Sociala Asistado en la unua aŭtonoma registaro post la aprobo de la Statuto de Eŭskio. Lia laboro estis tre malfacila en tiuj militaj cirkonstancoj, kaj mi nur legis laŭdojn pri lia agado. Li devis okupiĝi pri la loĝigado de la rifuĝintoj kiujn la bataloj elpelis el siaj loĝlokoj kaj puŝis al la liberaj zonoj. Li devis zorgi pri la nutrado en periodo de manko de ĉio necesa por la vivteno. Por havigi la necesajn rimedojn, li ŝtatigis la publikajn spektaklojn en la regiono sub la kontrolo de la registaro.

Post la perdo de la vaska teritorio li, kun la cetero de la aŭtonoma registaro, pasis al Katalunio, al la sidejo de la respublikana registaro, kie li plu laboris en sia posteno, donante socialan asistadon al la baskaj rifuĝintoj en tiu teritorio. Ĉe la fino de la milito, li ekziliĝis al Francio, kie li daŭrigis tiun laboron por la multenombraj vaskaj rifuĝintoj en tiu regno. Ĉe la invado de la franca teritorio, fare de la hitlera reĝimo, Gracia klopodis trovi rifuĝon, por kio li devis tre longe piediri, malgraŭ sia jam tre malbona sanstato. Li fine devis reveni al Parizo, kie li forpasis la 6-an de aprilo de 1941.

Santiago Aznar estis konsilanto de Industrio en la unua aŭtonoma registaro de Eŭskio. Lian grandan engaĝiĝon en la esperantista movado mi konis antaŭ malmulte da tempo ĉar mi havis la okazon ricevi kopion de teksto kiun li verkis kiel malgrandan membiografian noton. Tiun tekston liveris lia bonepo, kiu cetere estas tre konata politikisto en Hispanio, ĉar li estis dum multaj jaroj la proparolanto de la Vaska Naciista Partio en la hispana Parlamento, kaj ĝis antaŭ kelkaj tagoj ankaŭ en la Senato : Iñaki Anasagasti.

Kiel dirite, en tiu membiografio, kiu ja estas tre mallonga, aperas tamen tre elstare lia engaĝiĝo rilate al Esperanto, fakte kiel unu el la ĉefaj agadoj de lia junaĝo. Mi tradukas laŭlitere (inklude de la triapersona stilo) :

« (ĉirkaŭ 1917 li komencis) noktan kurson por studi Geometrion, Aritmetikon kaj Algebron en la Lernejo de Artoj kaj Oficoj de Achuri dum pluraj jaroj. Poste li daŭrigis en la saman centron lernante lingvojn. Li amikiĝis kun la jezuito sinjoro Félix Díez Mateos, profesoro de lingvoj de la Universitato de Deusto, kiu estis entuziasma esperantisto, kaj li studis tiun ĉi internacian lingvon kaj sekve eksplikis kurso de Esperanto en la Centro de la Sindikatoj de la U.G.T., en la strato de San Francisco. »




En la realo, kiel atentigas Eduardo Larrouy, Félix Díez Mateo, kiu estis prezidanto de la grupo de Bilbao kaj prezidis la 27-an Hispanan Kongreson de Esperanto kiu okazis en Bilbao en 1966, ne estis jezuito, kvankam ja la Universidad de Deusto estas gvidata de tiu ordeno ; li estis patro de homo konata internacie en la eduka kampo, Ricardo Díez Hochleitner, prezidinto de la Klubo de Romo.

Santiago Aznar estas konata en la historia kampo ĉar li estis la unua kiu proponis kaj konvinkis sian partion ke oni uzu oficiale la nunan vaskan flagon, kiu antaŭe estis nur la simbolo de la naciistoj. Li ankaŭ ĉefrolis en krizo inter la socialista gvidantaro kaj la naciistoj, ĉar li apogis tiujn ĉi, anstataŭ sian partion en la postmilitaj kvereloj. Li ekziliĝis en Venezuelon, kie li mortis, kaj lia bonepo rakontis al mi ke li neniam forgesis sian esperantistan aktivadon, kaj tion rakontadis al sia familio, kvankam li ne plu aktivis movade.

## Kaj poste ?

La fino de la milito alvenigis reĝimon tradiciisman, aŭtoritaran kaj hispanpatriotisman, kio kondukis al la malfortigo aŭ al neniigo de multaj movadoj, inter kiuj la tri ĵus traktitaj : la socialismo, la eŭska naciismo kaj la esperantismo. Tiu ĉi konservis nur ombron de sia potenco en la unuaj jaroj, ne nur en la vaska teritorio, sed en la tuta hispana Ŝtato. Nur en 1947 oni restarigis tutlandan asocion HEF kaj en 1956 ekreaktivis la grupo de Bilbao.

La tradicia eŭska naciismo rifuĝis en la konservado de la aŭtonoma registaro, kiu post la fino de la milito plu funkciis kiel “registaro en la ekzilo”, strebanta akiri la agnoskon fare de la internaciaj organizaĵoj. Por tio, ili ne hezitis flati la usonan kaj britan registarojn, foje eĉ kunlaborante kun ties sekretaj servoj.

Rilate la socialismon kaj la komunismon (la anarĥiismo ne plu gravis en tiu regiono post la milito), ili restis malfortaj, sed ne mortis. Fakte, en la reviviĝo de la laborista movado dum la diktaturo, la eŭskoj ludis gravan rolon. Tie ĉi okazis kelkaj el la unuaj strikoj kaj laboristaj luktoj. En la socialista movado elstaris homoj kiel Enrique de Francisco (prezidanto de la socialista partio en la ekzilo), Ramón Rubial (prezidanto de la sama partio, jam renovigita post la diktaturo) aŭ Nicolás Redondo (ĉefa gvidanto de la socialista sindikato).

Tamen, la ĉefa trajto de la vaska laborista movado post la sesdekaj jaroj estos la naskiĝo kaj firmigo de movado devenanta de la naciista tradicio. En tiu jardeko grupo de junuloj radikaliĝis kaj klopodis kunigi la idealojn de la naciismo kaj de la maldekstro. Ke ili ne trovis alian manieron lukti kontraŭ la diktaturo ol per armiloj, ke la kriminalaj misfaroj de la tiutempa reĝimo kondukis al la daŭrigo kaj popularigo de tia rezistado, kaj ke la bando ne trovis la saĝon ŝanĝi sian agadmanieron kiam la sociaj kaj politikaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis, tio faras el ĝi nun la lasta spuro de la diktaturo en la hispana socio.

**Toño del Barrio**

# Pri faŝismo

**Provo klarigi kio estas faŝismo.**

Antaŭ kelkaj jaroj, dum SAT-Kongreso la membroj decidis, ke SAT devas esti malferma al ĉiuj ideoj krom al faŝismaj ideo kaj ideologio. Eble la sekva teksto klarigas, ke la membroj de SAT pravas?

Mia unua ideo estis verki ion pri la nuna nov-faŝismo en Eŭropo. Pere de interreto mi komencis serĉi ĝisdatajn informojn pri nov-faŝismo kaj ho vee, mi trovis ne nur informon pri nov-faŝismo, sed multegajn paĝojn de faŝistaj grupoj kaj agadoj. Faŝismo! Imagu nun! Kaj tio, malgraŭ milionoj kaj milionoj da mortintoj en koncentrejoj de la nazia Germanio, vivas kaj floras, kvazaŭ ĝi estus la plej humana mondkoncepto, kiu ekzistas.

Mi unue volis paroli pri faŝismo, sed mi fine rezignis pri la temo. Pri kio mi ja volas paroli estas pri la kaŭzo, kiu nun direktas homojn al faŝismo, kaj tiu kaŭzo estas laŭ mi naciismo kaj pli precize ekstrem-naciismo. Ni tamen komenĉu unue difini, kio estas faŝismo, por ke ne ekzistu duboj pri la ideo kaj koncepto. Laŭ specialistoj pri la temo, la vorto faŝismo havas 3 malsamajn signifojn. Plej konata estas la originala, la itala faŝismo. Faŝismo estas la nomo de la ekstremnaciisma movado, kiu reĝis inter 1922 ĝis 1943 Italion kaj kies gvidanto estis Benito Mussolini (1883-1945).

Benito Mussolini estis unu el la gvidaj figuroj en la revolucia branĉo de la socialista partio de Italio. En la jaro 1912, kiam li aĝis 29 jarojn, li iĝis redaktoro de la gazeto de la socialista partio Avanti, sed kelkajn jarojn poste, en la jaro 1914, la pacifista plejmulto de la partio forigis lin el la partio pro la propagando, kiun li faris, por ke Italio partoprenu la Unuan Mondmiliton. Post tiu tempo Mussolini komencis politike agadi, laŭ propra ideo, kiel sola persono kiu pravas, kiel sola persono, kiu povus savi Italion de la pereo. Neniu, li diris, povas gvidi la italan popolon pli bone ol li.

Dum la ribeloj kiuj trafis ankaŭ Italion post la Unua Mondmilito, faŝistaj batalrotoj de Mussolini partoprenis en la "rebonigo, resaniĝo de la ordo". Kiel ĉampionoj en kontraŭbatalado de komunismo, la faŝistoj eniris la italan registaron kaj ekde tiam la partio nur kreskis, precipe dank'al la talento de Mussolini, kiu estis tio, kion oni nomas nun bonega merkatisto. Dank'al la Marŝo al Romo, en kiu partoprenis plurdekmiloj da homoj, li iĝis tre populara politikisto, kaj iom poste la faŝistoj regis Italion. Opozicioj iĝis malpermesataj kaj kontraŭantoj de la sistemo malliberigataj.

Politikaj murdoj estis parto de la ludo kaj rapide Italio estis plene en la ungegoj de unu partio, unu gvidanto, la faŝista partio kun, ĉe-kape, Benito Mussolini.

Kiel dirite, merkatesploro estis la sistemo, kiu kreskigis la potencon de la partio, kaj ----- la trukoj kaj elokventeco de la gvidanto, evidente.

Komenciĝis pluraj publikaj laboroj, kiel plibeligo de la stratoj kaj placoj, kaj ĉio kun la necesa propagando kaj bruo. Tamen la italoj vidis nur la plibeligon de la stratbildo kaj ne la aĉan politikon de la faŝistaj gvidantoj.

Italio, diris Mussolini, devas reiri al la tempo de la malnova Romo. La Mediteranea Maro devis esti denove 'Mare Nostrum', Nia Maro. Necesis do ankaŭ militoj, kaj en 1935 Italio atakis Abisenion, la nunan Etiopion, kaj je la sama periodo Mussolini komencis kunlaboron kun la alia politika frenezulo, Adolf Hitler, ankaŭ persono, kiu uzis merkatesploron kiel plej gravan ilon por konvinki la germanan loĝantaron pri siaj valoroj kaj la neceso protekti la propran popolon.

Hitler multe plivalorigis la propran popolon kaj kreis imagon, ke nur la germana popolo estas la plej alta el ĉiuj popoloj, 'la supera raso'.

Kial tiu faŝisma movado povis havi tiom da subteno, jen bona demando. Laŭ Georges Sorel, franca inĝeniero, kiu metis siajn pensojn sur paperon, ni devas pri tio kritiki Karl Marks. Marks, verkinto de "La Komunista Manifesto", sed precipe konata pro siaj libroj pri ekonomio, faris laŭ Sorel grandan eraron, ĉar li ne antaŭvidis, ke "revolucio okazas en tempo de morala regreso", kiu povas direkti al "reirado al pasinteco kaj eĉ socia konservativeco kiel idealo".

Post la Dua Mondmilito, faŝismo kiel politika koncepto preskaŭ plene malaperis, sed ne por ĉiam.

La vera populareco de faŝismo troviĝas en tio, ke ĝi donas simplajn respondojn al komplikaj problemoj. Faŝismo bazigas grandparte sur reakciaj, konservativismaj pensoj kaj sur iu natura pigreco, kio signifas: "la homoj malŝategas ŝanĝojn". Faŝismo, same kiel ekstremdekstro, kiuj povas vivi unu apud la alia kiel gefratoj, promesas protekton de la lokaj valoroj, laboro kaj kulturo. Iom strange estas, ke Esperanto, kiu laŭ mia kompreno devas esti tutmonda ilo por havi kontaktojn sennaciajn, grupigas ankaŭ homojn kun ekstremnaciaj ideoj preskaŭ faŝismaj.

Konkluda koncepto pri faŝismo estas, ke la malsamaj formoj de faŝismo havas komunan idearon - gvidlinion. La ideoj datiĝas grandparte el la 19-a jarcento, kaj devenas de homoj, kiuj kontraŭis la valorojn 'Libereco, egaleco kaj frateco' el la franca revolucio

de 1789. La moderna, do post-franca-revolucia socio ricevis el certa angulo fortegan kritikon, ĉar ĉi tiu moderna socio laŭdire detruas la ligojn inter homoj. La ligoj inter popolo, raso kaj familio. Faŝismo mem uzas ekde la komenco la plej modernajn propagando-teknikojn kaj ilojn. Kiel jam dirite, merkata esploro estas plej verŝajne la plej grava ilo de la faŝistoj por fari paŝojn antaŭen, krom evidente perforto, kiu ankaŭ ĉiam estas parto de la sistemo.

En la nuna kunteksto faŝismo ne plu estas nur politika partio aŭ politika ideologio, sed esenca kvalito de la faŝismo estas ĝia ekstremnaciismo kaj la imago, ke necesas decida agado por savi landon de laŭdire minacanta katastrofo.

Dum esploroj, kiujn mi faris prepare al ĉi tiu prelego, mi trovis en interreto plurajn tekstojn, kiuj parolas pri maldekstra faŝismo, sed mi pensas, ke en la limigita tempo, kiun mi havas, ni ne povas enprofundiĝi en la diversaj formoj, en kiuj faŝismo aperas. Nur tial mi proponas, ke ni povu koncepti la ideon faŝismo kiel mi diras; ĉiu formo de perforta altrudado de ideoj kaj konceptoj al homoj kaj socioj. Faŝismo do povas trovi fekundan grundon nur en kapitalisme strukturitaj socioj kaj sistemoj, kaj kapitalismo en ĉiuj formoj, ĉu la nov-liberala kapitalismo aŭ iu formo de ŝtat-kapitalismo. Jen vidu, eble mi jam nun povas fini la tekston, ĉar plej verŝajne ni jam havas sufiĉe da diskuttemoj por plenigi sekvan Sennacieca Revuo. Tamen permesu, ke mi daŭrigu.

Mi ne daŭrigas pritrakti nur faŝismon. La kialo estas, ke dum esploro mi konstatis, kiel malfacila estas la temo, kaj pro malzorga esplorado mi povis fari tro da eraroj, kiuj alportas nur damaĝon al ideoj, kiuj povus aspekti esti parto de faŝismo, sed ne estas.

Antaŭ nelonge mi aĉetis libron de la usona universitata profesoro Robert O. Paxton pri “La anatomio de la faŝismo”. Li uzis 40 jarojn por esplori kaj kompari ideojn por verki sian libron. Tio nur montras, kiel komplika la materialo estas.

Oni povas fari al si demandon: kial nun, post la kruela Dua Mondmilito, iu formo de faŝismo daŭre povas ekzisti, kaj kiu kulpas pri la preskaŭ feniksa elcindriĝo de faŝismo? Ankaŭ al tiu demando respondo malfacilas, sed permesu, ke mi prezentu mian tezon pri unu el la kialoj.

Laŭ mi, unu el la cefaj kialoj de la reapero de faŝismo en la mondo estas la ekzisto de ekstrem-naciismaj partioj, la reapero de ekstrem-dekstraj ideoj.

Kutime homoj volas indiki aliajn homojn aŭ grupojn, donante al ili etikedon. Ekzemple, neniu kontraŭdiras, ke la Civito estas reakcia asocio, kiu iom inklinas al formo de naciismo, naciemo en strukturo kaj penso. Mi nun ne kritikas, mi nur indikas la lokon. UEA estas sendube konservativa asocio, kiu, kvankam laŭstatute ĝi devas disvastiĝi Esperanton, ankaŭ havas grandan grupon de aktivuloj, kiuj batalas por protekti lokajn lingvojn sub la devizo protekto de lingvaj rajtoj (?). SAT havas la etikedon esti progresema maldekstra asocio, laŭ kontraŭantoj tro fanatika en tiu direkto.

Mi povas vivi kun la ideo, ke SAT estas progresema maldekstra asocio, kaj mem ankaŭ uzas ĉi tiun etikedon por montri la vojon, kiun SAT sekvas. Progresigi la mondon kaj la homojn. Ĉu tio signifas ke ni SAT-anoj devas kritiki la etikedon de UEA, la konservatismon? Mi opinias: Ne! Ankaŭ konservativismo havas sian ekzistokialon. Sen konservatismo ne povas ekzisti progresemo. Sen jino ne ekzistas jango.

Mi legas nun en libro de la nederlanda profesoro Andrea Kinneging, ke laŭ li la agado de politikaj partioj de Verduloj, kiuj protektas la naturon, estas agado de konservativismo. Vi tuj rimarkas, ke ni havas pri tio iun kolizion de konvencio pri vorto. Li klare uzas la vorton konservado, kiel: teni ion kiel ĝi estas. Male al tiuj, kiuj en konservativismo vidas la rifuzon al progreso. Jen parto de la problemo de universalisma penso rilate al ideoj kaj vortuzo.

Kvankam mi neniam volas fari proceson kontraŭ alia asocio kiel Civito kaj UEA, mi tamen volas atentigi vin pri kelkaj problemoj, kiuj povas endanĝerigi Esperanton generale. La batalo, kiun UEA faras rilate la protekton de la lingvaj rajtoj de etnoj kaj lokaj kulturoj. Ofte mi havas la malagrablan senton, ke ili preterpasis la laŭstatutajn celojn de la asocio. Mi faras al vi la demandon: ĉu tiuj etaj lingvoj nepre bezonas esti konservataj por la estontaj generacioj, eĉ kiam neniu plu havas intereson pri ili? Ĉu la batalo valoras? Mi mem ne volas doni respondon pri tio, tamen havas evidente mian opinion. Demando estas, ĉu entute eblas konservi tiujn lingvojn.

En 1889 Emille Vandervelde, nederlandlingvano kaj tre eminenta belga socialisto, pledis en la Ĉambro, ke oni akceptu la socialistan programon: “Egaleco de ĉiuj lingvoj, kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj”! Ĉi tiu ideo kaj lukto estas grava batalkampo kaj laŭ mi la sola serioza bazo por diskutigi pri lingvo kaj ĝia uzado. Evidente la sekvo estas, ke ni devas en tiu kazo elekti ponto-lingvon. Imagu, ke ĉiuj lingvoj havus la samajn rajtojn en ĉiuj landoj. Ke homoj libere povas elekti la lingvon, kiun ili volas paroli. Nun la ekstremnaciistaj grupoj kaj politikaj partioj postulas, ke enmigrantoj tuj lernu la lokan lingvon, por ke ili adaptiĝu. “Egaleco de ĉiuj lingvoj, kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj”! Jen la sola solvo por la monda lingva problemo, sed bedaŭrinde la aktivuloj el UEA ne defendas tion, sed ili defendas la lingvajn rajtojn de la ekstrem-dekstraj grupoj. La koncepton “lingvaj rajtoj” tamen defendas unuavice maldekstremuloj kun forta inklino al kulturisma kaj etnisma pensado; En Belgio estas Jef Van Extergem maldekstrulo kaj komunisto la plej bona ekzemplo ankaŭ la tre konata verkanto Louis Paŭl Boon. Jes, estas

kelkaj ekstremdekstruloj, kiuj aktivas tiukampe, sed ili certe ne estas la plej forta grupo. Io alia estas ekzemple la lingvonaciismo: tie oni efektive trovas kelkajn ekstremdekstrulojn.

Tiu lingvo en tiu reĝiono, adaptiĝi al la loka normo. Pardonu, sed mi ne partoprenas la batalon. Kio estas la sekva paso --- adaptiĝi al la loka kulturo, al la kutimoj de la lando? Per tio ni iom eniras la vojon de rasismo. Mi esperas, ke almenaŭ en SAT ni pretas defendi al ideon de Emille Vandervelde, kiu donas al ĉiuj lingvoj ie ajn parolataj la samajn valorojn kaj rajtojn.

Montrigas jam dum kelkaj jaroj, ke UEA ne kritikas membrojn, kiuj sub flago de defendo de la loka lingvo, eniras la vojon de ekstremdekstrismo. Laŭ mi tre malbona evoluo, kiu povas alporti dum certa momento grandan damaĝon al Esperanto kiel tuto. Evidente oni apartenas nun al la populara grupo, kiam oni krias pri lingvaj rajtoj, precipe kiam oni transprenas la sloganojn de nov-dekstro. Pozitive estas, ke dum parolo kiun mi havis kun la nuna prezidanto de UEA s-ro Probal Dasgupto, mi aŭdis novajn ideojn rilate tiu protekto de loka lingvo. Mi esperas ke li povas konvinki la membrojn de UEA ke disvastigado de Esperanto estas la ĉefa celo de UEA kaj ne protektismo de lokaj dialektoj kaj lingvoj.

En 1989 malaperis la Berlina Muro kaj kun ĝi la komunismo de la sovetlandoj. Multaj komunistoj aŭ simpatiantoj de la komunismo el Ruslando seniluziiĝis kaj deturnis sin de la politiko. Aliaj vidas en la falo de la rusa komunismo la komencon de iu nova tempo kun rehavo de malnovaj valoroj, kiel propagandate de la jam ekzistantaj partioj kiel Front national en Francio (1972), Vlaams Blok en Belĝio (1977) kaj la denove kreskanta Freiheitliche Partei Österreichs (FPÖ) de Jorg Haider (1956).

Fakte, por multaj homoj la falo de la rusa komunismo estis ankaŭ la falo de la progresema politiko-idealo. Dank' al miaj kontaktoj en Esperantio mi scias, ke dum la sovetunia versio de komunismo, kiu en la lando, kie mi logas, Belĝio, estis progresema pensado kaj politiko, ĝi estas por multaj logantoj de la rusaj satelitoj reakcia kosmaro. Pere de gigantaj propagandaj maŝinoj oni konvinkis la homojn, ke la rusa revolucio estis plena katastrofo, ke nur kapitalismo povas alporti feliĉon al la homaro, kaj kiel ĉiam post lerta propagando la popolo kredis la demagogion.

En la komenco de la 70-aj jaroj, la mondo suferis pro la naftokrizo, tuj sekvita de granda regreso de la merkato. En tiu periodo estis pravigitaj la diroj de Georges Sorel, la franca inĝeniero: "revolucio okazas en tempo de morala regreso", kiu povas direkti al "reirado al pasinteco kaj ec socia konservativeco kiel idealo". Mi opinias, ke ni povas nomi la falon de la rusa komunismo formo de morala regreso. Evidente vi, leganto, havas la eblon rebati ĉion, kion mi nun diras. Mi ne rakontas al vi iun neekzistantan absolutan veron, sed nur simplan tezon de laboristo.




Fakto estas, ke post la naftokrizo la plej konataj ekstremdekstraj partioj fondiĝis, kiel ekzemple la Front National de Le Pen, kiu estas kontraŭliberecana, same kiel la FPÖ de Jörg Haider, aliflanke, ni havas la ekstremnaciistajn partiojn kiel Vlaams Blok, nun Vlaams Belang, Lega Nord kaj la malgrandan svisan Lega dei Ticinesi kaj aliajn grandajn kaj malgrandajn politikajn partiojn kaj grupojn. Evidente, la FPÖ jam ekzistis pli frue kaj ĝi fakte estas postrestajo de vera fasisma partio Verband der Unabhänĝigen, kaj estis iamaj nazioj, kiuj fondis la partion en 1949. La populareco de la partio tamen kreskis nur post la falo de la berlina muro kaj la apero de Jörg Haider kiel gvidanto.

Mi scias, ke mi tro limigas mian tekston al partioj el Eŭropo, sed pardonu min, ĉar por fari pli grandan studon pri la problemo, ekzemple pri aferoj, kiuj okazas en aliaj kontinentoj, mankis al mi tempo.

Kion la malsamaj partioj havas komunan?

La ekstrem-dekstra familio, ni ja sen problemoj povas uzi ĉi tiun esprimon, havas kiel rekonilon, ke ili estas ĉiuj rasismaj, ksenofobiaj, kontraŭdemokratiaj, ekstremnaciismaj kaj favoraj al tre forta ŝtato. Jen jam vidu la ideojn kompareblajn kun la faŝismo de Mussolini, sed estas pli.

La ekstrem-dekstraj politikaj partioj havas tre firman strukturon kaj uzas ĉiujn demagogajn diskursojn.

Post la Dua Mondmilito ekzistis tri sinsekvaj ondoj de ekstrem-dekstraj partioj. Tuj post la milito fondiĝis novnaziaj kaj novfaŝismaj partioj kiel la Movimento Sociala Italiano (1945) kaj la Verband der Unabhänĝigen en aŭstrio(1949).

La dua ondo estis la tiel nomataj pujadismaj protestaj partioj. La nomo referencas al la franco Pierre Poujade, kiu en 1956 havis 12% de la voĉoj

dum balotrondo en nacia elekto. Ili estis kontraŭimpostaj partioj ekstremliberalaj, sed neniam ili estis vere signifo-plenaj partioj, kiuj sanĝis la politikan pejzajon. La tria ondo estas la naciaj demagogaj protest-partioj kiel Front National, FPÖ kaj Vlaams Belang. Oni priskribas ĉi tiujn partiojn kiel postindustriajn sociajn partiojn.

Krom la ekstrem-dekstraj partioj ni havas asociojn kiel la hispanan, Rondon Hispanio de amikoj de Eŭropo. Oriĝine ĝi estis asocio de entreprenistoj, sed iom laŭ stranga formo. Jam ek de la komenco ĝi havis fortan ligon kun faŝismo kaj ekstremdekstro. En 1960 fondiĝis CEDADE kiel kultura asocio. Dum la Franko-reĝimo la asocio povis sen problemoj kreski kaj malferme montri sian admiron al Hitler kaj subteni la naziajn ideojn de la hitlera Germanio. CEDADE rapide ludis gravan rolon, helpante eksnaziojn trovi kaŝlokon. La plej forta kerno estas la Falanĝistoj, sed ankaŭ germanaj eksnazioj, italaj faŝistoj kaj iamaj hispanaj orientfrontaj soldatoj plifortiĝis la asocion. CEDADE ekhavis rapide la reputacion de internacia nazia reto, kiu organizis trejnadkunvenojn por junuloj. Unu el la plej gravaj gvidantoj de la unua horo estis Otto Skorzenzy. Iama SS-komandanto, kiu liberiĝis Benito Mussolini el la malliberejo en 1943. Otto Skorzenzy zorĝis, ke militkrimulo Auke Pattist libere povis vivi en Hispanio. Pattist estis policisto, kiu gvidis plurajn raziojn kontraŭ judoj en Amsterdamo. Poste li aniĝis al la Waffen SS.

Pattist krome respondecis pri la aresto kaj persekuto, torturado kaj malapero de multaj rezistantoj. Alia amiko de Pattist estis Leon Degrelle, la belga-valona gvidanto de la Rex-partio kaj cefo de la valona branĉo de SS. Degrelle ĝis la morto neis la ekziston de la Holokaŭsto. Ek de 1993 la asocio estas oficiale malfondita, kaj pluraj el la gravaj anoj iris al la politika familio de Aznar, la Partido Popular.

Mi pensas, ke ni povas diri, ke nun en la tuta Eŭropo la disvastigado de la ekstremnaciismo kaj ekstremdekstra idearo kreskas kaj floras. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi vizitis Francion, neniu havis la kuragon diri, ke li subtenas Le Pen kaj la Front National. Same en Belĝio, mi faris al mi demandon, kial mi neniam parolis kun subtenanto de Vlaams Blok, kvankam la partio havis tian forton, ke unu kvinono de la antverpena loĝantaro voĉdonis por Vlaams Blok. Nun, kaj tiel estas ek de la komenco de la nova jarcento, la homoj ne plu hontas esti subtenantoj de ekstremnaciaj kaj ekstremdekstraj ideoj, eĉ en Esperantio, eĉ pli --- pluraj fieras pri tio.

Plej granda problemo nun estas, ke oni iomete volas mildiĝi la dangeron, kiu fontas el la ekstremaj ideoj. Ni ja devas protekti propran merkaton, ĉu ne? Almenaŭ tion propagandas la ekstremistoj de dekstro.

Jes, sed ---- kio pri monda solidareco, kion ni faros per tio? Jeti en rubujon, karaj legantoj?

Mi tro ofte aŭdas homojn, kiuj diras, ke tiuj fremduloj devas adaptiĝi al nia kulturo? Mia demando estas: Ĉu diable ni estas la supera raso kun la supera kulturo? Ĉu vere homoj ne kapablas akcepti aliajn homojn kiel ili estas, ĉu vere ni ne povas montri respekton por aliaj kulturoj kaj ideoj, eĉ se iu volas alporti ilin en la kvartalon, kie vi logas.

Diris al mi ano de Vlaams Blok: ĉu vi povas akcepti, ke oni buĉas ŝafon sur la korto de la domo? Kion mi respondas, vi pensas? Ke mi ankaŭ ne akceptas, ke oni buĉas ŝafon en la buĉejo, ĉar mi estas vegetarano. Mi klopodas akcepti la homojn kiel ili estas. Permesu tamen, ke mi malakceptas ekstremdekstrajn ideojn kaj faŝismon cirkaŭ mi. Buĉi ŝafon sur la korto aŭ en buĉejo estas terura afero dependanta de la manĝo-maniero de homoj kaj de la kulturo, al kiu oni apartenas, sed dividi homojn laŭ kulturo, laŭ koloro, laŭ deveno kaj sekso ne plu estas parto de iu humanisma socialisma penso. Mi diras eĉ pli, ke ĉi tiuj ideoj ankaŭ ne akcepteblas en rondo de konservativisma penso.

Naciismo kaj certe ekstremnaciismo estas dekstra aŭ ekstremdekstra ideo. Maldekstra naciismo apenaŭ ekzistas. Tamen ĝi ekzistas, ekzemple en Venezuelo. Ankaŭ en europaj landoj, kie ĝi kutime aperas miksite kun "kontraŭimperiismo". Sed vere estas ekzemploj maloftaj. La naciismo de Stalin ne estis maldekstra naciismo, ĉar Stalin estis reakciulo, dekstrulo, faŝisto komparebla kun Mussolini kaj Hitler. Robert O. Paxton, la verkanto de la libro " La anatomio de la faŝismo", bezonas preskaŭ 300 paĝojn por klariĝi, kio faŝismo fakte estas kaj kio ne. Do vi komprenu, ke mi en la tempo-daŭro de ĉi tiu teksto ne rapide povas doni ekzaktan kaj klaran difinon pri la faŝismo, sed kredu min; homoj kiel Stalin estis same faŝismaj en siaj pensoj kaj agadoj kiel Mussolini. Kial mi kuraĝas diri, ke naciismo




kaj certe ekstremnaciismo apartenas al la dekstra idearo? Nu, mi jam antaŭ kelkaj jaroj skribis pri tio kaj jam preleĝis, mi ne plu memoras kie, pri la temo. Dum maldekstraj diskutoj pri naciismo oni de tempo klopodas vuali naciisman ideoloĝion per la vortoj "maldekstra naciismo", kaj la ideo estas fari diferencon inter ksenofobia naciismo kaj naciismo subtenata de maldekstruloj. Ĉi tiu "progresema naciismo" havus aldonajojn kiel toleremon, liberecon kaj egalecon. Do,

samaj valoroj, kiujn uzas liberalaj naciistoj, valoroj, kiuj estus diferenco inter ĝusta kaj malĝusta naciismo. Tamen, la historio montras al ni, ke ĉi tiu "maldekstra naciismo" nek estas necesa, nek estas ebla. Ni devas akcepti, ke ni difinas dum la historio, iom krude, 5 periodojn de malsama signifo kaj politika koloro de la ideo naciismo. Inter verkado de la teksto pri maldekstra naciismo kaj la nuno pasis jam 5 jaroj, se mi bone memoras, kaj intertempe la temo daŭre okupis miajn pensojn. Mi relegis, kion mi skribis antaŭ pluraj jaroj, kaj sanĝis eĉ ne epiteton.

Ni, laŭ mia kompreno, povas akcepti, ke koncepto "nacio" kaj naciismo fontis el la Franca revolucio. Dum la komenca tempo, la koncepto nacio estis uzata kune kun ideo de demokratio. Potenco al popolo aŭ nacio estis progresema slogano, kiu kontraŭstaris la feŭdan sistemon. Certe, komence "nacio" protektis interesojn de popolo kaj ligon al lingvo, kulturo, kaj etnismo estis preskaŭ sen signifo. Dum la dua fazo, post 1870, ni vidis naciismon bazitan sur etnismo. Plej verŝajne troa etnismo direktis al la Unua Mondmilito? Post la Unua Mondmilito, ni eniris trian fazon, dank'al la "Wilson-doktrino". Laŭ ĉi tiu doktrino, ĉiuj popoloj devas havi memdeterminon (decidrajton pri si mem), kaj pro tio rajton al propra ŝtato. Dum longa tempo ĉi tiu principo estis la esenco de liberal-naciismo. Dum ĉi tiu fazo, naciismo liĝiĝis al faŝismo kun kiel rezulto la Dua Mondmilito kaj buĉado de milionoj da judoj, ciganoj, gejoj kaj politikaj malamikoj. La kvara fazo, post la Dua Mondmilito, estis karakterizita de ideoloĝia superrego de la maldekstro, kiu ec direktiĝis ĝis koncepto, ke naciismo povus esti maldekstra ideoloĝio, plej verŝajne pro manko de dekstra konkurenco. El tiu tempo, ni memoras pri sinsekvaj naciaj liberigo-bataloj en Sud-Afriko, Afriko kaj Azio.

Nun ni troviĝas en la kvina periodo. Post la falo de la "berlina muro", eĉ iom antaŭ ĉi tiu tempo, la influo de maldekstra ideoloĝio rapide malaperis. "Nova dekstro" konfuzigis per sia kontraŭ-usonismo kaj siaj enmiksajoj en kampanjoj de solidareco kun liberigo-batalantoj. Ili fakte transprenis la rolon de maldekstro, kiu entute perdis la fadenon post la malapero de ŝtatkapitalismo en la iama Sovetio. Estas tempo, ke ni decidu, ĉu maldektra naciismo havas sencon, ĉu eblas, ĉu necesas?

Indas la peno montri, ke pro institucioj de sklaveco, edziniĝo, socia klaso kaj ŝtato, necesis unuaj ideologioj de rasismo, rolo de seksoj, klaselitismo kaj naciismo kiel pravigo de ĉi tiuj institucioj. Historio instruas nin, ke naciismo estas eltrovaĵo de reganta klaso. "Nacia idearo" ekviviĝis pro volo de malgranda elita klaso de intelektuloj antaŭ kelkaj jarcentoj. Ni ne povas miri, ke naciismo estas ideologio servanta al reganta klaso de blanka, aliseksema viro. Ili eltrovis nacion. Normoj kaj valoroj de nacio estis patriarkaj, aliseksemaj kaj kapitalismaj, ĉiuj normoj kaj valoroj de elito. Mito de nacia unueco plifortiĝis la potencon de ŝtatestroj kaj ilian potencon postuli impostojn kaj fari militojn. Krome, ĝi estis drasta rimedo kontraŭ klasbatalo, socialismo kaj virinismo.

La fakto, ke naciismo kaj nacioj estas mitoj, eltrovataj kaj aplikataj de reganta klaso, malebligas al ni, ke ni subtenu naciismon kiel liberigo-ideologion. Maldekstraj naciistoj transprenas al naciismo liĝitan konceptkadron, pro kiu ili apenaŭ povas eviti analizi la mondon per terminoj antaŭviditaj de kontraŭuloj. Laŭ naciistoj, virinoj en "nacio" devas plenumi specian rolon. Nacio estas en naciaj metaforoj "fekunda patrinejo" protektata de fortaj viroj. Soldatoj kaj futbalistoj defendas la honoron de patrio. Nacio ebligas al viro senti superecon al virinoj. Virinoj reproduktas pere de siaj posteuloj biologian simbolon de nacioj. Maldekstro devas kompreni, ke kiam ĝi subtenas idearon de nacio kaj naciismo, ĝi helpas al nova dekstra strategio de grupoj, kiel la sufiĉe konataj ekstremdekstraj politikaj partioj, akiri leĝitimecon kaj akcepteblecon por siaj faroj kaj agoj. Terminoj "libera" kaj "klerisma" havas tute alian signifon ĉe dekstro ol ĉe maldekstro, kaj ni neniam forgesas tion. Mi ne povas malaperigi el mia kapo, ke nacio estas koncepto de dekstraj regantoj, kaj plej verŝajne rasismo, ekskludado kaj genocido estas nedisigeble liĝitaj al la ideo naciismo.

Okcidenta naciismo ne estas la samo kiel "maldekstra liberigo-naciismo" aŭ "emancipa naciismo" en malricaj landoj. Same kiel en la virina batalo, emancipiĝo ne estas fina celo. Liberigitaj sendependaj kolonioj povas atingi lokon en la kapitalisma mondo nur, kiam ili mem subpremas kaj profitas kiel okcidentaj landoj, do nacia liberigo-batalo ne povas estis celo por si mem. Maldekstrularo ĉiam devas starigi al si la demandon, kial tiun aŭ tiun liberigo-batalon necesas subteni. Ĉu rilatas al sendependiĝo kiel paŝo al socia batalo, aŭ ĉu ni simple subtenas batalon de naciistoj? Ĉu batalo kontraŭ apartismo en Sud-Afriko alportis plenan liberiĝon al ĉiuj enloĝantoj en ĉi tiu lando, ĉu subteno al batalo de ANC estis "bona" maldekstra batalo? Cu ni subtenu ETA-n en Eŭskio kaj batalon de Zapatistoj aŭ la lukton de PKK en Turkio? Ĉu en la tuta nacia kaj naciisma batalo ni retrovas eron de respekto al la individuo kaj ĉu entute ni retrovas eron de maldekstra penso? Fina demando por mi estas, ĉu kiam ni subtenas naciojn kaj naciismon, ni ne samtempe subtenas radikon de kapitalismo?

Vi mem respondu. Mi jam kreis en mia kapo la respondon, mi jam delonge scias, ke naciismo ne estas mia lukto.

Mi respektas, ke vi amas la kvartalon, kie vi vivas kaj la lokon, kie vi naskiĝis. Kiam mi reiros hejmen post ĉi iu kongreso kaj mi revidos la katedralon de Antverpeno, laŭ antverpenanoj la plej bela katedralo en la tuta mondo, same por kredantoj kaj herezuloj, mi scios, ke mi estas hejme. Hejme ne estas iu nacio, sed estas loko, kie vi revidos viajn pa-

rencojn kaj amikojn. Hejme estas la loko, al kiu vi estas ligita per la koro. Hejme neniam povas esti la loko de maltoleremo, de altrudo de kutimoj kaj moroj al vizitantoj, eĉ se ili intencas resti por eterne.

La mondo estas pli bona ol la luno. Mia kontinento superas la kontinenton de aliaj. Mia lando estas pli bona ol la najbara lando. Mia urbo superas la aliajn urbojn en la lando. Mia kvartalo estas la plej elstara de la tuta urbo. Mia strato estas la plej pura kaj plej agrabla de la tuta mondo. Mi estas esperantisto. Cu VERE? For la naciismon. Jes for la naciismon, kiu ne kongruas kun niaj ideoj de progresema maldekstro. For la strukturojn de la potenculoj, de la kapitalismo.

Mi estas granda admiranto de la ideoj de Max Stirner kaj de la ideoj de Friedrich Nietzsche, kiu vere estis genia pensulo. Ambaŭ defendis la individuon. Kelkaj nomas tion individuismo, sed tio estas malĝusta vorto. Individuo ne nepre defendas individuismon. Individuo estas parto de la tuto, de la socio. Individuismo estas defendi la memon sen montri respekton por la socio aŭ la grupo. La fama anarkiisto Max Stirner atentigis nin pri la nova dio, la ekstremnaciismo. Stirner diris jam antaŭ Nietzsche, ke dio mortis kaj la surogata dio estas la nacio.

Kiel multaj inter vi scias, mi vizitis dank'al miaj amikoj el Japanio la landon de la leviĝanta suno, Japanio. Prepare al la vojaĝo mi iom studis pri budhismo kaj tuj vidis grandan kongruecon inter la ideoj de la budhismo kaj la ideoj de la anarkiisto Max Stirner kaj la ideoj de Friedrich Nietzsche. Ĉiuj ili defendis la individuon, sed samtempe metis pezan taskon sur la ŝultrojn de la individuo. La taskon de klerigado, de mem-edukado, de esploro. Ni ne estas ŝafaro, kiu devas sekvi blinde iun demagogon kaj demagogajn ideojn. Ni estas individuoj, kiuj devas krei al si mem bildon pri la sekvota vojo. Kiel ni povas postuli respekton, kiam la lando, en kiu ni vivas, estas regata de naciistoj, tiel ke ĝi estas sub demagoga influo de nacia katenigo?

Kiam ni rigardas al la "bonaj naciistoj", do mi nun ne parolas pri tiuj fanatikuloj de Vlaams Belang, Front National ktp, sed pri homoj, kiuj pensas, ke iu nacia strukturo necesas. Ankaŭ pri tio mi faris iom da esploro kaj povas konkludi nur, ke en iu formo de naciismo migrado ne eblas sen invito de la nacio mem. Do kiam en la 40-aj kaj 50-aj jaroj Belĝio bezonis laboristojn por la karbominoj, enmigrantoj el Italio kaj Hispanio estis bonvenaj. Kiam en la 60-aj jaroj mankis laboristoj por fari la plej malpuran laboron, enmigrantoj el nordafrikaj landoj kaj el Turkio bonvenis, sed diris kaj diras la naciisto, ke kiam la plumbisto finis la laboron, li devas forlasi mian domon. Tiel naciistoj rigardas al sia lando, kiel propraĵo, kiel propra domo. Ili naskiĝis tute hazarde en iu lando kaj pensas, ke tio donas al ili la rajton de posedo. La teron ni ĉiuj posedas kaj ankaŭ ĉiun terpecon, kaj kiam ni ne pensas same pri tio, ia formo de solidareco, kunlaborado kaj komuna agado, nomu ĝin klasbatalo se vi volas, ne eblas. Por la naciistoj ĉiu devas resti en la propra regiono, la hispanoj en Hispanio, la turkoj en Turkio ktp, ktp.

Mi vere klopodis trovi iun pozitivan eron en naciismo, sed ne trovis. Mi aŭdas en la lando, kie mi logas, ke homoj parolas pri Ni flandroj, sed pardonu min, karaj amikoj, mi ne scias, kio estas tio: "Ni flandroj". Kion mi havas komunan kun homoj el Oostende, urbo pli ol 100 km for de mia domo. Kion mi havas komunan kun homoj el Arlon, urbo pli ol 100 kmojn for de mia domo. La samon kiel kun homoj el Nov-Jorko aŭ Kaapstad. Ili estas ĉiuj homoj kun la samaj rajtoj, sed ankaŭ kun la samaj devoj kiel mi. Ili ne estas pli karaj al mi pro la fakto, ke ili naskiĝis en la sama politika kaj historia strukturo kiel mi. Kion vi diras? Ke ili parolas la saman lingvon. Nu la malsameco de la dialektoj estas tiel granda, ke ni nur pere de uzado de komuna lingvo povas kompreni unu la alian. Bedaŭrinde ĉi tiu komuna lingvo ne jam estas Esperanto.

Jen denove mi diras, ke naciismo estas dekstra, eĉ ekstremdekstra ideo, kiu ligas homojn al iu potenco, al iu strukturo, kiun ili ne povas mem elekti. Mi povas imaĝi, ke homoj inter vi nun demandas sin: kaj kion fari nun, ĉu mi ne plu rajtas ami la lokon, kie mi logas. Mia respondo certe estas klara al vi. La tago post la SAT-kongreso mi iros hejmen al Antverpeno kaj kiam mi proksimigos la urbon, mi vidos la katedralon kaj la konatajn konstruajojn kaj tiam mia koro scios, ke mi estas hejme. Mi alvenas en la urbon, kiun mi amas. Mi tiel amas mian urbon, ke mi volas, ke ĝi estu libera al ĉiuj homoj de la mondo. Mi tiel amas mian urbon, ke mi proponas al vi viziti ĝin. Mi neniam volas, ke mia urbo iĝu fortikigita kastelo, nur malferma al iu elito, al samspecanoj, al samideanoj, al nur antverpenanoj, ĉar tio estos la fino de ĉiu progreso, de ĉiu signifo. Mi fieras pri la Antverpeno de milaj kulturoj, pri la havenurbo, kie ĉiu homo estas bonvena. Tial mi hontas, ke en Antverpeno pli ol 30 % de la homoj voĉdonas por ekstremnacia partio. Ili perfortas la identecon de urbo, ĉar urbo estas komuno de ĉiuj, ne nur de la logantoj, sed de ĉiuj, kiuj volas vivi en ĝi.

La lando, kie mi logas, havas kiel unuan regulon en la konstitucio: Ĉiuj belgoj egalas sub la lego. Jen per tio ni montras nian vizagon. La lego egalas por la belgoj, por la valona kaj flandra popolo, ne por homoj. Nacioj kalkulas laŭ popolo --- mi kalkulas laŭ homoj, kaj por mi ĉiuj homoj egalas kaj neniu homo pli egalas ol alia. Kiam iam la nuna regulo de la konstitucio sanĝigos al "Ciuj homoj egalas sub la lego", mi estos kontenta kaj scios, ke ni eniris gustan vojon. La vojon de toleremo kaj respekto.

**jakvo**

# En la interno de la citadelo ĉio estas permesata

### Pri privateco kaj libero

*Moralpredikantoj, toleremkontrolistoj, impostkolektistoj: ili ĉiuj atakas la privatan sferon, kvankam tiu estas la ŝirmejo de la libero*

Libera estas tiu, kiu ne estas atakata. Privateco estas la citadelo de la persona libereco. Ĝi protektas kontraŭ eksproprietigo kaj kontraŭ tio esti metita sub personan kontrolon, kontraŭ sintrudemon kaj kuratorecon, kontraŭ potencon kaj devigon. Al nerajtigitoj la eniro estas malpermesita. La fortikaĵo certigas la memstarecon kaj la memdeterminon. Nedezirataj atakoj estas repuŝataj je ĝiaj bastionoj. La aliro al personaj datenoj estas same barita kiel la aliro al la intimejoj.

Kiel ĉiu libero privateco estas unue negativa. La muroj estas bastionoj kontraŭ eksteraj penentrantoj kaj internaj perfiduloj. Ili estas defendataj per tio, ke oni rezervas siajn sekretojn per tio, ke oni metas barojn al fremdaj enmiksiĝoj, per tio, ke oni forigas ŝtate okupitan terenon por la sociala distanco. La privatulo tre ŝatas distancon. Ĉar homoj ĉiutempe lezeblas, ili ĉiam reciproke povas esti danĝeraj. En la fizika konstitucio de la Homo Sapiens la privateco trovas sian lastan kaŭzon. Kelkaj provas ŝovi alian personon flanken, submeti ĝin, limigi ties moveblecon, direkti ties sentojn, pensojn kaj gestojn, havigi al si ties korpon kaj menson. En ĉiu socio la unuopulo sekve devas defendi sian lokon kontraŭ senrajta enmiksiĝo. La privata sfero tenas aliajn en sekuriga distanco kaj havigas al la persono ejon en la mondo.

La atakantoj estas multaj. La armeo de la penentrantoj etendiĝas de zorgemaj gepatroj, misfidemaj parencoj kaj scivolaj najbaroj, memnomitaj moralpredikantoj, toleremkontrolistoj, ambiciaj opiniproduktistoj kaj pensmanieraj pedagoj ĝis la kolektistoj de impostoj, policaj spionoj kaj gardistoj de la karitato. Ili ĉiuj volas esti lasataj en paco kontraŭ la liberorajto de la unuopulo.

La citadelo de la privateco ne estas loko de paca konkordo. En libera socio ne regas ĝojebria frateco. Ĉar la persona libero de indivduo finiĝas tie, kie tiu de alia komenciĝas. Apartenas al la paradoksoj de negativa libero, ke oni ĉiam devas batali pri ĝi. Rajtogarantioj ne multe valoras, se aliaj ne akceptas ilin kaj la ŝtato sub la preteksto de la justeco daŭre donas leĝojn por limigi la individuan liberon. Sekretoj do devas estis sekurigitaj kontraŭ scivolon, privatejoj kontraŭ penetrantojn. Al interne la muro devas esti defendata kontraŭ ribeloj de individuoj. En la privateco muĝas ankaŭ la kverelado de la genroj, de gefratoj kaj generacioj. Ne malofte ili serĉas plifortigon ĉe aliancanoj transe de la digo. Ili malfermas la pordojn, vokas pri jura subteno aŭ partian reguladon, kaj de tempo al tempo privatuloj mem insistas eksteren, por meti sin koste de la postlasitoj en la helan lumon de l' publikeco kaj por venkigi siajn personajn interesojn en la publikeco.

Al la plej grandaj malamikoj de la libero apartenas apud la potenco ankaŭ la socia densiĝo. Ĝi rezultiĝas el la grado de integreco de la socio. Kie ĉiu konas ĉiun, privateco apenaŭ plu rezerveblas. Tiom longe, kiom homoj vivas en fermitaj grupoj kun forta interligiteco, ekzemple en fore situanta vilaĝo aŭ en prizono, iliaj rilatoj estas malvastaj kaj bone kompreneblaj. Tamen internuloj kaj interniĝintoj pagas sian reciprokan konfidecon per la perdo de sia libero. Nenio restas kaŝita al la atentemo de la najbaroj, de la parencaro, de la komunumo. Ĉiu neleĝa agado kontraŭ moralo kaj etiketo tuj estas registrata.

Nur se la distancoj pligrandiĝas kaj la movebleco pliiĝas, kreskas ankaŭ la liberoj. Hastaj renkontiĝoj inter fremduloj ŝparas al la unuopulo intensajn prezentojn de sia interna vivo. Lia personeco ne gravas, lia socia stato estas sen intereso, lia rango ofte eĉ ne ekkoneblas. Anonimeco por la protekto de la privateco ne estas malhavebla. Sur la vilaĝa strato renkontiĝas homoj, kiuj reciproke konas sin. Tute alias la iro tra centro de urbego. Multaj moviĝas senvorte tra la magazenaj stratoj, serpentumas tra la amasoj, taksas rapide la tre fremdajn figurojn, kiuj rapidas renkonte al ili. La paroltemoj inter fremduloj estas limigitaj. Oni povas demandi pri la horloĝa tempo aŭ la vojo, eble eĉ pri la vetero. Nur vizitanto el la kamparo rakontas dum tiu okazo, kiun li intencas viziti kaj kial li ne scias la vojon. Tiu vizitanto nuligas la anonimecon, ĉar la vizitanto timide serĉas en la malagrabla fremda ĉirkaŭejo signojn pri konfideco.

La historia loko de la moderna privata sfero estas la granda urbo. Ĉi tie la kontrasto de privateco kaj publikeco akre montriĝas. Sur la foirejo por varoj kaj vantecoj ne gravas la individuoj, sed la aĉetantoj de la aĵoj kaj la vendistoj de si mem. Ĉe la interŝanĝo de la valoroj la kliento iras de stando al stando, de negoco al negoco. Neniu devas koni la alian, sed ĉiu povas kontaktiĝi kun iu alia. Sur la foiro moviĝas nekalkuleble multaj privatuloj. Ĉiu rajtas eniri ĝin. De tio la privata loĝejo estas tute disigita. Ĝi estas rezervita nur por la loĝanto. En la propraj vandoj neniu povas preskribi al oni, kion faru aŭ kion lasu.

Nur se privataj aferoj estas plu lasataj al la homoj mem, povas disvolviĝi multflankaj formoj de vivo, kiuj donas al socio kolorojn kaj dinamikon. Sociala multflankeco perdiĝas laŭ la

grado de la ekstera enmiksiĝo. Opiniopremo samniveligas la sintenojn kaj imagojn de la homoj. Preskriboj subpremas la liberan memstarecon, fremda donado de instrukcioj, fremda gvidado, fremda helpo forprenas de la unuopulo la ambicion mem pensi pri elirvojoj kaj uzi la proprajn fortojn. Ĉiu limigo de la libero obtuzigas la energion de la agado kaj rabas al la homoj la bonŝancon kvazaŭ surkontigi por si mem la entuziasmon de la propra laboro.

laj. La ekmiro pri la banalaj preferoj de multaj privatpersonoj baziĝas je la erara intermiksado de libero kaj moralo. Libero ne estas virto, sed la antaŭkondiĉo de ĉiu virto. Sed tiom longe, kiom neniu estas damaĝata aŭ prirabata je sia libero, la privataj aferoj estas tabuo. Kio koncernas la privatulon koncernas neniun alian. Privateco estas – kiel la libero - valoro, kiun homoj ŝatas pro ĝi mem. Ĝi ne estas rimedo por celo, sed memcelo.




Kio ne estas elektita de homo mem, kio limigas kaj gvidas homon, tio ne eniras en la memkonscion de homo. Ĝi estas plu fremda al homo. Por la sociala multflankeco kaj la persona kreskado la libera memstareco estas same nemalhavebla.

Kiel ĉiu libero garantias ankaŭ ne la privateco la morale bonan. En siaj sekretaj karceroj evoluas kelkaj strangaj emoj. La preferoj de la homoj estas malofte valoraj, virtaj, noblaj aŭ be-

Apartenas al la origina rajto de ĉiu ne fari uzon de sia libero. Neniu estas devigita al tio efektive uzi tiun liberon, kiun la privata sfero ofertas. Neniu havas la devon sin certigi memkritike pri siaj deziroj kaj agoj. Neniu estas verdiktita al tio sekvi al siaj talentoj, sin mem realigi aŭ eĉ fariĝi pli bona homo. Estas absolute nepermesebla limigi la privatan sferon, nur ĉar homoj rifuzas strebi al tielnomataj pli grandaj valoroj. Kiu faras nenion el si meritas same tiom da privata li-

bero kiel tiu, kiu celkonscie ekuzas la okazon por la perfektigo de si mem. Individuaj kapabloj ne estas publikaj valoroj. Kiu ne eluzas siajn fortojn ankaŭ ne disipas pro tio publikan valoron. Pli bone ol ĉiu regantaro la homoj mem scias, kio estas bona por ili.

Sub la preteksto, ke estu ja nur por ilia plejbono la moderna ŝtato enmiksiĝas en ĉion, kaj eĉ kontraŭ la eksplicite esprimitan volon de siaj ŝtatanoj. Antaŭzorgo kaj prizorgado estas tamen nur nekonvinkaj promesoj. La ŝtato estas nek ejo de la virto nek morala institucio. Ĝi ne gardas la komunan bonfarton kaj ĝi ankaŭ ne estas fonto de patra ŝirmado. La ŝtato estas aranĝata por regi la civitanojn. Kun la pliampleksiĝo de la registradoj kaj la pliigo de la ŝtatservistoj malpliiĝas la libero de la civitanoj. Fore de ĉiu morala progreso la evoluo de la ŝtato havas nur unu direkton: Antaŭen la subkuratorecigon kaj senposedigon de la civitanoj !

La justeco, kiun la ŝtato asertas efektivigi, bezonas pli kaj pli da leĝoj, la leĝoj bezonas pli kaj pli da ŝtataj oficistoj, kaj la oficistoj bezonas pli kaj pli da mono de la ŝtatanoj, kiuj de la ŝtatservistoj esperas sen pravigo pli kaj pli da justeco. La citadelo de la privateco gardas tial ne nur la civitanojn. Ĝi konservas la ŝtatpotencon de la tento pli kaj etendiĝi anstataŭ okupiĝi pri la ununura tasko, kiun ĝi devus plenumi: la sekurigo de la libero.

*PS: La teksto estas eltiro el la libro: Wolfgang Sofsky, Defendo de la privateco. Disputa skribo. Ĝi aperis en aŭĝusto de la jaro 2007. Eldonejo: C.H.Beck (malferma komerca asocio) 158 p. 14,90 €*

**trad. Donjo & Cezar**

ĈU VI JAM POSEDAS PLENAN ILUSTRITAN VORTARON DE SAT ?

# ESPERANTO KAJ SCIENCO

Praktika aplikado de la internacia lingvo esperanto ne estas tiel simpla, precipe dum la kongresoj kaj sciencaj konferencoj. Nome, diversaj sciencaj fontoj kaj negranda scienca literaturo en unuopaj laborkampoj trudadis la problemon de la lingvo. Jam komence de la 20-a jarcento unu el la plej grandaj filozofoj Ludwig Wittgenstein diris: *La limoj de mia lingvo difinas la limojn de mia mondo*. El tiu ĉi senco venas la konkludo ke en la scienco estas necesa unika lingvo. La unuajn meditojn pri la graveco de internacia lingvo en la scienco ni renkontis sub la egido de la Franca akademio de sciencoj, en unu komuniko titolita *Utileco de la internacia lingvo (Esperanto) por la scienco*. Sekvis deinde unu letero kun la subskriboj de akademianoj kiu Internacian ligon de akademioj avertas pri granda utileco kiun "la scienco povus havi de la enkonduko de internacia lingvo de d-ro Zamenhof".

La manko de internacia lingvo faras grandan problemon en la sciencaj studoj kaj ĝiaj pli altaj atingaĵoj. Nome, tre granda signifo por la homara progreso estas rezultoj de kunlaboro inter mondaj scienculoj. En la serio de iliaj ofte ne tiom grandaj kontribuoj elkreskas grandgrajnaj sciencaj eltrovaĵoj. Per tio ni ofte prezentas la argumenton ke esperanto povas trakti kaj esprimi ĉiujn aspektojn de la homa kulturo same bone kiel aliaj lingvoj.

Dum la unua jardeko de la pasinta jarcento, samtempe kun la konstituo de la internacia Esperanto-movado, inter scienculoj-esperantistoj oni sentis la bezonon de sia aparta organizaĵo. La unua tia kunsido de scienculoj-esperantistoj okazis dum la Dua monda kongreso de esperantistoj en Ĝenevo (1906). Tiam Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) mem estis fondita, restarigita en 1922, kaj denove en 1947. Oni tiam decidis labori je la disvastigo de la lingvo esperanto inter scienculoj kaj subteni la periodaĵon "Scienca Revuo", ekmovitan la jaron 1903. Ĝi fariĝis oficiala organo de ISAE. La celo de apenaŭ fonditaj institucio kaj revuo estis, precipe, agado en la sciencaj medioj por esperanto kaj al la utilo de la ideo por enkonduko de esperanto en la sciencon, same kiel pliriĉigo de esperantaj scienca kaj faka terminologioj.

Pli frue ol **Scienca Revuo,** en esperanto aperadis kelkaj sciencaj periodaĵoj, el kiuj la plej menciindaj estas: Internacia Scienca Revuo (aperis, jam ek de 1904, 8 grandformataj volumoj kun multe pli ol 4.000 paĝoj) kaj *Bulteno de la Internacia Scienca Asocio Esperantista* ekde la jaro 1926 ĝis la Dua mondmilito.

Post la Unua Mondmilito fariĝis rimarkebla fenomeno de pli granda disvastigo de esperanto inter sciencaj rondoj. La signifo de la lingvo esperanto por scienco aparte estis atestita en la serio de dokumentoj, unue en la Deklaracio de 40 membroj de la Franca akademio de sciencoj (1924), en ĝia konkludo ke esperanto "estu grandutila por la progreso de la scienco kaj de ĝia apliko". Subskribintoj de la Rezolucio esprimis la esperon por ke tiu ĉi lingvo - "majstra verko de logiko kaj simpleco" – estos enkondukita en ĉiujn lernejojn de la mondo.

Intertempe sekvis la Manifesto de 85 japanaj sciencistoj (1950), laŭ kiu oni sin ŝuldigis ĉiujare publikigi almenaŭ unu sciencan disertaĵon esperantlingve kaj tradukadi esperanten ĉiun artikolon publikigitan en iu alia lingvo. Ekirante de la penso ke "la scienco estas komuna insisto de homoj por fariĝi estaĵoj meritplenaj porti la nomon homo sapiens", la subskribintoj akcentadas ke la enkonduko de esperanto kiel unika lingvo en la sciencan interkompreniĝon estos tre efika rimedo kiu ebligas la solidarecon en internacia kunlaboro de sciencoj.

En la mesaĝo de Munkena konferenco de ISAE (1951) estas skribite: "Ni povas konstati, kreinte en tiu ĉi lingvo, ĝian plenplenan kapablecon (taugecon) por la esprimado de sciencaj pensoj... Ni opinias ke esperanto, en la praktiko dum ĝia sesdekjara ekzisto, meritas seriozan aprobon flanke de la scienco".

Similajn rezoluciojn eldonadis ankaŭ pluraj sciencaj kunvenoj de ISAE, same kiel kelkaj neesperantistaj organizaĵoj. Tamen, la plej grava estas Rezolucio de UNESCO (1954), kie oni montris rekonon de la rezultoj surkampe de intelekta interŝanĝo pere de esperanto. En Kopenhago (1962) okazis la Unua internacia konferenco pri lingvaj problemoj en la scienco.

Kiam la sciencaj publikaĵoj estos presitaj en internacia lingvo je pli granda preskvanto, la rezultoj de la scienca laboro povus esti atingeblaj al la tuta homaro – opiniis nia elstara esperantisto kun la scienca profilo prof. d-ro Boža Popović, kiu dum jaroj estis respondeca redaktoro de "Scienca Revuo", eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista (jugolsavia filio). Samtempe, nia estimata d-ro Popović, naskita Niŝ-ano, skribis kaj publikigis en la sama revuo plurajn precipe sciencajn artikolojn. Inter ili ni mencias jenajn du: 1. **Lingva problemo en matematikaj kaj fizikaj sciencoj** (prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1962) kaj 2. samtempe faka kaj scienca priskribo **Kia(j)n scienca(j)n revuo(j)n ni bezonas en Esperanto.** Celo de la artikolo kaj la esencaj demandoj estas:

Enhavo laŭ la sciencaj branĉoj, Enhavo laŭ la scienca nivelo, Ligiteco kun neesperantistaj scienculoj kaj Redaktado, administrado kaj financado.

Koncerne la enhavon de la revuo laŭ sciencaj branĉoj grava estas konkludo ke nur unu scienca revuo neniel povas esti solvo de la problemo, ĉar la scienco konstante dispartiĝas en pluraj sciencaj branĉoj. "La fakulon de difinita scienca branĉo interesas plejparte la artikoloj el lia (ŝia) branĉo, kaj nur duavice kaj supraĵe aliaj artikoloj. Pro tio estas memkomprenebla tendenco krei ankaŭ en Esperanto revuojn pri ĉiu fako aparte. Tiun tendencon kaj la procezon oni ne povas haltigi", konkludas d-ro Popović.

La aŭtoro de tiuj ĉi alineoj havis grandajn plezuron kaj honoron publikigi du siajn prelegojn: l. **La mezepoka serba eposa heroo Marko Kraljević en balkanlanda folkloro (Kongresa libro** de la 58-a Universala Kongreso de Esperanto, Beograd, 1973, p. 53) kaj 2. sub la titolo **Grekaj popolaj kantoj en la traduko serba** (Scienca Revuo, n-ro 28, 1977, 3-16), estis prelego en Internacia Somera Universitato, Ateno, l976.

Referaĵoj de DESKF-5 (BEOGRAD, 2001) je diversaj artikoloj perlaboris la temon **Danubo – rivero de kunlaboro.** " La Beograda DESKF-sesio havis ĝis nun plejnombrajn referaĵojn kaj...eblecon por unua fojo en la kurta DESKF-historio publikigi la prezentitajn verkojn libroforme", kiel en Antaŭparolo diras prezidanto de Loka Organiza Komitato Zlatoje Martinov.

Inter pli ol tridek ĉeestantoj, plejparte serbaj (ne)esperantistoj, prelegis kelkaj gesamideanoj el Rumanio, Hungario kaj Italio. Nome, Renato Korseti parolis pri '*La kokoj de renco aŭ, pri la neceso kunlabori en ĉirkaŭdanubaj landoj*'. Inter niaj aŭtoroj mi, vere subjektive, mencios nur kelkajn: '*Prahistoria trovejo Vinĉa apud Danubo* (Dimitrije Janiĉiĉ)',"*Ribela ekkrio" kaj aliaj poemoj de Rigas Feraios en pridanubaj manuskripto*j (Miodrag Stojanović), *Esperanto-bibliografio en Jugoslavio* (Boriša Milićević)...

Intertempe, ISAE disvastigis la kampon de sia agado je fakoj kaj sekcioj. Krom la eldonado de la tradicia periodaĵo "Scienca Revuo", aperis ankaŭ kelkaj fakaj periodaĵoj: "Medicina Revuo", Internacia Pedagogia Revuo", "Jura Revuo" (la periodaĵo por la kompara kaj internacia juro).

De la jaro 1976. Internacia Federacio de sciencoj presadas la revuon "Mondo de scienco", en kvar mondaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. La saman jaron, dum la kunsido de UNESCO, sciencistoj-esperantistoj dediĉis atenton al la normigo de scienca kaj teknika terminologioj. Pro tio en UEA laboras Terminologia Esperanto Centro (TEC), fondita en 1981, kiu zorgas pri esperantaj terminoj en diversaj medioj. Dekoj da fakaj terminaroj en esperanto aperis dum jaroj kaj multaj estas rete haveblaj (http: // esperanto.net/tec/). Interreto estas potenca rimedo por la verkado kaj tradukado de sciencaj kaj teknikaj artikoloj en esperanto. "Unu kanalo kiun oni lastatempe multe uzas por tiu celo estas Vikipedio – multlingva libera reta enciklopedio. La esperanta Vikipedio (http://eo.wikipedia.org/wiki) kiu ekzistas de 2001, enhavas jam pli ol 40.000 artikolojn, kaj plurajn sciencajn kaj teknikajn artikolojn. Tre valora iniciato sur la tereno de retaj artikoloj estas la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko ĉe la retejo de Eventoj (STEB, http://www.eventoj.hu/steb/). STEB klopodas kolekti kaj re-disponigi sciencajn kaj teknikajn artikolojn en tre diversaj fakoj de natursciencoj, juro, medicino, ekonomio kaj aliaj. STEB provizas kreskantan datumbazon de malnovaj kaj novaj artikoloj kaj fakaj terminaroj, kaj povas servi kiel kerno de scienca kaj teknika eldonadoj en esperanto".

La fakto ke la lingvo povas esti taŭga por la scienca uzado, se ĝi havas riĉan fakan terminologion. Pro tio, dum la periodo 1904-1910, sub la patroneco de la periodaĵo "Scieneca Revuo" kaj ISAE, oni eldonis la unuajn fakajn periodaĵojn por scienca kaj teknika terminologioj. Post la Dua mondmilito aperis vortaroj ; la plej ampleksa estas konata "Plena ilustrita vortaro", kiel la pruvo de ampleksa esperanto-leksikologio. Temas pri la plej grava disciplino de esperantologio kiu ankoraŭ ampleksas etimologion (vorthistorion), sciencon pri la deveno kaj origino de la vortoj. Aparta disciplino estas kompara esperantologio kiu studas la strukturon kaj la elementojn de esperanto kun tiuj de aliaj lingvoj artefaritaj kaj naturaj.

Malgraŭ konstantaj penoj por malkovri sciencan vojon al esperanto, restas pluraj problemoj kiujn oni apenaŭ devas solvi. La ĉefa malfacilaĵo al pli rapida penetrado de esperanto en la sciencon estas manko de esperantaj sciencaj libroj. Kompreneble, ĉar tiujn librojn kreas kaj publikigas precipe scienculoj esperantistoj, vere por montri kiom esperanto estas aplikebla en la scienco. Nome, por instigi la flegadon de la scienca penso en esperanto kaj sen ia ajn lingva bariero samnivele kaj egale utiligi ĝin al homoj en ĉiuj partoj de la tuta mondo. Pro tio ni esperas ke tiu ĉi nia historia kaj faka trarigardo de ĝisnunaj esperantistaj sciencaj paŝoj montras atingitan nivelon je tiu kampo. Tamen, restas konkludo ke ĉiuj esperantistoj, sendepende ĉu ili estas aŭ ne estas scienculoj, siaflanke povas kontribui al pliriĉigo kaj disvastigo de sciencaj rezultoj.

*Literaturo 1. L. L. Zamenhof, Lingvaj respondoj. Unua parto. Leksikologio, p. 1-41. Francujo 1962. 2. Luis Bastien, Naŭlingva etimologia leksikono. Anglujo 1950. 3. Dr Pavle Mitrović, Teorija međunarodnog jezika. Sarajevo 1957. 4. Radoslav Gajić, Živi jezik. Gradina, 1980. 5. Danubo – rivero de kunlaboro. Referaĵoj de DESKF-5. Beograd, 2001.*

**Dro prof. Miodrag Stojanović**

# Svalbard : Tutmonda Arkta SemKripto

**Konservado de semoj, sed por kies estonto ?**

Kio estas la Svalbarda Tutmonda Sem-Kripto

Ĝi estas ia grandega malvarmŝranko instalita sub monto de insulo Svalbard, en Norvegia Spitzberga insularo, apud vilaĝo Longyearbyen. Tiu grandega malvarmŝranko konsistas el unu enira koridoro 100 metrojn longa kaj kondukanta al tri ĉambroj po 256,5 kvadrat-metrojn grandaj, kiuj sume reprezentas 1500 kubametran volumenon por stoki semojn. La enten-kapablo estas granda: oni pritaksas, ke 4,5 milionoj da grajnoj povos esti konservitaj inter -20 kaj -30 Celsiajn gradojn (la malvarmiga sistemo funkcias per karbo ekstraktita en la regiono).

La loko estis elektita pro la ĉiamfrosta grundo (kiu ebligus plursemajnan konservadon de interna temperaturo sufiĉe malalta eĉ se la malvarmiga sistemo ekpaneus) kaj malesto de tektonaj fenomenoj (provizanta tre stabilan grundon). La Sem-Kripto situas je 130 metroj super mar-nivelo, kio estas ekster atingo de onta marnivela altiĝo.

Ĉi tiu kelo similas ne nur al giganta malvarm-ŝranko sed ankaŭ al giganta kiraskesto: neniu surloke laboros kaj la konstruaĵo estas protektita kontraŭ ĉiaj nepermesitaj vizitantoj.

Nun, la Sem-Kripto eble entenas 1,5 milionojn da semo-specimenoj. Estonte, la konservata specimeno-kvanto dependos de partopreno de landoj el la tuta mondo.

**Celo**

Svalbarda Sem-Kripto konstruiĝis por provizi sekuran konservejon al grajnoj de agrikulturaj planto-specioj kaj ties diversaj varioj devenantaj de la tuta mondo.

Jam ekzistas en la mondo almenaŭ 1400 semobankoj, kiuj troviĝas en tre diversaj statoj. Financado de semobankoj tre multe dependas de lokaj kondiĉoj, kiel militoj (jam okazis, ke detruiĝis semo-bankoj pro milito), financaj registaraj malfacilaĵoj kaj ankaŭ volo aŭ nevolo financi tiajn instituciojn.

Responde al tia situacio kaj konforme al Internacia Traktato pri Planto-Genetikaj Resursoj por Agrikulturo kaj Nutrado, Tutmonda Sem-Kripto celas esti lastŝanca rezervujo de semoj kaze de katastrofoj homaj aŭ naturaj.

**Iniciatintoj**

Norvegia registaro, Tutmonda Trusto por Semo-Diverseco (angle: Global Crop Diversity Trust) kaj Norda Genetik-Resursa Centro (Nordic Genetic Resource Center) antaŭe nomita Norda Gen-Banko subskribis komunan kontrakton pri administrado de Tutmonda Sem-Kripto. Tutmonda Trusto por Semo-Diverseco zorgos pri veturigado de semo-specimenaro al la Sem-Kripto kaj pri konservado de specimenoj en la Sem-Kripto (ĝi starigis specialajn fondusojn por tion financi). Norvegia registaro financos kaj plenumos bontenadon de la strukturo. Norda Genetik-Resursa Centro posedas gravan semo-kolekton kaj kunlaboras kun Sud-Afrika semo-kolektanto. Ambaŭ semo-kolektoj estas antaŭvidite enirontaj la Semo-Kripton.

**Pri financantoj**

Tutmonda Trusto por Semo-Diverseco fondiĝis en 2004 kiel sendependa fonduso sub internacia leĝo-kadro. Inspirante sin de Internacia Traktato por Planto-Genetikaj Resursoj por Nutrado kaj Agrikulturo, ĝi donas al si mem kiel rolon "sekurigi longtempan konservadon kaj disponeblecon de plant-genetikaj resursoj por nutrado kaj agrikulturo kun celo plenumi tutmondan nutro-sekurecon kaj daŭripovan agrikulturon." Ĝi celas plenumi kolektadon, konservadon kaj stokadon de semo-specimenoj eksterloke kaj kost-efike, kaj progresigi alireblecon al semoj kaj kuraĝigi al ties uzado. Por tio, kaj laŭ kunteksto, la Trusto finance subtenas semo-kolektajn instituciojn aŭ eĉ povas duplikati semojn por ilin konservi ekster-loke.

La Trusto estas sub patronado de UN-a Organizo por Nutrado kaj Agrikulturo kaj de Internacia Esplor-Instituto pri Planto-Genetiko - International Plant Genetic Research Institute, IGRI (nun grupigita kun Internacia Reto por progresigo de Banano kaj Pizango - International Network for the Improvement of Banana and Plantain, INIBAP, por formi novan institucion Biodiverseca Internacio - Biodiversity International - kiu estas parto de la tuta sistemo Konsulta Grupo pri Internacia Agrikultura Esploro - Consultive Group on International Agricultural Research, CGIAR).

En la Trusto, partoprenas registaroj, institucioj, firmaoj kaj individuoj. Estas interese iom plu esplori, kiuj partoprenas en la Trusto. Apud registaroj, kiuj mem povas havi diversajn proprajn interesojn kaj tre ofte estas favoraj al Genetike Modifitaj Organismoj (GMOoj), eblas konstati, ke partoprenas ankaŭ institucioj, kiel ekzemple Grains Research and Development Corporation (Korporacio por Esploro kaj Disvolvo de Grenoj) el Aŭstralio, kiuj konsideras GMOojn, kiel interesan vojon por estonta agrikulturo. Por kompletigi la portreton de Tutmonda Trusto por Semo-Diverseco, partoprenas en ĝi firmaoj Syngenta AG kaj DuPont/Pioneer Hi Bred.

Ĉi tiuj firmaoj estas fam-konataj en la medio kiu interesiĝas pri agrikulturo, ĉar ili produktas kemiaĵojn (herbicidojn, fungicidojn kaj besticidojn), kemi-sterkaĵojn kaj GMOojn.

Inter financantoj de la Sem-Kripta projekto, estas inter alie Fondaĵoj Bill kaj Melinda Gates (Bill Gates estas la super-riĉega mastro de firmao Microsoft) kaj firmao Monsanto (kiu produktas kemisterkaĵojn, agrikultur-kemiaĵojn, GMOojn kaj iam produktis famkonatan Oranĝkoloran Agenton - senfoliigan kemiaĵon vaste uzitan dum milito en Vjetnamio).

**Kritika analizo**

Estas pluraj kritikoj farindaj pri tiu projekto de Sem-Kripto, des pli, ke ĝenerale la amas-komunikilaro sin kontentigis nur per granda kaj longa laŭdado, donante kiel eble plej multajn teknikajn informojn, sed evitante esprimi ion ajn pri financantoj kaj ties ecoj.



Eblas analizi tiun projekton el simbola aliro kaj ankaŭ el tiu de realaj sekvoj.

La Sem-Kripto estas entute simbola afero, ĉar se okazos katastrofo, kiel oni povis aŭdi per amaskomunikiloj, kiel povos kreski tiuj konservitaj semoj en tute nova post-katastrofa vivmedio ?

La unua simbolo, kiun oni povas vidi en tiu tre teknikeca realigo, estas daŭra provo mastrumi la estonton per tekniko (kion faras teknikisma-landa homaro de jarcento estigante pli kaj pli da gravaj ekologiaj kaj sociaj katastrofoj) kaj tiu teknikaro necesigas alt-nivelan sciaron, do sci-eliton aŭ specialistaron, kiu zorgos pri ĉio fore de iu ajn civitana memrego. La mesaĝo estas “Ke okazu kio okazos, ni specialistoj zorgas kaj zorgos pri via estonto: trankviliĝu kaj plu dormu.” Saman parol-manieron oni povas aŭdi koncerne atoman energion, eĉ post kiam ni vekiĝetis pro la inkubsonĝa Ĉernobila eksplodo.

La fakto mem ke oni apartigas semojn de la vivanta mondo por meti ilin en malvarm-ŝrankon estas tre simbola, kaj je almenaŭ tri aliroj. Unue, oni sukcesis instali en la kolektivan pensmanieron, ke oni rajtas meti semojn (homar-estonton) en kiras-ĉambron, sen ke iu ajn protestas. Oni ekde nun rajtas enskatoligi homar-estonton, malpermesi al la homaro aliron al ties estonto, kaj ĉiuj aplaŭdas. Due, jam klare anoncite estas, ke civitanoj ne plu povas (rajtas kaj kapablas) zorgi pri selektado, multobligo kaj konservado de semoj ; kion la homaro faradas de jarmiloj nun faros nur kelkaj specialistoj pagataj de kelkaj institucioj kaj firmaoj. Trie, anstataŭ certigi sekuran estonton per la vivprocezoj (multobligo, konservado kaj adaptiĝo de semoj al lokaj kondiĉoj per nurnura kaj deĉiama kultivado), la homaro preferas paralizi vivprocezojn por liveri al estontaj generacioj muzeecajn semojn, kies genetika informaro korespondas al pasinta, eble entute morta mondo.

El malpli simbola vidpunkto kaj konsiderante ontajn realajn eblajn feikojn de tiu Sem-Kripta projekto, eblas starigi kelkajn pliajn demandojn.


Kun kiaj celoj institucioj interesiĝantaj pri agrikulturaj Genetike Modifitaj Organismoj (GMOoj) kaj firmaoj ilin produktantaj investas en tion ?

Ni jam multajn fojojn havis okazon legi aŭ vidi la propagandon favoran al GMOoj: GMO-firmaoj provas klarigi, ke ili produktas tiujn aĉaĵojn por la bon’ de l’ homar’, por kontraŭbatali mizeron, sekegon kaj multajn aliajn tutmondajn problemojn. Partopreno en la Sem-Kripta projekto povas alporti al GMO-firmaoj tian propagandon, kian ili bezonas: ĉifoje, ne temas nur pri vortoj, sed pri agoj ! Jam estas konstruita la rezulto de ilia mona malavaremo kaj homamo !

Eble iel tiu formo de propagando funkcios, sed povas esti ke alia formo de kontraŭpropagando naskiĝos: tiuj firmaoj ĉiun tagon asertadas - eĉ neante faktojn - ke risko de poluado per GMOoj estas tre malgranda kaj ke ĉiaokaze, GMOoj estas danĝeraj nek al homa sano nek al biodiverseco kaj naturmedia sano. Do kiel ili klarigos investadon en tiun Sem-Kriptan projekton ? Ĉu finfine ili timus aŭ almenaŭ dezirus protekti sin kaj semojn kontraŭ poluado genetika, kiu ne estas poluado laŭ ili ?

Alia demando estas kial firmaoj, kiuj ĉiutage batalas kontraŭ naturan fenomenon - libera reproduktado kaj multobliĝo de semoj - subite ekhavas ideon konstrui ŝirmejon por semoj ĉiaspecaj el la tuta mondo ? Ĉu tio estas kohera aŭ malkohera ? Unuflanke, semoj en la Sem-Kripto, mi jam diris, estos konservitaj ekster atingeblo de la homaro. Aliflanke, GMO-firmaoj disvolvas teknikojn, kiuj ebligas al ili teni la ŝlosilojn de semo-produktado. Ĉikaze, estas plena kohereco inter ambaŭ projektoj: apartigi la homaron disde ebleco regi propran estonton, tiel lasita en manoj de kelkaj akci-posedantoj.

Tiu apartigo de semoj de ties reproduktа procezo (semado, selektado, rikoltado kaj refoja semado, ktp) estas el vidpunkto de semo-uzanto tute stranga: semoj plej bone konserviĝas kiam ili estas semataj, selektataj kaj rikoltataj, tiel ili iompostiome pliriĉigas sian genetikan informaron kaj tiel konstante adaptiĝas al sia ĉirkaŭaĵo, kio faras el ili fortikajn plantojn. Tra la mondo ekzistas semo-bankoj kiuj estas vivaj malkiel Tutmonda Sem-



Kripto: mi citos nur ekzemplon de Francia asocio Kokopelli, kiu disvolvas tutan reton de ĝardenistoj amatoraj aŭ profesiaj. Ĉiu el tiuj ĝardenistoj povas decidi patroni unu semo-varion: ŝi-li semas ĝin, selektas kaj rikoltas tiujn semojn jaron post jaro. Normale, ĝardenisto rikoltas sufiĉe da semoj por liveri konsiderindan kvanton da semoj al asocio Kokopelli, kiu distribuas ilin al aliaj ĝardenistoj, kiuj tiujn semojn bezonas. Per tia reto, la semoj daŭre evoluas kaj riĉiĝas, kaj oni kolektive povas konservi konsiderindan nombron da semoj (eĉ semojn kiuj ne estas oficiale registritaj... des pli da diverseco !). Anstataŭ subteni tiajn vivajn semo-bankojn, GMO-firmaoj, registaroj ka institucioj preferas investi en Tutmondan Semo-Kripton. Libereco kontraŭ monopolo. Kohere, ĉu ne ?

Semo-firmaoj, de la komenco de industriigo de tiu sektoro, ĉiam revis pri monopolo super semoj: Kia granda malfeliĉo estas tiu bedaŭrinda emo de naturo al abunda multobliĝo ! Tio malhelpas starigon de merkato, ĉar povas esti merkato nur kiam estas manko. Do organiziĝis la semo-manko unue per industria hibridigo de planto-specioj per interkrucigado de varioj, kiuj estas konservitaj sekretaj (nur unu posedas la hibrid-originajn semojn, la vendisto) kaj se oni provas multobligi hibrid-devenajn semojn por propra uzo, rendimentoj de idoj de hibrid-devena semo tuj falas, do oni devas daŭre aĉeti semojn al la semo-industrio... Tiu fenomeno disvolviĝis ankoraŭ pli per GMOoj: neniu kamparano kapablas krei en sia kampo tiajn ĥimerojn kaj do devas aĉeti ilin. Kaj kiu rifuzas aĉeti GMOojn (multekostajn kaj laŭ grandskalaj eksperimentoj tute ne profitodonajn - al la kamparano) ĉiaokaze vidos siajn proprajn grenojn poluitaj, kaj povos la GMO-firmaoj jure ataki la kamparanon ĉar li "profitas" el produkto de la firmao sen esti paginta la prezon...

Do, estas tre interese al GMO-firmaoj investi en tiun Semo-Kripton: ili tiel havas sub la mano tutan rezervon de semoj el la tuta planedo (sen eĉ trakuri la planedon por ŝteli ilin el la komuna havaĵo) je ege favora prezo, el kiu rezervo ili povos fari grandan mono-fonton. GMO-firmaoj povos utiligi tiujn semojn por privatigi ilin, asertante ke ili "inventis" tiujn semojn aŭ por el ili fari novajn GMOojn, kiujn ili disponigos ege multekoste kaj malhelpante agrikulturistojn labori sen GMOoj.

Eblas eĉ imagi - kaj mi timas ke bedaŭrinde kaj malfeliĉege tio jam survojas - ke GMO-firmaoj, kiam la tuta planedo estos GMO-izita, povos elŝrankigi semojn el Tutmonda Sem-Kripto kaj multobligi tiujn semojn ne genetike modifitajn kaj vendi ilin je alta prezo: kian bonan aferon ili havos. Antaŭe, ili provizis GMOojn je alta prezo, kaj post ĝenerala GMO-poluado, ili provizos neGM-ajn semojn. Ĉu scienc-fikcio ? Eble ne...

**Konklude**

Tutmonda Sem-Kripto estas nova realigaĵo de teknikisma socio, plu fuĝanta kaj provanta protekti sin kontraŭ sekvoj de sia agado. Teknikismo kondukas nin iompostiome en fantazian mondon sen rilatoj kun la Vivo, pli kaj pli sub superregon de iu gvidantaro kaj pli kaj pli fore de memrego. Kiom da tempo ni lasos nin esti blindigitaj per tiu amas-mortiga revo ? Ĝi neniel longtempaskale solvis problemojn, nur homar-skale pligrandigas ilin. Nuna plikostiĝo de nutraĵoj, same kiel nun ankoraŭ malpli priparolata maldikiĝo de la viv-nutra huma tavolo, estas plia konsekvenco de tiu pens-maniero. Ĉu finfine ni vekiĝos aŭ ĝismorte flegos la inkub-sonĝon ?

**Robin BETO 35717**

*Notoj:*

*- Fontoj de informoj pri Tutmonda Sem-Kripto ĉefe estas angla-, franca- kaj esperanta-lingvaj vikipedioj, ttt-ejo de Tutmonda Trusto por Semo-Diverseco www.croptrust.org kaj de Biodiverseca Internacio www.biodiversity-international.org.*

*- Inform-kompletiga kaj rekomendinda estas legado de Manifesto pri Estonteco de Semoj, verkita dum tutmonda kunveno "Terra Madre" de asocio Slow Food (Malrapida Manĝo), nun disponebla en esperanta versio ĉe ttt-ejo SAT-Kulturo http://www.satesperanto.org/Manifesto-pri-Estonteco-de-Semoj.html*

# B. Traven : La ĉaro

Karaj legantoj,

tiu romano, tradukita de mi kaj de mia edzino, estas la unua el la mahagonciklo, jen eksterordinara romano, ĉar en tiu libro parolas al ni maturiĝinta revoluciulo, kiu mem bezonis longan vojon por atingi tian majstrecon kiel verkisto.

Tiu verkisto B.Traven, kiu tre verŝajne estas la filo de la brikofaristo Feige el la nuna Pollando, fuĝis deksesjara de hejme. Li fariĝis kiel aktoro Ret Marut individua anarkiisto laŭ Stirner : Li havis kontaktojn al ruĝaj framasonistoj, poste li ĵetiĝis en la konsilian revolucion en Bavario. Kaj en tiu tempo li komencis jam legi la verkojn de Marx kaj Engels, precipe li interesiĝis pri la sekva libro de Engels : „La situo de la laboranta klaso en Britlando“, kiu tre forte influis lin. Tion pruvas multaj partoj de „La Mortula ŝipo“, kiuj estas ĉerpitaj el tiu libro. Li legis la verkojn de Jack London (jam en la angla, tradukoj de Jack London tiam apenaŭ ekzistis). Kiel kotonplukisto en Meksiko li entuziasmiĝis pri la radikalaj „Wobblies“, jen revoluciema sindikato de laboristoj, kiuj havis en la vico krom anarkiistoj, multajn marksistojn.

En la mahagonociklo, kiu konsistas el ses volumoj, Traven uzis ĉiujn ĉi spertojn por verki grandiozan volumaron pri la meksika revolucio. La romanoj estas fakte dokumentoj pri la antaŭhistorio kaj la revolucio en Meksiko mem. Tiuj dokumentoj estas verkitaj surbaze de ekonomia analizo, kiu estis tute marksisma, aŭ ni diru pli memgarde laŭ la „Kapitalo I-III“., kiu ja tre deflankiĝas de la avangarda teorio de Marx, kiu tie tute ne ludas rolon.

Mi pensas, ke neniu verkisto antaŭ Traven tiom bone prezentis la ekonomian pensadon de Marx. La tamburado pri tio, ke Traven estis anarkiisto, estis parte prava, sed kiel verkisto de la mahagona ciklo li estis ankaŭ ekonomia marksisto. (Ne jam en La Mortula Ŝipo“, kiu estas efektive esence individue anarkiisma verko laŭ ideologio. La marksisman ekonomion laŭ mia opinio fine neniu verkisto tiel bone uzis kiel Traven. Nur Jack London jam antaŭ li provis tian. Precipe en la verko „People of the abyss“ : “Homoj de la abismo”.

Anarkiistoj, kiuj grumblas, se oni mencias la marksiman flankon de Traven, komprenas Traven nur parte. Ili subtaksas lin, Traven estis ne nur disvastiganto de konataj anarkiistaj pensoj, sed profunda mempensanto, por mi ankaŭ klarvida grava pensanto pri la revolucia potencialo en Latin-Ameriko, kiel tio nun iom post iom efektive montriĝas. Traven kiel sendependa pensanto, kiu apartenis al neniu partio, estas ĝuste tial enorme grava por nia tempo, kiu bezonas novan pensdirekton laŭ Traven. La revoluciuloj en Chiapas, kiuj konas Traven kaj uzas ties pensojn kaj ideojn en deklaroj, komprenas tion.

Nu, efektive, kiun vojon ni iru nun, ree tiun de diktatoroj, je la kioma fojo do ? Ĉu kun partio avangarda, kiu denove sklavigos nin post la venko de la revolucio ? Aŭ tiun de moralistoj laŭ la kleriga movado en Eŭropo ? Ĉu ni do plian fojon provu ŝanĝi la homojn per nura edukado sen scii ion pri la bazo de nia vivo, pri la ekonomio ? Kiun vojon ni do iru ? Mi pensas, ke ni iru la vojon de tiuj anarkiistoj, kiuj konsicas, ke la ekonomio estas la bazo de nia vivo. Kun Traven ni postulu mondon sur la bazo de anarkio kaj de komuneco. Jam Stirner pensis en tiu direkto, kio estas ne tre konata. La plej stulta interpreto kaj ŝtelisto de ideoj de Stirner estis Nietzsche, kiu tordis ties ideojn tiom longe, ĝis fariĝis el ili la malo. La babilaĉo pri la tielnomata superhomo. Stulta estas ankaŭ la primitiva kontraŭkomunismo de Nietzsche, kiu ne havis argumentojn kontraŭ Marx. Sed paradoksa estas en vero nur komunismo, kiu asertas, ke en komunuma ordo necesas gvidantoj. Tio estas kaj restas absurda. La volo ne obei estas multe pli forta en la homaro ol la deziro regi iun. Ju pli alta la socia evoluŝtupo de la homaro estas desmalpli homoj volas estis nur sklavoj de partioj au de fortaj individuoj.

La estonteco, kiu kaŭras jam saltoprete en la nuna mondo, la utopio pri pli bona mondo, ne estas io, kio estigendas, sed tio, kio jam komenciĝis, tie, kie oni permesas tion en sia kapo kaj en sia vivo. La liberiĝo okazas unue en la kapo de individuo, kaj jam tiam, se oni agas laŭ tio, se oni ne denove volas demeti la kapon ĉe iu nobla gvidanto, ĉar tiuj laŭdire pli bone scias ĉion ol ni mem. Ke nia pensado kaj la sukceso de nia agado en ĉiu kazo estas ligita al certa evoluŝtupo de la homa socio kaj precipe al la aktuala ekonomia situacio, tio kompreniĝas per si mem.

Traven verkis la mahagonociklon unuavice por la legantoj de la sindikata eldonejo Büchergilde Gutenberg, do kun la celo „fortigi la dorson de la proletoj“ en Germanio, sed ne nur pro tio li verkis. Traven tute ne estis naciisto aŭ adepto de la proletkulto. Traven estis internaciisto kaj sennaciisto, kiu verkis la mahagonociklon por ĉiuj homoj en la mondo – kaj ĉe tio li ne preferis la proletojn, li turnis sin eksplicite al ĉiuj homoj, ankaŭ vidalvide kun la faŝismo, kiu tiam ekestis kaj triumfis en Germanio.

La okazaĵoj en Germanio respeguliĝas en la tuta mahagonociklo, tial tiu ciklo legeblas ofte kiel komento de la okazaĵoj en la tiama faŝisma Germanio. Sed samtempe la

mahagonociklo estas bonega lernolibro por venontaj revoluciuloj, kaj por ĉiuj ankoraŭ-ŝanceliĝantoj, kiuj ne jam trovis vojon, sed kiuj tamen volus scii en kia socio ni vivas, kiun vojon ni iru en Latina-Ameriko kaj ĉie en la mondo.

La diktatorecaj komunistaj gvidantoj en Germanio perfidis Traven per neglekto, kaj aliaj regemaj maldekstruloj ĝis nun perfidas lin (ĉar komunismaj anarkiistoj nur ĝenas ĉe la senhonta regado de homoj) ; ankaŭ tiuj laboristoj, kiuj volas fariĝi mezklasuloj, perfidas homojn kiel Traven. Ĉe SAT necesus eble eĉ pli pli malferma sinteno pri B.Traven. Kaj tial Donjo kaj mi tradukis tiun libron de Traven, kun la espero ke SAT iam presos ĝin kaj aliajn verkojn de Traven.

Centoj de legantoj, kiuj ĉiusemajne laŭ statistiko klakas la Traven-paĝojn en mia retejo : www.cezarpoezio.de certigas nin pri tio, ke ni ne vane tradukis. Traven neniam estis tute forgesita, kaj ĝuste nun la intereso pri tiu aŭtoro en Germanio ree kreskas, la tempoj ŝanĝiĝis, revoluciuloj kiel Traven ree estas legataj pli ofte ! De li mem oni povas mendi plu preskaŭ ĉiujn librojn en Germanio. Kaj “La ĉaro”, tiu mastroverko, estas unu el la plej ŝatataj libroj de Traven entute, ĉar Traven en tiu verko prezentiĝas kiel eksterodinare klarpensa batalanto por la bona afero de la indiĝenoj en Ameriko, sed ne nur por tiu. Traven celis ne pli malmulton ol la liberigon de la homaro de la “pesto”, kiu estis por li la kapitalismo.

Mi konsilas al vi, legu la libron. Mi promesas, ke vi ne enuiĝos, se vi legas ĝin. Tiukaze vi pli bone komprenos nian entuziasmon pri tiu verkisto.

**Teron kaj liberon,**
**Donjo & Cez !**

PS : Se mi provas meti Traven por klarigoj en kadron de iuj mondkonceptoj kaj ideoj mi faras tion tamen bone sciante, ke Traven mem tre misfidis al ĉiuj belaj vortoj kaj voldeklaroj, li neniam asertis pri si esti marksisma anarkiisto aŭ anarkiista marksisto, sed li agis tiel ! Kaj tio por li pli gravis ol senfine babilaĉi pri la ĝusta direkto aŭ la ĝustan nomon por movado. Li ne bezonis ordenojn por certigi al si, ke tio estas ĝusta, kion li faras. Traven havis la memkonscion, kiun bezonas vivanta revoluciulo, kiu ne lasas korupti sin de oportunistoj, kiu volas havi nur paneron de la riĉuloj, Traven celis la tutan socion por la emancipiĝo de ĉiuj.

# Pri “La Ĉaro”

el “La Ĉaro” ĝis la “Generalo” (1. Daŭrigo Laŭ B. Traven-sciigoj N-o 1-36

(certe Traven mem verkis tion)


En sia libro “La ĉaro” B. Traven rakontas al ni la sorton de la ĉaristo Andrés Ugaldo, kaj tiel pri la malgaja vivo de indiĝenaj ĉaristoj kaj peonoj, do, pri la indiĝenaj proletoj en Meksiko dum la dikataturo de Porfirio Diaz.

Oficiale la sklaveco en Meksiko estis forigita per la konstitucio el la jaro 1824. Sed ĉiujn bonkvalitajn rikoltogrundojn oni antaŭe forprenis dum la koloniisma tempo de la ejidos, de la indiĝenaj komunumoj. Tial la praloĝantoj de Meksiko laboras nun kiel peonoj, kiel taglaboristoj de la grandbienuloj por aĉe malgranda salajro. Kaj kion ili rikoltas sur siaj propraj malfekundaj kampoj, ili devas vendi al la patrono por prezo, kiun tiu mem difinas. Kion ili bezonas por sia vivtenado, tion ili devas aĉeti de la patrono, por prezoj, kiuj estas multe pli karaj ol ĉe normala komerco. Ili povas nenie aliloke aĉeti ion, ĉar ili neniam havas kontantan monon en la manoj kaj ĉar ili eterene havas ŝuldojn ĉe sia patrono. Eterne, tio signifas, dum la tuta vivo, kaj ankoraŭ post la morto. Se ili mortas, ilia ŝuldo transiras sur la filon aŭ la fraton aŭ kiun ajn en ilia parencaro. Se ili provas fuĝi, oni kaptigas ilin kun la helpo de la polico, kaj la kostoj de la polico transiras sur la debitan flankon de ilia konto. Ilia mastro povas bati ilin laŭ emo kaj plaĉo, ja eĉ skurĝi aŭ pafmortigi.

Tiun senhontan ekspluatsistemon subtenis de sube ĝis supre korupta registaro sankciigita de ĉiopotenca eklezio, kiu ne plej malmulte profitis de tiaj cirkonstancoj kaj ne havis intereson pri tio liberigi la indiĝenojn el nesciado kaj sklaveco.

La ĉaristoj havas iom pli bonan salajron. Sed ankaŭ ili restas la tutan vivon ŝuldantoj ĉe sia mastro. Sed iliaj ŝuldoj estingiĝas kun ilia morto kaj oni ne povas transskribi ilin sur la konton de la parencaro. Sed ankaŭ ili vivas penigan kaj rezignoplenan vivon. Ilia tasko estas gvidi bovoĉarojn de urboj al urboj en la regionoj de Meksiko, kiuj ne estas tuŝataj de fervojoj, tion ĉe tropika varmego tra sovaĝaj pejzaĝoj kaj ĉe tranĉanta frido, tra la transpasejoj de la Sierra Madre, sur aĉaj vojoj kaj tra marĉoplenaj regionoj, preter krutaj deklivoj kaj ravinoj, kie pluvoverŝoj parte aŭ tute forlavis la vojon, tra vepro, ĝangalo kaj riveroj, kie finiĝas ĉia vojo, aŭ kion oni nomas vojo en tiuj regionoj forlasitaj de Dio. La materialo por la riparo de siaj malnovaj rompiĝemaj ĉaroj- se sur la malglataj vojoj disrompiĝas radakso aŭ rado aŭ io alia- ili devas prizorgi al si mem, aŭ ŝteli, ĉar tiaj elspezoj ne estas rekompencataj. Ofte minacas ilin survoje atakoj de banditoj, se ili kunhavas valorplenajn ŝarĝojn. Entute estas vivo kiel apenaŭ imageblis, antaŭ ol Traven rakontis tion en sia majstra maniero.

Andrés Ugaldo, la filo de biena peono, en la aĝo de dekunu jaroj estas pruntedonata de la bienulo al sia edziniĝinta filino en Tenejapa, kie li devas labori en la domo kaj en la magazeno de Don Leonardo. Li estas obeema kaj lerta knabo, kiu eĉ rajtas lerni legi kaj skribi, por ke li povu esti pli utila al sia mastro. Kiam li havas dek kvin jarojn, li fariĝas bovoĉara gvidanto kaj konatiĝas sur siaj vojoj al nova mondo, li observas, komparas kaj komencas memstare pensi.




La leganto akompanas nun la marŝkolonojn de la ĉaristoj sur penigaj vojoj tra la interna lando de Meksiko kaj ekscias multon el la vivo de la indiĝenoj, de iliaj moroj kaj kutimoj, de iliaj zorgoj kaj turmentoj. Tiam li akompanas Andrés al la festo de la sankta Caralampio en Balún-Canán, kiu daŭras ok tagojn kaj servas unuavice al la eklezio, al la aŭtoritatoj kaj negocistoj por ankoraŭ pli riĉiĝi. Krome ĝi disponigas bonvenigatan okazon sub la kovromantelo de pieco fordoni sin al ĉiaj nur iel eblaj malvirtoj.

Pro naŭziĝo pri la irado de la aferoj Andrés iras iom flanken al la vilaĝa puto, kie indiĝenaj junuloj kaj junulinoj, kiuj ne povus pagi la multekostajn plezurojn de siaj mastroj, faras al si sian propran simplan feston kaj dancas. Jen li malkovras en malhela anguleto kunkaŭriĝintan timidigitan indiĝenan knabinon. Li interparolas kun ŝi. Ŝi parolas celtale, la lingvon de sia tribo. Kaj nun Traven, tiu ofte tondre parolanta kaj maldece sakranta homo rakontas al ni amhistorion, kiu pli delikate kaj pli bele apenaŭ troveblas en la literaturo.

Andrés ekscias de tiu knabino ŝian tragikan sorton : patro kaj patrino estas mortaj. La ŝuldoj de la patro transiris je la du fratoj, tiujn tiam vendas la bienulo kiel kontraktlaboristojn al monterio, el kiu malofte iu revenas. La knabino devas nun labori en la domo de la bienulo, la senhonta filo seksperforte molestas ŝin kaj ŝi fuĝas en sia mizero al Balún-Canán, esperante, ke six trovos tie iun pagatan laboron. Kiam tio ne sukcesis al ŝi, ŝi kolapsis lacigite en la proksimo de la puto. Andrés donas al ŝi manĝon kaj prenas ŝin al si. Sur la vojo ŝi rakontas al li la kreadan rakonton de sia tribo, kiun Traven en pliampleksigita versio reverkis en la libreto "Sunkreado". Al liaj kamaradoj li prezentas la knabinon kiel sian edzinon, kaj ĉar ŝi ne havas nomon, li nomas ŝin Estrellita-do steleto.

Je la lasta vespero de la festo, malmultaj horoj antaŭ la ekveturo de la karavano de Andrés, ankaŭ Manuel ankoraŭfoje, por lasta fojo volas tralavi la gorĝon kaj iras en la urbeton, kie la festo intertempe degeneris al diboĉa orgio, kia ĝi povintus esti apenaŭ pli senhonta. Sed Andrés, kiu atendis, ke li trovas sian kamaradon ebria kiel porko, trovas lin nun en la akompano de sana kaj forta indiĝena knabino, kiun Manuel prenis al si ĉe la puto. La historio de Posario ne estas tiel, kiel la historio de Estrellita. Ŝi ne estas plu tiom naiva, sed honesta kaj fervora knabino, kaj Manuel pensas pri tio fuĝi ĉeokaze for de sia mastro, por komenci kun ŝi pli liberan kaj pli belan vivon.

Kelkajn jarojn poste- Estrellita lernis intertempe en la veturoj legi kaj skribi la hispanan lingvon-ili trafas survoje indiĝenan grupon, kiuj alportas sciigojn de la bieno Lumbojvil. Malbonaj sciigoj. La bienulo vendis la patron de Andrés al monterio. Dum nokto Andrés pripensas, kio estas farenda. Tiam li decidiĝis, kaj tiel, kiel tio ne estis alie atendebla de nekoruptita indiĝeno. Li gvidas sian karavanon rapide al la destinita loko, por iri por sia patro en la monterion. Al Estrellita li diris, ke ŝi serĉu al si en urbo ĉeborde laŭ la fervojlinio bone pagatan laboron, por ke li povu trovi ŝin, kiam li post jaroj revenos el la monterio.

"Ne timu vin, steleto, estu kuraĝa. Eĉ se centoj da viroj kaj junuloj el la monterioj ne revenas kaj en ili forbloviĝas kaj estos enfosigitaj tie - mi revenos. Mi revenos al vi, steleto mia, kaj se pro tio la mondo devus rompiĝi en pecojn." Kaj la steleto respondis : "mi atendos vin, ĉiam kaj ĉiam."

*1= Porfirio Diaz estis dufoje prezidento de Meksiko, de la jaro 1877 ĝis 1880 kaj de 1884 ĝis 1911.*

*Rimarko : Multaj pliaj informoj pri Traven troviĝas en paĝoj de www.cezarpoezio.de*

# GENTO "VOORUIT"

La urbo Gento estas la ĉefurbo de Orient-Flandrio. Plej verŝajne la urbo dankas sian nomon al la kelta vorto "Ganda", kiu signifas : fonto, kunfluejo.

Dum la mezepoko Gento estis, danke al la drapindustrio inter la plej gravaj urboj el Eŭropo. En la jaro 1350 ĝi havis 56.000 enloĝantojn. Inter la 14a kaj 16a jarcento Gento, iama ribela urbo, havis multajn konfliktojn kun la "sinjoroj de Flandrio" (la registaroj sinsekvaj) kaj ekde la 17a jarcento la urbo ege regresis ĝis meze de la 19a jarcento, kiam ĝi evoluiĝis al la plej grava socialista bastiono en Flandrio.

Cŭ kiel industriurbo, ĉu pri socialismo, jes ja, Gento estas interesa urbo por tiuj, kiuj pristudas la klasbatalon kaj la radikalan socialismon. Estis en Gento, kie fondiĝis la Belga Laborista Partio (BSP), la unua granda kaj forta socialista partio, kiu konsistis el diversaj malgrandaj socialaj ĝis radikalsocialistaj grupoj. Estis do preskaŭ normale, ke en Gento kreiĝis la fama kooperativo "Vooruit" (Antaŭen)

Kooperativo estas societo, kies esenca karaktero konsistas en tio, ke ties profitoj revenas al la kooperantoj. La anglo Robert Owen, certe de vi konata, jam komence de la 19a jarcento evoluis la ideon de kooperativa socialismo, sed la praktikajn provojn, kiujn li entreprenis, malsukcesis. La unua sukcesa kooperativo estis plej versajne tiu en Rochdale. Laŭ informo kiun mi retrovis en AMSAB ( Instituto pri la sociala historio), la lanfaristoj kiuj postulis, en la jaro 1843 salajro-plialtigon, kreis kun sukceso kooperativon.

Sed ni reiru al Gento. En la jaro 1857 eksplodis en Gento granda proleta batalo kontraŭ la kapitalismo. La katunteksistoj kaj katunspinistoj, kiuj estis la unuaj, kiu fondis sindikaton en Flandrio, postulis plialtigon de la salajro, redukton de la laborhoroj kaj kio tre gravas, nuligon de la leĝo kontraŭ komplotoj. Jen leĝo, kiu jam en 1832 estis nuligita en Britio kaj, kiu malpermesis strikojn. La batalo daŭris 8 jarojn, malgraŭ premo kaj kontraŭbataloj de fabrikistoj kiuj senpanigis milojn da laboristoj, malgraŭ klasa justico, kiu forrabis la monon de la sindikato kaj enkarcerigis centojn da laboristoj. La laboristoj batalis tamen plu por akiri pli bonajn vivkondiĉojn.

En 1866 kaj la kabineto kaj la senato (Belga registaro) nuligis la leĝon kontraŭ komplotoj, altigis iom la salajrojn kaj reduktis la laborhorojn. La laboristoj preskaŭ tute sole batalis, nur kelkaj metiistoj subtenis ilian lukton kaj, konsentite, ankaŭ kelkaj intelektuloj. Grava figuro estis la genia poeto kaj verkisto Emiel Moyson, kiu adiaŭis de riĉa milionulo kaj preferis fariĝi kamarado inter la proletaro.

Grava kerno de la Genta laborista movado aliĝis al la Unua Internacio (1863-1876) kaj eĉ post la "falo de la Internacio kaj la fiasko de la "Komuno de Parizo" malgranda grupo decidis, ke la afero de la proleta batalo ne povas morti.

En 1872, Flandrio suferegis teruran malvarman vintron. La prezo de pano atingis nepageblan altecon kaj la laboristoj apenaŭ povis aĉeti panon. Laboristo Paul Verbauwen, kiu perdis la laboron, malfermis la trinkejon "de Vogelstruis". Li decidis, kun kelkaj kompanoj uzi la panbakfornon, kiu troviĝis en la domo, por baki je malalta prezo panon. Tio estis la komenco de tio, kio poste iĝis la plej grava kooperativo en Belgio.

Komence de la jaro 1873, tridek da eksaj katunlaboristoj decidis al fondiĝo de kunlaboranta panbakistejo kun la nomo "Liberaj bakistoj". Jam rapide la farbisto Edmon Van Beeveren kaj la kompostisto Edward Anseele aliĝis al la "Liberaj bakistoj", kaj estis ĉi tiuj du homoj, kiuj enkondukis la socialistan idearon, laŭ socialdemokrata modelo, en la kooperativon.

La genta proletaro tiel entuziasmiĝis pri la sukceso de la Liberaj bakistoj, ke aliaj homoj el diversaj metioj decidis krei kooperativajn bakejojn. En 1878 oni kalkulis 170 kooperuloj, kiuj kreskis ĝis 1500 da ili en la jaro 1880.

La socialistaj membroj de la baza asocio decidis preni la potencon de la "movado" kaj deklaris, ke ĉiuj kooperativoj estu socialistaj. La estraro de pinta grupo timis perdi membrojn, sed la socialistoj daŭrigis la batalon. Fine en novembro 1880 ili decidis forlasi la patrinan asocion kaj kreis novan kooperativon, en kiu la kunlaborado ne estis la fina celo sed batalilo por klaskonscia proleto.

2000 belgajn frankojn oni prunteprenis de la sindikato "La fratecaj teksistoj" kaj fondis la kooperativon "Vooruit". La socialdemokratoj el "Vooruit" vidis en la kooperativo gravan kaj elstaran propagandan instrumenton. Ankaŭ la financa situacio de "Vooruit" estis bona apogilo por nia juna socialista partio.

Krom "Voouit" ekzistis 2 aliaj kooperativoj en Gento, sed rapide montriĝis ke la formulo de "Voouit" estis la plej sukcesplena.

En 1881 "Vooruit" havis 270 membrojn, unu jaron poste 1150 da ili. Ekde tiam oni ankaŭ ofertis aliajn servojn ce "Vooruit" kaj en la jaro 1913 ili havis preskaŭ 10 mil membrojn, kio signifas ke unu kvarono de la Genta loĝantaro membris en "Vooruit".

Krom vendado de pano "Vooruit" vendis ankaŭ aliajn varojn, fakte ni povas kompari "Vooruit" kun nunaj grandvendejoj, ekz. eĉ kun Harrods en Londono.

Krom pano "Vooruit" vendis interalie karbonon, lanon, bieron, ili havis propran apotekon, fakte la listo estis longega. Plej grava certe estis la vendo de vestaĵoj.

Kiamaniere la sistemo funkciis en nia kooperativo ?




La disdivida sistemon, kiun "Vooruit" transprenis de la "liberaj bakistoj" zorgis por tio, ke la membroj ricevis rabatojn laŭ kvanto de aĉetoj, kiujn ili faris. Alia sistemo estis tiu, ke membroj aĉetis pankartojn, kio signifas, ke ili pagis panon antaŭ ol ili ricevis ĝin. Oni pagis rekte pli altan prezon ol ĉe konkuranto, sed per la sistemo de rabatoj la pano fine estis malpli kosta ol en aliaj vendejoj. Per ĉi tiu sistemo "Vooruit" povis ŝpari multege da mono, mono kiun oni uzis por modernigi kaj teknike plibonigi la maŝinaron. Pro la sukceso "Vooruit" povis aceti la grenon grandkvante kaj je malalta prezo. En 1882 oni vendis por 100 mil belgaj frankoj(2.500€) panon kaj en 1900 oni jam havis debiton de 1.000.000 da belgaj frankoj (25.000€).

La estrarano decidis en la jaro 1882, ke krom pano oni povus vendi ankaŭ aliajn varojn kaj en decembro 1883 oni komencis kun la vendado de litkovriloj kaj jam en januaro 1884 oni anoncis ke la membroj povas aĉeti "kontraŭ ekstreme malaltaj prezoj" vestaĵojn. Ek de tiam la ofertoj daŭre kreskis. Oni povis aĉeti karbon, sed ankaŭ medikamentojn, fakte ĉio ajn iel imagebla vendiĝis en "Vooruit". La asocio havis propran bankon, sed ankaŭ propran presejon kaj gazeton kun la nomo "Vooruit".

La influo de "Vooruit" al la socialdemokratio estis enorma en la komenca periodo, ne nur en Gento, sed post iom da tempo en tuta Belgio. Sed kio fakte estis la granda precipaĵo, kiu zorgis ke "Vooruit" estis tiom sukcesplena ?

Estis elstaraj personecejoj : antaŭ ĉio Edward Anseele !!!! Li estis unu de la gvidaj personecoj en "Vooruit". Granda organizanto kaj politika talento, lia kompano estis Edmond Van Beeveren. Ili estis la protagonistoj de "Vooruit". La asocio ne devas fariĝi riĉa, ili proklamis, ĝi dividu tion, kion ĝi nete gajnas. Pri kvalito oni ne faris al si multe da zorgoj, despli multe pri malaltaj prezoj. La regulo oni aplikadis ankaŭ en la vestobutiko. La laboristoj ne plu devas vestiĝi en jam flikitaj vestoj aŭ per vestoj aĉetitaj duamane. Ĉiuj devis havi novajn vestojn el "Vooruit" jen la slogano. Kiam Van Beeveren parolis pri la kooperativo, li unue menciis la malaltajn prezojn, poste idealojn kaj fine la socialismon.

La komenca ideo, ke la membroj aĉetu varojn en kooperativa spiralo disrompiĝis pro la diskuto pri la malalta prezo.

Pli kaj pli "Vooruit" forlasis sian kooperativajn idealojn kaj transformiĝis al simpla grandvendejo. Ne estis tiel, ke nur membroj povis aĉeti en "Vooruit", sed ankaŭ aliaj klientoj. La membroj ricevis 6 procentan rabaton, nemembroj nur 2 procentojn. Ankaŭ la ideo pri konfekcie faritaj vestoj je malalta prezo ne plu strikte estis sekvata, kaj jam komence de la 19a jarcento laŭmodaj altkvalitaj vestoj haveblis. Pli kaj pli la vestobutikoj forlasis la idearon de la kooperativo kaj jam antaŭ la unua mondmilito malfacilis retrovi socialisman ideojn en la strukturo de la vestobutiko. Jam ekde 1885 la centralo de vestobutikoj tretis en la spurojn de la libera komerco. Oni provis nun oferti malaltan prezon, al tiuj produktantoj kiuj kostis plej malmulte. Ĉar "Vooruit", la centrala vestbutiko iĝis grandvendejo, la produktantoj devis malplialtigi la salajron de la laboristoj, por ke ili povu oferti konkurencan prezon.

Laboristoj el "Vooruit" de la centralo de vestobutikoj suferis ankaŭ arbitrecon.

Edward Anseele starigis la ideon, ke estus pli bone krei propran laborejon por kudristinoj. Kudristoj kaj kudristinoj laboris plejparte hejme kaj estis popeclaboristoj. Por ke estu pli da kontrolo al la kudristinoj. Anseele decidis meti ilin en laborejon. Tiamaniere li ne nur volis plialtigi la produktivecon, sed ankaŭ, kio rapide okazis, malpliigi la altigon de la salajro. Anseele modernigis ankaŭ la laborejon, oni aĉetis kudrilmaŝinon, kiu kapablis fari la laboron de pluraj kudristinoj.

### Kiu estis tiu Anseele mem ?

Li estis antaŭ ĉio politikisto kiu havis gravan signifon por la Belga Socialista Partio.

En 1874 dum kunveno, okulfrapis la partoprenantaron juna knabo, kiu male al laboristoj, kiuj ĝenerale vestiĝis per kaskedo, surhavis blankan pajlocapelon. Estis Edward Anseele, filo el burĝa familio, kiu ravate aŭskultis parolon de Paul Verbauwen. Ŝajnas, ke tiam la engaĝigo de Anseele direktiĝis al socialisma idearo. Fakto estas, ke li en la sama jaro aliĝis al la Belga Socialista Partio. En 1894 li estis la unua socialisto elektita de la popolo por reprezenti ĝin en la parlamento de popolreprezentantoj. Tre populara li iĝis en 1886. En tiu jaro okazis multaj manifestacioj por havi ĝeneralan balotrajton, Anseele tiam alparolis dum kunveno la patrinojn kaj petis ke ili malpermesu al la filoj, ke tiuj levu pafilon kontraŭ laboristoj. Pro tio oni verdiktis Anseele je prizonpuno dum 6 monatoj.

Mi ne scias, ĉu mi kuraĝu diri tion en Gento mem, sed laŭ mi Edward Anseele estis pli speco de liberalulo ol vera socialisto, laŭ mi li neniam forlasis la burĝajn vidpunktojn de la familio. Estinte la plej grava estro de "Vooruit", li kulpis pri la unua striko kaj maldungoj en la kooperativo. Estis li , kiu decidis ke oni ankaŭ vendu bonkvalitajn vestojn. Ne pro la fakto ke li volis vidi bone kaj ŝike vestitan laboristaron, sed ĉar liaj liberalaj amikoj volis profiti ankaŭ de malaltaj prezoj en "Vooruit". Dum diskutoj kun amikoj kaj esploroj ĉe AMSAB pri la figuro Anseele oni povas konkludi nur, ke Anseele estis unu de la plej gravaj personoj, kiujn kreskigis "Vooruit" sed ankaŭ la ĉefa kaŭzanto de la disfalo de la bazo de la kooperativa ideologio. Ne eblas fari bonan kopion de la domo kiun Anseele posedis apud Gento, sed domo de proleto tute certe alie aspektas. Kiel ajn, Anseele havis ideojn kaj certe "Vooruit" multe profitis de lia sperto kaj de la entrepreno.

### La disfalo

En 1896 eksplodis la unua salajrokonflikto en la sino de "Vooruit". Paul De Witte kunfondinto de Vooruit kaj kritika observanto verkis emocian raporton pri la salajro-sistemo kaj problemoj en la kudrista laborejo. La raporto alvokis multegajn reagojn en la vicoj de "Vooruit" kaj dum ĝenerala kunsido oni forpelis De Witte el la estraro. Jes ja, iom kapitalista sinteno ĉu ne ? Oni forigis la portiston de l' vero kaj silentigis prefere la verajn problemojn.

Evidente kaj grave estas, ke ni devas demandi ; ĉu la kolektivo estis bona aŭ nur sloganeska maniero por fari komercon sub tiu ĉi flageto progresema ? Mi jam ofte pri tio diskutis, plej interese estis la diskuto kun mia kompano kaj intelekta frato Willem Rasschaert, gentano kaj pensanto- filozofo, kiu jam antaŭ jaroj kapablis liberigi sin de dogmoj kaj politika demagogio, li gvidis min tra la diversaj lokoj, kiuj referencas al "Vooruit".

Laŭ prelego, kiun mi trovis ĉe AMSAB, de iu sinjoro Croll : - La kooperativo estas la ĉevalo de Trojo, kiu enpenetras la socialisman progreseman idealon. Kooperativo, li diris, estas burĝa eltrovo, kiu alportas al la proletaro nur prometian ĵaluzon, malamon kaj malakordon.

Aliflanke el aliaj dokumentoj de AMSAB mi legis pri la grava morala influo, kiun "Vooruit" havis al la laboristaro. Ebrieco draste malpliiĝis kaj per ĝi ankaŭ la mizero, kiun ĝi alportis al la familioj.

"Vooruit" estis ne nur kooperativo kiu vendas varojn, sed ĝi ankaŭ prizorgis la kulturon. Forte ligita kun la socialiste tendenca sindikato, ĝi subtenis la starigon de diversaj kulturaj asocioj. Daŭra simbolo pri la lukto alporti kulturon al la proletaro estas la konstruaĵo konata sub la nomo "kulturpalaco Vooruit" en Gento.

En 1913 okazis la Monda Ekspozicio en Gento. La gvidantaro de "Vooruit" planis malfermon de grandega popoldomo cirkaŭ la malfermo de la Monda Ekspozicio. Do oni petis al Ferdinand Dierkens, la domarkitekto de la socialistoj, dezegni planon por nova popoldomo en la Sta Pieternieuwsstrato en Gento. Li planis belegan konstruaĵon eklektikan, kiu havis je la flanko de la strato trinkejon, popolrestoracion, bibliotekon, kunvenejojn kaj provludsalonon. La granda parto ĉe la Scheldo, la rivero kiu trairas Genton, donis lokon al kinejo kaj festosalono ambaŭ haloj sufice grandaj por akcepti 1000 personojn. La plano malfermi la kultursalonon dum la Monda Ekspozicio malsukcesis, kaj ankaŭ la inaŭguro estis en aŭgusto 1914 pro la Unua Mondmilito ne ebla. Inaŭguro tamen okazis poste, sed ne laŭ ideoj de la iniciatintoj.

Fakto estas ke la germanoj uzis la kulturpalacon "Vooruit" al propra profito por alporti al la flandra popolo "kulturon". Ne nur germanan kulturon ĉar la popoldomo "Vooruit" havis grandan valoron por la germanoj por montri al la flandra popolo ke la germanoj kaj flandroj apartenis al la sama dia raso !!! La kulturpalaco "Vooruit" ludis gravan rolon en la rilato de germanoj kun la flandra aktivismo, la liberala nekonfesia grupo de maldekstre progresemaj junuloj kiuj defendis la flandran lingvon kaj kulturon.

Sed jam en la jaro 1894, "Vooruit" malfermis sian domon kiu eĉ nun fierigas la urbon Gento. Sur Vrijdagmarkt (vendredomerkato) malfermiĝis la granda vestaĵvendejo. Impona konstruaĵo, ne plu kiel aliaj konstruaĵoj ĉe "Vooruit" en la proleta kvartalo, sed en la centro de Gento. Konstruaĵo kun 4 etaĝoj kaj tia elektra lumo, ke oni ankaŭ dum mallumo povus esti produktiva. Grandaj montrofenestroj por logi klientojn, por ke ili aĉetu ĉe "Vooruit", sur la fasado la teksto "Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu." kaj pentritaj medalionoj kun la vizaĝoj de Francŭas Fourier, Karlo Marks, Cesar De Paepe kaj Robert Owen. En la jaro 1897 fajro komplete voris la belan domon kaj la vendado

denove devis okazi en la malnova vendejo en la proleta “Garenmarkt”.

Delegacio sendiĝis al Parizo por tie rigardi al la aspekto de grandaj magazenoj kiel Bon Marche, Printemps, Pont Neuf kaj aliaj tre burĝaj vendejoj.

Arkitekto Ferdinand Dierksens, amiko de la liberala familio Anseele dezegnis novan konstruaĵon, fakte rilatis pri du konstruaĵoj en la eklektika stilo (iom komparebla al la secesia, junulara stilo). En unu parto troviĝis la biblioteko de la malsanula asekuro de “Vooruit”, salonoj de la propagandoklubo, oficoj kaj kunvenejo. La alia parto kun grandeco de 751 kvadratmetroj sur 3 etaĝoj kaj kun imponaj fenestroj, tra kiuj eniras la taglumo, gastigis novan vendejon. Sur la fasado ĉiam ornamitaj per ruĝaj flagoj troviĝis ree la teksto : “Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu” kaj la vorto “Vooruit”.

La du grandaj domoj, la unua sur Vrijdagmarkt kaj la kulturpalaco en Sta Pieternieuwsstrato, ambaŭ disvolvitaj de arkitekto Ferdinand Dierksens, certe restas daŭre la simboloj de la iama potenco de “Vooruit”.

Pro vanteco nteralie de Anseele kaj aliaj homoj, kiuj sentis sin en pensoj pli liberalaj ol la tuta socialista sistemo , precipe la ideo pri la kooperativo disfalis. Plej verŝajne Sinjoro Croll pravis kiam li diris : - La kooperativo estis la ĉevalo de Trojo, kiu enpenetris la socialisman progreseman idealon. Homoj, kiuj kreas kooperativon, estas homoj diverspecaj. Nur kelkaj sopiras ne al riĉeco kaj posedo, sed la plejmulto de ili ne povas rezisti al la voko de l’ mono kaj forĵetas ĉiujn idealojn. Degeneriga suferado de sindikatoj pro la sama problemo ekas jam tiam, kiam ĝi strukturiĝas kun estraro ricevanta salajron. Jen ne plu la sindikata idealo gravas, sed la gajno.

Nun “Vooruit” estas morta. La antaŭmilita brilo plene malaperis, ĝi forvaporiĝis grandparte pro malbona administrado kaj certa plifortiĝo de la ĝenerala kapitalisma sistemo, tio helpis siavive preskaŭ forigi la kooperativon “Vooruit”.

La kooperativo “Vooruit” mortis, sed la heredaĵo, la belegaj domoj restis kiel donaco al Flandro kultura posedo.

Tiuj, kiuj iam havas la eblon viziti Genton, nepre devas iri al Vrijdagmarkt kaj kiam ili legas la vortojn “Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu” ili eble pensos kiel mi. Jen la centro de gravega parto de la laborista lukto en la 19a kaj 20a jarcentoj.

Gento estis de multaj jaroj la koro de la socialisma belga idearo kaj ĝis nun estas la urbestro de Gento socialisto.

**Jakvo.**

# KONSCIENCO

Li kudris sian kompason
en propra spirito,

rifuzas iun novan direkton

eksciiĝante ke piramido

metita sur pinkton ĉiam serĉas la bazon.

---

Multe pli poste li haltas hezite

ĉe mia poemo “mortanta lumo”

kiu ekliberigas lin ĉe proksimiĝo de fino

de mallarĝa vojeto kiu direktiĝas al malvarmo.

---

Malinklina al la sukceso

kiuj aliaj kun samaj simboloj

akiras, poste kun profunda komprenpovo

ke scio ne konsistigas la tutan homon.

---

**Jomoloso**

# La Pordo

Ĉion ŝi permesis
sed nenion promesis.

Vi malfermis la pordon
de ŝia koro-
preskaŭ, preskaŭ.

Ŝi dancis per manoj teneraj
tra via fuĝanta penso.
Vestitan en luna lumo
vi rememoros ŝin
eterne.

Ankoraŭ sonas malproksima
voko :
“Revenu, ho , revenu !”
Neniam ŝi tiel kriis.

******************************

Al kiu ŝin lasi,
doloro mia !
Kiu ŝin vartos ?

Ĉu mi lasu ŝin al sunradioj
kruele sudaj ?
Al voremaj viraĉoj korkrudaj,
kun okuloj ardantaj,
karnosoifantaj ?

Aŭ prefere
mi lasu ŝin
al leonoj en areno-
- mian karulinon ?

Ĉu lasi ŝin
tiom fragilan
simple sur aŭtostrato-
ŝi pretendos : - komenciĝas
promenado !
Ŝi certe ŝparos doloron mian
kaj plie
ŝi kaŝos larmon sian
por ke mi ĝin ne vidu
lastmomente
ŝi fuĝos,
mi scias
por ke mi ne ploru,
ke mia koro ne sange doloru.

Al kiu lasi ŝin
tiom fragila ?
Al ŝia propra volo -
la plej kruelan !

Tamen
forlasi ŝin mi devis-
nun eĉ plori mi ne kuraĝas-
mizera malkuraĝulo.

******************************

Vestitan en luna lumo
vi rememoros ŝin
eterne.

Ĉion ŝi permesis,
nenion promesis.

Vi ĝuis ŝian korpon-
apenaŭ.
Malfermis la pordon-
preskaŭ

Etel Zavadlav

# Estu lumo

El dormo min vekiĝis
timo akre denta ;
ĉu jam mi malgrandiĝas
en via rememoro-
ĉiun tagon pli eta,
ĉiun nokton pli pala ?

Ho ve- ne estu tiel ;
estu lumo !

La luno brilas malavare-
ĉion mi kontrolas
pedante, detale.

Kaj ĉio estas surloka ;
pordo -
en ordo,
ĝardeno -
sen ĝeno,

arbaro, bretaro....
.............kaj mia koŝmaro.

Trafoliumante rememoron
- jes -
lin mi ne elektis
ne decidis por li ;
ŝtormo simple min kaptis
folieton senpezan.

Rezisti
mi nek provis nek povis.
.....................................
Denove nokto,
denove timo,
gratanta dubo,
malproksimo,
en brusto tertremo -
ĉu vin kaptis jam forgesemo
kaj min vi ne plu vidas
pro obskuro ?

Estu lumo !

Etel Zavadlav

# NE FARU TION !

Ne alproksimiĝu tiom al mi ;
prefere lasu iom da spaco
inter korpoj niaj,
por ke mi povu
pli facile spiri.

Ne klopodu eniri
en mian animon
(ĉu eĉ ekzistantan ?)
tra okulfenestroj.

Ne tro laŭte vin laŭdu,
ne kriu al orelo mia-
tio min turmentas.

Odoro de korpo via
restu por mi nekonata eterne,
se vi ne volas min rabigi.

Iun aferon vi ne scias
evidente,
nun mi instruos vin-
silento ne doloras, ho ne!
Eĉ male, silento dorlotas
miajn pensojn nekombitajn.

Eksilentu, do, finifne!
Lasu min pensi pri....
.....kio ajn plaĉas al mi.
Senfina vico da pensoj,
buklitaj,
onditaj,
facile forvaporiĝantaj.

Lasu min ilin ĝui silente.
..........................

Kaj fine,
la plej grava ;
ne viŝu miajn larmojn,
neniam tion faru ;
tiel min vi forviŝos
ĉar mi estas
larmo mem.

**Etel Zavadlav**

# SKIZO PRI LA PARENCEC-RILATOJ INTER ANIMALOJ


### Resumo

Kial SAT-anoj interesiĝu pri klasifiko de la animaloj? Ĉi tiu temo, kiu unuavice povas ŝajni esotera, tamen gravas laŭ pluraj vidpunktoj. Por kompreni la animalojn (kia ajn estas la motivigo) utilas scii, kiuj estas iliaj parencec-rilatoj, ĉar tio helpas por scii, kiel ili funkcias. De kelkaj jardekoj okazis multaj progresoj tiurilate, kaj la nuna bildo pri evoluo de la vivuloj estas sufiĉe diferenca de tiu, kiu ĝis antaŭ nelonge estis instruata en lernejoj, kaj plu ŝvebas en multaj kapoj. Kaj la metodoj uzitaj, por konstrui la novan bildon, kaj reliefigi la erarecon de sufiĉe disvastigitaj antaŭjuĝoj, parte baziĝas sur fundamentaj principoj, kiuj estas reuzeblaj en aliaj fakoj, interalie socioscienco.


## 1. Enkonduko

La klasifiko de animaloj ne estas nur formala ekzerco: ĝi celas respondi al precizaj bezonoj, ĉu kuirejaj (klasifiki la animalojn inter manĝeblaj, nemanĝeblaj kaj venenaj), ĉu teologiaj (retrovi la dian planon, kiu estus uzita dum la kreo de la vivuloj), ĉu sciencaj. En natursciencoj, eblas klasifiki animalojn laŭ ekologiaj kriterioj (vegetaranoj, kadavromanĝuloj, fosuloj), kiuj ebligas priskribi la funkciadon de iu medio. Tamen, ĉi tiu klasad-metodo ne priatentas la historian aspekton, kiu supozigas ke la medioj evoluas, same kiel la specioj, kiuj tie vivas. La nura maniero prikonsideri la tempon, kaj do kompreni la diversecon ne nur de nunaj, sed ankaŭ de iamaj animaloj, estas la filogenetika klasado, kiu grupigas animalojn laŭ iliaj parencec-rilatoj. En ĉi tiu kadro, temas pri konsistigo de unufilumaj grupoj, nomitaj kladoj, t.e. grupoj, kiuj entenas nur la lastan supozitan praulon kaj ĉiujn ĝiajn idojn. La filogenetika klasifiko de animaloj konsistigas koheran hipotezaron pri la parencec-rilatoj inter ili, kaj pri la laŭtempa akiro de iliaj karakteroj. Ĝi do ne devas esti konfuzita kun determin-libro, kiu celas ebligi la seneraran kribradon de rikoltitaj animaloj dum inventario pri la diverseco de iu medio.

La klasifiko de animaloj restis dum longa tempo ekstreme malpreciza kaj pridisputata, interalie pro la malfaciloj naskitaj de anatomiaj komparoj inter tre malsamaj strukturoj, sed ĝi konsiderinde progresis dum la 20 lastaj jaroj. Unu el la kialoj estas la starigo kaj perfektigo de la kladisma analizmetodo. Ĝiaj principoj bazaj estas polusigo de la karakteroj kompare kun referenco ekstera al la studgrupo, kaj grupigoj nur surbaze de komunaj derivitaj karakteroj, la sinapomorfioj. Por tiuj, kiuj deziras kontroli ĉu ili komprenis, preciza ekzemplo estas diskutita helpe de la bildo 1. La enkonduko de ĉi tiu principo reliefigis, ke multaj antaŭaj grupigoj estas tute eraraj, ĉar ili baziĝis sur foresto de karakteroj. Ekzemple, estas tute taŭge kune grupigi la vertebrulojn, pro tio ke ĉiu el ili posedas vertebrojn, kaj ke oni supozas, ke tiu komuna karaktero « vertebro » aperis ĉe ilia lasta komuna praulo, de kiu ili ĝin heredis. Sed tute ne pli decas kune grupigi mitulon, formikon kaj ekinon en la grupo « senvertebruloj » nur ĉar ili ne havas vertebrojn ol grupigi homon, formikon kaj ekinon dise de la mitulo en la grupo de « senkonkuloj », ĉar konkon ili ne havas. La dua progresofonto por la klasifiko ŝuldiĝas al la disvolviĝo de la elektrona mikroskopio kaj de la kreskantaj eblecoj en genetika sekvencado (t.e. determinado de la sinsekvo de nukleotidoj, kiuj konsistigas la DNA-molekulon de iu animalo) de genoj kaj eĉ genaroj, kiuj disponigis grandkvante novajn karakterojn, uzeblaj por komparoj inter anatomie tre malsamaj grupoj.

Pro ĉi tiuj progresoj, unuafoje ekde 150 jaroj, aperas embrio de interkonsento pri la parencec-rilatoj inter la grandaj animalaj grupoj, kaj utilas eĉ por nefakuloj koni kelkajn el tiuj subdividoj. Ja, ili konsistigas bazan referenc-kadron por ekrespondi kelkajn demandojn pri la historio de animaloj: ĉu tiu historio estis tiu de konstanta progreso? ĉu la animaloj inter si parencaj konsistigas anatomie homogenajn « filumojn », kaj se ne ĝis kia grado okazas diversiĝo ene de iu grupo?

La ĉi-suba resumo celas liveri rapidan skizon pri la animal-diverseco. Ĝi tute ne estas kompleta, sed tamen estas sufiĉe riĉa por ebligi respondon al la ĉi-supraj demandoj. Nur la « ĉefaj » grupoj, t.e. tiuj, kiuj estas gravaj laŭ nombro de konataj specioj, estos ĉi tie detale prezentitaj, kaj aperas sur la bildo 1, por faciligi la orientiĝon. Aliaj grupoj, laŭkvante malpli gravaj, foje konsistantaj el nur kelkaj specioj, tamen estos menciitaj, kiam iliaj karakteroj disponigas utilajn elementojn por nutri la diskuton.

## 2. Loko de animaloj inter la vivuloj

Animaloj konsistigas nur grupeton inter la tuta vivularo, kun proksimume

1 200 000 konataj specioj. Estas ja grave interesiĝi pri ĝi, ĉar ĝi estas unu el la plej facile studeblaj (multaj animaloj estas rekte observeblaj, eĉ sen lupeo aŭ mikroskopo), kaj multaj el ili tre gravas el praktika vidpunkto (multaj estas fonto de nutraĵoj aŭ de malsanoj, kaj ankaŭ ni estas animaloj). Tamen indas konscii, ke temas nur pri parteto el la tuta vivul-diverseco.

La hipotezo pri unukladeco de animaloj (t.e. la hipotezo pri la fakto, ke ili ĉiuj havas komunan praulon, kiun ili dividas kun neniu alia vivulo) estis proponita de Hekelo jam en 1877, kaj kongruas kun molekulaj analizoj. La plej proksimaj parencoj de animaloj estas la ĥoanoflageluloj, eta grupo de unuĉelaj nukleuloj (120 konataj specioj). La ĉelo de la ĥoanoflageluloj posedas kolumon meze de kiu batas flagelo, kies movoj proksimigas la bakteriojn, per kiuj ili nutras sin. Ili vivas ĉefe en maro, sed ekzistas ankaŭ kelkaj dolĉakvaj specioj. Iuj estas fiksitaj sur algoj, aliaj estas planktonaj. La strukturaj simileco j inter la ĥoanoflageluloj kaj la nutroĉeloj de la spongoj estas interpretitaj kiel komuna heredaĵo, kiu jam ekzistis ĉe la komuna praulo de ĥoanoflageluloj kaj de animaloj.

Rilate al ĥoanoflageluloj, inter kiuj ekzistas kelkaj koloniaj specioj (Proterospongia), animaloj diferenciĝas per iuj tipoj de interĉelaj konektaĵoj, per la ĉeesto de specifaj molekuloj en la eksterĉela matrico (kolageno), kaj per multaj reguligaj proteinoj. La genaro de ĥoanoflageluloj entenas proteinajn erojn, kiuj rolas en la formado de la matrico kaj en la interĉela kohereco, sed ĉi tiuj kombinaĵoj estas malsamaj de tiuj, kiuj videblas ĉe animaloj.

## 3. « Spongoj », ankoraŭ ne malaperinta grupo...

« Spongoj » (10 000 konataj specioj) estas grupo de animaloj, kiuj ĉiuj posedas ĥoanoĉelojn, t.e. nutroĉeloj kun flagelo kaj kolumo, kaj akvocirkuligan sistemon. Ili ankoraŭ estas sufiĉe malbone konataj, pro diversaj kialoj, kaj iliaj precizaj rilatoj kun la ceteraj animaloj ankoraŭ estas tre debatitaj. Preter siaj komunaj punktoj, spongoj estas tre diversaj. Ili dividiĝas en du gravaj unukladaj grupoj. La plej abundaj, la silikospongoj (9000 specioj) posedas skeleton el siliciaj elementoj, nomataj spikoj, dum la kalkospongoj (1000 specioj) posedas kalkajn spikojn. Inter la silikospongoj, aparta grupeto, la Homoskleromorfoj, elstaras pro la posedo de epitelio kun baza lameno, kio ĝenerale estas kriterio por difino de veraj histoj. Ni fine notu, ke ne ĉiuj spongoj estas filtrantoj: ekzistas ankaŭ kelkaj karnovoraj specioj, kie la akvocirkuliga sistemo regresis, kaj la spikoj transformiĝis al hokformaj kaptiloj.

## 4. Eŭmetazooj

Eŭmetazooj estas animaloj sen ĥoanoĉeloj, kun korpo konsistanta el veraj ĉeltavoloj, kun epitelio kun baza lameno, kaj diferenciĝintaj histoj, kun muskolaj kaj nervaj ĉeloj. Ili havas digestan tubon, kaj korpon dividitan en malsamaj regionoj. La du ĉefaj grupoj de eŭmetazooj estas duflankuloj kaj kniduloj.

### 4.1. Duflankuloj

La duflankuloj estas animaloj kun du orientitaj aksoj, unu de la antaŭo al la postaĵo, la alia de la dorso al la ventro. Ĉi tiuj aksoj difinas duflankan simetrion. La embrioj akiras mezan ĉeltavolon, kiu formiĝas inter la ekstera tavolo (kiu formos la haŭton kaj la nervaron) kaj la interna tavolo (onta digestotubo). Vidu ankaŭ bildon 3. El ĉi tiu meza tavolo fontas la plej grandaj partoj el la sangocirkuliga, ekskrecia kaj genera aparatoj, kaj ankaŭ la muskoloj. La diverseco de la nunaj duflankuloj estas tiel granda, ke estas ankoraŭ malfacile scii, ĉu iuj karakteroj, kiel la ekzisto de celomo, t.e. kavaĵo en la meza ĉeltavolo, de korpa divido laŭ anatomiaj kaj funkciantaj elementoj (la metameroj) aŭ de kondensita nervosistemo jam ekzistis ĉe la komuna praulo de ĉiuj duflankuloj, aŭ ĉu tiuj karakteroj aperis sendepende en diversaj grupoj. Nur progreso en la konoj pri la t.n. « malgravaj » grupoj, tiel nomitaj pro la malmulta nombro de konataj specioj, ebligos respondi ĉi tiun demandon. Duflankuloj dividiĝas en du laŭnombre tre malegalaj grupoj, novbuŝuloj kaj prabuŝuloj.

#### 4.1.1. Novbuŝuloj

Novbuŝuloj (58 000 konataj specioj) estas animaloj, ĉe kiuj la unua truo, kiu formiĝas dum la embria disvolvo en la onta digesta tubo, estas la anuso (vidu bildon 3). Tamen tio ne estas ilia propraĵo, ĉar la samo okazas ĉe kelkaj prabuŝuloj. La nuraj derivitaj karakteroj, kiuj ŝajne estas apartaĵoj de la tuta grupo, estas la faringaj truoj kaj la endostilo, mukosekrecia glando, ligita kun la digesta tubo. Ambaŭ karakteroj forestas ĉe la eĥinodermoj, pro posta perdo. La novbuŝuloj dividiĝas en du grupoj, la ambulakruloj kaj la ĥorduloj, sed ankaŭ entenas la strangan ksenoturbelon, eta marfunda animalo, kun unutrua digesta kavaĵo, kaj malkondensita nervaro, kiu nutras sin per moluskaj larvoj.

##### 4.1.1.1. Ambulakruloj

Ambulakruloj estas animaloj kun korpo divita en tri regionoj, kun malsamaj celomaj kavaĵoj. Je molekula nivelo, la genetika kodo de iliaj mitokondrioj enhavas strangaĵon, kiu estas unu el la malmulta esceptoj al la universaleco de la genetika kodo. Ĉi tiu grupo enhavas la eĥinodermojn (6000 specioj), tre diversaj laŭ formo kaj vivostilo, kaj aparte multaj en la marprofundaĵoj, kie ili foje estas la plej abundaj vivuloj. La alia grupo de ambulakruloj estas duonĥorduloj (100 specioj), ankaŭ diversaj laŭ vivmedio kaj anatomio (la marbordaj sablovoraj enteropneŭstoj kaj la marprofundaj filtrantaj pterobrankoj). Ili tamen gravas, ĉar ilia ekzisto ebligas supozi, ke la endostilo kaj la faringaj truoj jam ekzistis ĉe la komuna praulo de ĉiuj novbuŝuloj. Aliflanke, malgraŭ ilia erariga nomo, la buŝa « ĥordo » de la enteropneŭstoj neniel rilatas kun la notoĥordo de la ĥorduloj.

#### 4.1.1.2. Ĥorduloj

La ĥorduloj estas animaloj kun notoĥordo, t.e. kartilageca dorsa bastoneto, kiu estas fiksiĝpunkto por la dorsaj muskoloj. Ankaŭ ilia nervoĉeno estas dorsa, kaj ili krome havas hipofizon. Escepte de 11 brankiostomuloj, 1200 tunikuloj (ascidioj, salpoj, apendikularioj) kaj 32 miksinoj, la plej multaj membroj el ĉi tiu grupo estas vertebruloj, kiuj ĉiuj posedas vertebrojn, t.e. skeletaj pecoj kiuj ĉirkaŭas la ĥordon kaj viciĝas laŭ la antaŭa-posta akso. Ekzistas 50 000 vertebruloj, el kiuj preskaŭ la duono estas teleosteoj (karpo, spadulo, hipokampo, soleo...), kiuj estas la plej abundaj vertebruloj en la akvaj medioj, t.e. en 98% el la loĝebla volumeno de la terglobo. La kvarpieduloj, plejofte limigitaj al la eksterakvaj medioj, dividiĝas ĉefe inter 9600 birdoj, 6850 skvamuloj (lacertoj, varanoj, igvanoj, serpentoj), 4900 batrakoj (ranoj, trituroj, cecilioj) kaj 4500 mamuloj.

#### 4.1.2. Prabuŝuloj

Por ĉi tiu grupo, difinita nur laŭ molekulaj kriterioj, momente ne estas konata videbla sinapomorfio. Interalie pri la embria disvolvo, pluraj grupetoj (ĥetognatoj, muskuloj, foronidoj), disvolviĝas novbuŝe, kio ebligas rememorigi, ke la nomo « prabuŝulo », kiel ĉiuj taksonomiaj nomoj, havas nur etikedigan, kaj tute ne priskriban rolon. La prabuŝuloj estas la plej multnombraj animaloj (pli ol 1 100 000 specioj), kaj dividiĝas inter muduloj kaj lofotrokozooj.

#### 4.1.2.1. Muduloj

Ĉiuj muduloj mudas, t.e. kreskas per sinsekvaj haŭtŝanĝiĝoj, sed ne estas pruvite, ke la molekula meĥanismo, kiu tion provokas, estas ekzakte la sama ĉe ĉiuj el ili. Ili perdis la movciliojn kaj akiris tritavolan ŝelon. Muduloj dividiĝas ĉefe inter artikpieduloj kaj fadenuloj.

#### 4.1.2.1.1. Artikpieduloj

Ili estas la plej multaj animaloj, kun preskaŭ 1 000 000 specioj, el kiuj 300 000 koleopteroj, 150 000 dipteroj (muŝoj kaj kuloj), 125 000 himenopteroj (vespoj, abeloj, formikoj), 120 000 lepidopteroj (papilioj), 74 000 araknidoj (araneoj, akaroj, skorpioj), 12 000 miriapodoj, same multaj dekpieduloj (kraboj, salikokoj) kaj perakaridoj (oniskoj, gamaroj). Ili vivas ĉie, de la marprofundaĵoj ĝis la arbosuproj, kaj ĉiuj posedas eksteran skeleton, el rigidaj pecoj kun artikoj inter ili. Ĉiuj ankaŭ posedas artikajn apendicojn.

#### 4.1.2.1.2. Fadenuloj

Kun pli ol 25 000 jam konataj specioj kaj certe multege pli malkovrotaj, la fadenuloj konsistigas gravegan grupon, kiu fakte estas la plej multaj vivuloj en la grundoj. Inter fadenuloj troviĝas multaj plantaj kaj animalaj parazitoj (askarido, filario, triĥino), sed ankaŭ maraj specioj kaj bakterivoruloj. Pluraj specioj estas aŭ iĝas tre uzitaj genetikaj modeloj. Ebla sinapomorfio, el kiu parte fontas ilia laboratoria disvastiĝo, estas la ekzisto de fiksa ĉelnombro, kaj de konstanta ĉeldivida sinsekvo.

#### 4.1.2.2. Lofotrokozooj

Ili konsistigas tre diversan grupon (ĉefe pro multaj laŭnombre malgravaj grupoj, sed kun tre diversaj anatomioj), kaj ili grupiĝas nur laŭ molekulaj kriterioj. La « trokofora » larvo, ofte proponita kiel sinapomorfio, ne ekzistas ĉe ĉiuj anoj de la grupoj kaj eble evoluis plurfoje sendepende. Ekzistas pli ol 150 000 lofotrokozooj, inter kiuj la tri ĉefaj grupoj estas ringuloj, moluskoj kaj platuloj. Inter la aliaj malpli multnombraj grupoj, notindas interalie la muskuloj (4500 specioj), rimarkindaj pro sia novbuŝa disvolvo.

#### 4.1.2.2.1. Ringuloj

Ringuloj konsistigas pli ol 16 500 priskribitaj specioj, vivantaj en ĉiuj maraj medioj, eĉ la plej ekstremaj, kun multaj diversaj vivostiloj kaj anatomioj. Kelkaj ankaŭ vivas en dolĉa akvo (hirudo, tubifekso), kaj en la grundoj (lumbriko). Plej multaj el ili estas segmentitaj, sed ĉi tiu karaktero estis perdita sur la plej granda parto de la korpo ĉe la siboglidenoj, el kiuj kelkaj (riftio) vivas apud la hidrotermaj fontoj, simbioze kun bakterioj, kiuj ĉerpas energion el sulfuroj. La segmentadon komplete perdis la eĥiuroj (verda bonelio), kie la inoj posedas ciliitan rostron plurajn metrojn longa, dum la mikroskopia viro vivas en sia kunulino. La samo okazis ĉe la sipunkloj, kiuj estas marbordaj sablovorantoj. Ĉiuj ringuloj posedas fermitan cirkul-sistemon.

#### 4.1.2.2. Moluskoj

Moluskoj, t.e. pli ol 120 000 priskribitaj specioj, estas la plej multnombraj lofotrokozooj. La plej multaj estas gastropodoj (pli ol 100 000 specioj), kiuj vivas en ĉiuj medioj, kaj je ĉiuj niveloj en la nutroĉenoj. La cetero dividiĝas ĉefe en 12 000 duvalvuloj, 900 ĥitonoj kaj 730 kapopieduloj (sepioj, polpoj, naŭtiloj). Ĉiuj havas haŭton, kiu sekrecias karbonataĵojn, kiuj foje konsistigas konkon. Ili krome havas buŝan raspilon, kaj kombilformajn brankojn. Lige kun la granda diverseco de iliaj vivostiloj (fosantoj, naĝantoj, fiksitaj filtrantoj...), la moluskoj estas tre diversaj laŭ formo kaj anatomio. Ekzemple rilate vidorganojn: iuj estas blindaj (mitulo), aliaj havas multajn okulojn rande de la tuta korpo (pekteno, ĥitono), kaj aliaj (polpo, sepio), havas kamerajn okulojn. Al tio ligiĝas malsama kondens-nivelo de la nervaro.

#### 4.1.2.2.3. Platuloj

Platuloj konsistigas grupon de proksimume 14 000 specioj, kiuj posedas unutruan digestan kavaĵon (planarioj), aŭ eĉ tute ne havas digest-aparaton (tenio). Multaj el ili parazitas en homo aŭ en brutoj (skistozomoj, te-

nioj, fascioloj), sed aliaj estas liberaj rabobestoj. Iuj planarioj havas rimarkindajn rekresko-kapablon.

### 4.2. Kniduloj

Ĉi tiuj animaloj posedas knidojn, kiuj estas brulumaj ĉeloj, ebligantaj la kaptadon de predoj. Inter la 10 000 priskribitaj specioj, la plej multaj estas maraj kaj karnovoraj, sed ekzistas ankaŭ simbiozantoj inter la koraloj, kaj ankaŭ kelkaj parazitoj, kiuj konsistigas la grupon de miksozooj, kaj fiksiĝas al siaj gastigantoj pere de haretoj, kiuj estas interpretitaj kiel modifitaj knidoj. La kniduloj estas tre diversaj laŭ vivocikloj (polipoj, meduzoj, aŭ ambaŭ sinsekve), kaj laŭ sociemo. Iuj vivas izole, dum aliaj konsistigas grandegajn koloniojn, kun gravega ekologia rolo. Ili ja estas la bazoj de la koralrifoj. Ekzistas kelkaj maranemonoj kun duflanka simetrio. Malgraŭ ofta fiksiĝemo, multaj specioj kapablas moviĝi per streĉado de la ventraj muskoloj. Krome ĉe iuj hidroj, ekzistas posta trueto, kies malfermeco estas aktive reguligita, kaj tra kiu vojaĝas diversaj molekuloj.

### 5. Konkludo

Kvankam tute ne kompleta, ĉi tiu skizeto pri la diverseco de animaloj kaj pri iliaj parencec-rilatoj ebligas kelkajn interesajn observojn:

- multaj kompleksaj karakteroj (kameraj okuloj de vertebruloj kaj de kapopieduloj, kruroj de vertebruloj kaj de artikpieduloj), ekzistas nur ĉe grupoj, kies plej proksimaj parencoj tute ne havas tiujn karakterojn. Ĉi tio favoras la hipotezon pri sendependa akiro de ĉi tiuj karakteroj.

La foresto de segmentoj ĉe iuj ringuloj aŭ de digesta tubo ĉe platuloj indikas, ke perdoj ankaŭ estas oftaj, kaj ke do la evoluado ne konsistas el konstanta kompleksigo (aŭ, pli ĝuste dirite, ke la perdoj kaj la anatomiaj modifoj, kiujn ili okazigas, estas ne-neglektinda parto de ĉi tiu kompleksiĝo). Por aliaj karaktertrajtoj, kiel la ekzisto de kondensita nervosistemo kaj de celomo ĉe la praulo de ĉiuj duflankuloj, la debato estas plu malfermita.

- la graveco de la « etaj » grupoj en la diskuto pri la fidindeco de la klasifiko reliefigas la neceson pri detala studo de la vivuldiverseco por kompreni la historion de animaloj. Sen la enteropneŭstoj, ne eblus proponi anatomiajn sinapomorfiojn por ĉiuj novbuŝuloj, kaj iuj karakteroj, verŝajne perditaj ĉe la eĥinodermoj, tiam do estus erare interpretitaj kiel novaĵoj aperintaj ĉe la ĥorduloj, kaj ne kiel primitivaj trajtoj jam ekzistantaj ĉe la lasta komuna praulo de ĉiuj novbuŝuloj. La t.n. « negravaj grupoj » do ne estas anekdotecaj strangaĵoj, sed, same kiel la fosilioj, ili liveras karakterkombinaĵojn diferencajn de tiuj, kiujn eblas observi en la « gravaj grupoj », kaj ili tiel povas eviti la konstruon de simplismaj hipotezoj, kiel tiu pri la kreskanta komplekseco, kaj la troigajn ĝeneraligojn, kiuj fontas el la observo de tro malmultaj objektoj.

- en iuj grupoj, eblas observi grandan anatomian diversecon, kiu kontraŭdiras la oftajn nociojn pri « tipa vivulo » aŭ pri « anatomia plano », tipa por iu grupo. Ekzemple, la siboglidenoj, la eĥiuroj kaj la sipunkloj estis tradicie konsiderataj kiel apartaj filumoj, dum oni nun taksas ilin tre modifitaj ringuloj. La miksozooj spertis la samon, iĝante kniduloj. Kaj multe pli frue estis same por la ciripedoj (balanoj, sakulino), nun vicigitaj inter la artikpieduloj, dum male, la grupo « vermoj » delonge estas disigita inter platuloj, ronduloj, ringuloj kaj multaj aliaj, kies nura komunaĵo estas la manko de kruroj kaj konko.

La deziro krei grupojn el aparta gravo (kiel la filumoj), aŭ malkovri tendencojn al kompleksigo en difinita direkto estas tipaj elmontroj de idealismo, kiu taksas la observeblajn naturajn variaĵojn kiel devojiĝojn el ideala modelo, supozite tipa. Se oni male konsideras, ke la nunaj vivuloj estas atestoj pri konstanta evoluo, kiu supozigas perdojn, akirojn aŭ modifojn de strukturoj rezulte de la selektado en ŝanĝiĝanta medio, la diverseco de la animaloj ne plu aperas kiel nesolvebla kaprompilo, sed kiel riĉaĵo, kiu disponigas sufiĉe diversajn karakterkombinaĵojn por rekonstrui la historion pri la ŝanĝoj, kiuj rezultigis la nunan diversecon. La studo de la filogenetika klasifiko tiam ne plu aperas kiel senutila esotera amuzaĵo, sed kiel aparte taŭga kadro por ekzerciĝi al observado kaj metoda observado de la realo, kiu konsistigas la bazon de la scienca materiismo, utila ne nur en naturscienccaj fakoj.

### 6. Fontoj


*Lecointre, G. kaj Le Guyader H., Filogenetika klasifiko de la vivuloj, 2006, 560 p.(ekzistas angle, france, germane kaj hispane).*


*Manuel, M., artikolo pri « Animala Evoluo » en la franclingva « Encyclopedia Universalis » (ĝisdatigita en 2007).*

*La arbo de la vivuloj, http://tolweb.org/ estas tutmonda anglalingva projekto pri ĝenerala ĝisdata kompilaĵo de ĉiuj informoj pri la klasifikoj, por tiuj, kiuj deziras ricevi detalojn kaj precizajn referencojn.*



### Bildo 1: Kiu estas la plej proksima parenco de vespo, ĉu formiko aŭ muŝo?


Tiun demandon eblas respondi komparante la karakterojn de la tri cititaj insektoj, kun ekstera referenco, ĉi tie gamaro. Ĉiuspecaj karakteroj estas uzeblaj en tiuj komparoj. Ĉi tie estos uzitaj peco de geno (bildo 1.A.), simboligebla per kombinaĵo de literoj A, C, G, T, kiuj bildigas la kvar bazojn, el kiuj konsistas la DNA, kaj eksteraj observoj (la komparatoj aperas sur bildo 1.B). Iuj karakteroj (ĉeesto de flugiloj, observe-

blaj nur ĉe la pariĝantaj individuoj por formikoj), kaj de la bazo T en pozicio 16 de la montrita genopeco, estas observeblaj ĉe la tri membroj de la komparota grupo (formiko, vespo kaj muŝo), sed ne ĉe la gamaro, kiu ne havas flugilojn, kaj posedas la bazon A en pozicio 16. Tiuj karakteroj konfirmas, ke la tri studataj specioj ŝajne ja formas grupon ekster kiu staras la gamaro (kiu do estas taŭga komparoreferenco), sed ne helpas distingi diferencojn inter ili. Same senutila por grupigoj estas la perdo de la dua flugiloparo, aŭ la ĉeesto de bazo C anstataŭ G en pozicioj 7 kaj 8, ĉar tiuj trajtoj estas apartaĵoj de la muŝo, kiu ne povas subteni ĝian grupigon kun iu alia. Sed ĉe vespo kaj ĉe formiko, ŝanĝo de T al A en pozicio 27 kaj de T al G en pozicio 35 estas derivitaj trajtoj, ĉar ili forestas ĉe la ekstera referenco, t.e. gamaro. Ĉar tiuj ĉi derivitaj trajtoj estas dividitaj de formiko kaj vespo, eblas grupigi ilin sur tiu ĉi bazo, kaj do hipotezi, ke formiko estas pli proksima parenco de vespo ol estas muŝo. Eblus elprovi ĉi tiun hipotezon per komparo de pliaj karakteroj, kaj eventuala uzo de pluraj referencaj specioj. La kvar animalaj desegnoj fontas el Vikipedio, kie ili estas disponigitaj sub permesilo « Creative commons ».




Bildo 2: Parencec-rilatoj inter la ĉefaj animalaj grupoj. La horizontalaj branĉolongoj estas arbitraj. La alteco de la trianguloj estas proporcia al la nombro de konataj specioj. Indas rimarki, ke por la plej multaj etaj, aŭ malfacile atingeblaj grupoj, la amplekso povas esti treege subtaksita. Vidu la tekston por detala pridiskutado de ĉiuj nodoj.


A
Gamaro GCCAGGGTGGTGGGTACCTCCCTGAGTGTTATTATTCGCT
Vespo ----------A----T----------A-------G-----
Formiko --------A------T----------A-------G-----
Muŝo -----CC--------T------------------------
B
Transformiĝo de la dua flugiloparo al balanciloj
Ŝanĝo G->C en la nukleotidoj 7 kaj 8
Ŝanĝo T->A en la nukleotido 27
Ŝanĝo T->G en la nukleotido 35
Akiro de flugiloj
Ŝanĝo A->T en la nukleotido 16


Blastotruo=prabuŝo
1
2
Buŝo
Anuso
Blastotruo=praanuso
1
2
Anuso
Buŝo
Prabuŝa disvolviĝo
Novbuŝa disvolviĝo
Ekstera ĉeltavolo
Meza ĉeltavolo
Interna ĉeltavolo
1,2: sinsekvaj disvolvo-stadioj

Bildo 3: Embria disvolvo de duflankuloj

Ĉi tiu treege skema bildo de embrioj sekcitaj laŭ longeco montras la diferencon inter prabuŝa embria disvolviĝo, observebla ĉe multaj prabuŝuloj, kaj novbuŝa disvolvo, observebla ĉe ĉiuj novbuŝuloj kaj kelkaj prabuŝuloj. Ĉiufoje, la formiĝo de tri ĉeltavoloj okazas unue per interna migrado de la ĉeloj, kiuj konsistigos la internan tavolon. Ĉar el ĉi tiu tavolo formiĝas la digesta tubo, la blastotruo, tra kiu iras la migrado, iĝas fine unu el la ekstremaĵoj de la tubo. Kiam la blastotruo iĝas buŝo, temas pri « prabuŝa » disvolviĝo, kaj kiam ĝi iĝas anuso, temas pri « novbuŝa » disvolviĝo.

La griza parto estas la meza tavolo, kies kaviĝo kreas la celomon.

**Vinko Markov**

# REGULARO POR SORĈISTOJ - ANARKIISTOJ

**1. Ne donu opiniojn kaj konsilojn se vi ne estis antaŭe rekte demanditaj.**

**2.Ne parolu al aliaj pri viaj problemoj se vi ne certas ke ili deziras tion aŭskulti.**

**3. Dum vi troviĝas en alies kaverno, respektu gastiganton aŭ ne iru tien.**

**4. Se via gasto en via kaverno vin ĝenas, traktu lin kruele kaj senpardone.**

**5. Ne klopodu sekse vin altrudi al alia persono, se antaŭe vi ne ricevis signalon por kopulado.**

**6. Ne prenu ion kio ne estas via, krom se tio estas pezo por alia persono kiu deziras liberigi sin de tio.**

**7. Konfesu povon de magio, se vi realigis viajn dezirojn pere de ĝi.**

**8. Ne plendu pro io kion vi persone ne devas elteni.**

**9. Ne faru malbonon al etaj infanoj.**

**10. Ne mortigu nehomajn bestojn, krom se vi estas atakitaj.**

**11. Paŝante ekstere, ĝenu neniun. Se iu vin ĝenas, petu ilin ĉesi. Se ili ne ĉesus, detruu ilin.**

*******************************************************

**(Amuza teksto el gazeto)**

**Tradukis Tilio**